
# Heleco

**Pres-organo de:**
**Astura Esperanta Asocio**

**Numero 88** **Decembro 2012**


## 1912-2012
## DUA JARCENTO DE LA KONSTITUCIISMO EN HISPANIO






# Heleco

Numero 88 Decembro 2012



**Astura Esperanta-Asocio**

Sidejo: Universitata Kampuso de Vieskes
GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/

Retadresoj: easturias@telecable.es
mailto:esperanto@uica.info


**Astura Esperanto-Asocio** estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.

Nia agado disvolviĝas kadre de: **Cátedra JOVELLANOS de Extensión Universitaria**

## Enhavo


| Enhavo | Paĝo |
|---|---|
| ASTURA ESPERANTA ASOCIO.- Aktivado de la E-rondo | 3-4 |
| Juan Bautista Luis y Pérez, Episkopo de Oviedo, Honora Prezidanto de Astura Esperanta Asocio | 5 |
| 71a Hispana Kongreso de Esperanto | 6 |
| 97a Universala Kongreso de Esperanto | 7 |
| 20a Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo | 8-9 |
| Kuirante kun Pilar | 10 |
| 1912-2012: Dua jarcento de la Konstituciismo en Hispanio | 11 |
| Krizo de la parlamentismo | 12-14 |
| La ŝtorma jaro 1917 kaj ties sekvoj | 15-16 |
| 1923-1930. La Direktorio de Primo de Rivera | 17-20 |
| Fino de la reĝado de Alfonso la 13a | 21-23 |
| Dua hispana Respubliko | 24-26 |
| La Revolucio de Oktobro 1934 | 27-29 |
| Popola Fronto | 30-32 |
| Civil-milito en Hispanio | 33-38 |
| Faŝisma venko | 39-42 |
| La jaroj de izoliĝo kaj ties superado | 43-45 |
| La long-daŭra apogeo de la frankista reĝimo | 46-49 |
| Ligita kaj bonligita | 50-52 |
| La Konstitucio de 1977 | 53-56 |
| Reakcia reago | 57-59 |
| FELIPISMO | 60-62 |
| Drameca jarmil-ŝanĝo | 63-65 |
| Vip-batas la krizo | 66-68 |
| Kaj la nuntempo… | 69-71 |
| Legante pri la hispana lastjarcenta historio | 72-75 |
| Humura paĝo | 76 |


La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanto-Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.


Leĝa Registro 0/319/85



# Astura Esperanta Asocio

## AKTIVADO DE LA E-RONDO

Ĉar ĉi-jare jam estis eldonita, en monato majo, alia numero de la revuo, ne estas necese raporti ĉi tie pri la tutjara vivo de de nia E-Asocio. Krome en monato julio ni aperigis la 10an numeron de ***A.E.A.-Informilo*** per kiu ni priraportis la poresperantan aktivadon de la grupo. Se, krom tio, nun ni havas pluan laboron rakontendan povus ŝajni ke la membraro de nia E-rondo estas tre aktiva. Nu, jes ja, aktivado favore al Esperanto ne mankas ĉe ni dum la tuta jaro, sed… hontosente ni devas konfesi ke ni ne sukcesas organizi kurson pri la Internacia Lingvo. Ni havas konvenan ejon kie tiaj kursoj povus okazi, ankaŭ instruistojn ni havas, kaj lernolibrojn por la instruado, sed mankas la ĉefa faktoro de ĉiu ajn kurso: la gelernantoj. Ni sufiĉe propagandis pri la ĉeesto de nia sidejo en la Universitata Areo de Gijón, kaj pri la E-kursoj kiujn ni volis gvidi, tamen nia afero tute ne vekas la intereson de la gejunuloj de nia epoko. Ĉio en ĉi tiu socio konspiras kontraŭ aferoj kiaj nia Internacia Lingvo kaj aliaj similaj homfavoraj idealoj.


A.E.A.-informilo
Numero 10 Julio 2012
Pliriĉiĝo de la AEA-biblioteko
Prelegoj pri Esperanto en la IES de Moreda
Datreveno de la Unua Libro en Esperanto

Ne nur en nia universitata medio ni propagandis pri Esperanto. En la pasinta kurso ni havis okazon prelegi pri la Internacia Lingvo en aliaj lokoj. Per la 10a numero de ***A.E.A.-Informilo*** ni informis ke la 24an kaj 25an de majo okazis en la Gimnazio de Moreda iuj aktoj kiuj tie estas nomataj ***Kulturaj Tagoj de Aller-Valo***. Ĉi-jare la titolo kaj temaro de la Celebro estis: ***Kulturo kaj Komunikado: La mil kaj unu lingvoj***. Inter la prelegoj pri la temo de la idiomoj kaj aliaj esprim- kaj komunikad-rimedoj estis ankaŭ konferencoj pri la Internacia Lingvo. Prelegis pri Esperanto kaj ties celo la sekretario de nia E-Asocio.

Alia okazo estis la 8a de aŭgusto, ĉi-foje en la apudmara urbo Ribadesella. Ni estis ricevinte peton de iu instruistino de tiu urbo por partopreni en kunsido de virina babil-rondo kiu kutime kunvenas por pritrakti diversajn kulturajn temojn. La anoj de tiu rondo sentis intereson ankaŭ pri la temo de la Internacia Lingvo **Esperanto** kaj oni invitis nin informi pri ĝi. Por plenumi tion iris al tiu urbo la prezidanto de nia E-grupo Carlos Enrique Carleos kaj la sekretario Faustino Castaño. La kunsido okazis en agrabla etoso en iu restoracio en bela kampara loko en la ĉirkaŭaĵoj de Ribadesella. Oni transdonis priesperantan dokumentaron al la membroj de tiu ina rondo kiuj tre interesiĝis pri la afero. En la sekva paĝo troviĝas foto de kelkaj membroj de la babil-rondo kune kun la prelegintoj. Kiel kurioza anekdoto ni aldonu ke iu el la inoj de tiu rondo estis Menchu Álvarez del Valle, avino de la Princino Letizia Ortiz.

Alia laboraĵo de nia E-Asocio estas la eldonado de ĉi tiu revuo, **Heleco**. Ĉi-jare tiu laboro estis duobla ĉar anstataŭ unu numero en la jaro, kiel kutime, en 2012 ni eldonis du numerojn, ambaŭ 76-paĝajn kaj ambaŭ dediĉitaj al la sama temo: la hispana konstituciismo, okaze de la dua centjaro de la unua konstitucio de Hispanio. Tiu numero eldonita en monato majo pritemas la unuan jarcenton (1812-1912) kaj per ĉi tiu numero kulminas nia historia priraportado de la politika evoluo de nia lando.

La temo de la hispana konstitucio respeguliĝas ankaŭ en nia Interreta paĝo, konkrete en la sekcio “Niaj tradukaĵoj”. Carlos E. Carleos Artime, prezidanto de **AEA**, entreprenis la taskon esperantigi la konstitucian tekston. La laboro estas ankoraŭ ne-kompleta, sed indas prezenti en nia retpaĝo la ĝis nun tradukitan parton por iamaniere festi la duan Centjaron.

En tiu sekcio de tradukaĵoj de nia ret-paĝo estis publikigitaj lasttempe ankaŭ aliaj materialoj:




- hispana teksto kaj ties esperanta traduko de la manifesto-alvoko de Julio Anguita "**Ni estas plimulto. Civitaneca Fronto**". Tiu dokumento, kiu aperas –kompreneble nur hispanlingve- en aliaj interretaj paĝoj, enkadriĝas en la nuntempa problemaro de nia lando, la ekonomia krizo kaj la maniero kiel alfrontas ĝin la registaro. Same kiel la alia menciita tradukaĵo, ankaŭ ĉi tiu rilatas kun la enhavo de la ĉeftemo de ĉi tiu numero de **Heleco**.
- Esperanta teksto de la Himno de Eŭropo, kantita kaj kun abundaj bildoj de lokoj kaj personoj de la Eŭropa Unio.

Aliaj sekcioj de la ret-paĝo, sufiĉe ampleksaj, restas ne-kompletigitaj. Ĉi tiu estas laboro kiu postulas tempon kaj dediĉon. Pluafoje ni invitas niajn legantojn kaj nian tutan membraron kunlabori en la pliriĉigado de nia interreta organo. Pere de ĝi, de Interreto ĝenerale, oni povas dissendi la poresperantan meŝaĝon mondskale. Ŝajnas ke kiam multaj esperantistaj grupoj kaj kluboj, laŭ la tradicia modelo, kiel nia **Astura Esperanta Asocio**, ne kapablas veki en ties geografia medio intereson pri Esperanto, en Interreto senĉese kreskas la esperantistan materialon: paĝoj, libroj, kursoj, vid-filmoj, vorto-difinoj en Vikipedio… Ĉiu ajn persono en ĉiu ajn loko en la mondo povas akiri tra la monda reto ĉiutipan esperantistan materialon kaj tiele ĉesis esti problemo la manko de organizitaj esperantistaj kolektivoj en multaj lokoj. Do, ni devas adaptiĝi al tiu ĉi nova situacio kaj profiti la interretajn rimedojn por plenumi la ĉefan taskon de la esperantistaro: la disvastigadon de Esperanto.





# Juan Bautista Luis y Pérez, Episkopo de Oviedo Honora Prezidanto de Astura Esperanta Asocio

En la jaro 2009, nia E-Asocio festis sian Centjaron. Tiujare ni eldonis specialan, cent-paĝan, numeron de nia revuo **Heleco**. Laŭlonge de tiu ampleksa publikigaĵo ni priraportis la centjaran historion de **Astura Esperanta Asocio** kaj de la astura esperantismo ĝenerale. Kompreneble, por la ellaborado de tiu historia raporto estis necese kolekti grandnombron da dokumentoj: leteroj, ĵurnalaj eltranĉaĵoj, gacetoj, fotoj… Tiu materialo abundis por kelkaj periodoj sed estis vere malabundaj, kaj mise dokumentitaj, por la unuaj jardekoj de nia historio.

Raportante pri la unua periodo de **AEA**, en la 22a paĝo de tiu 84a numero de nia revuo aperas la foto kiun ni prezentas ĉi-paĝe. Temas pri grupo da 28 personoj (ĉiuj viroj) inter kiuj estas kelkaj klerikuloj. Ni sciis ke tiu foto apartenis al la historio de nia E-Asocio ĉar malantaŭ tiu grupo klare videblas la tiaman flagon de **Astura Esperanta Asocio**, kiam ĝi estis enkadrigita en la **Katolika Centro** de Gijón, sed ni ne povis precizigi la daton kaj la cirkonstancojn de tiu foto. Jen la teksto per kiu ni komentis ĝin:




***…pli malfacile estas konjekti la naturon kaj la cirkonstancoj de la grupo aperanta en tiu bildo. Ĝi povas esti aŭ Esperanta lernokurso aŭ kunsido de la estraro de la Katolika Centro. En la foto aperas, krom la du prezidantoj, Tomás Guisasola kaj Francisco Menéndez Rúa, facile rekoneblaj, ankaŭ aliaj kiuj, ŝajne, aperas sur la unua foto kiun ni komentis. Sed estas ankaŭ aliaj tute ne konataj kaj inter ili ne malpli ol kvar katolikaj pastroj. Krome du el tiuj pastroj ŝajnas esti iome altrangaj; iliaj vestaĵoj ŝajnas indiki ke ili estis kanonikoj aŭ io simila. Tio igas nin pensi ke temas pri kunsido de la estraro de la Katolika Centro, sed tiukaze ne kongruas la ĉeesto de tri infanoj en la grupo, nek la flago de Astura Esperanta Asocio, bone videbla malantaŭ la grupo. Alie, la grupo estas tre multenombra por temi pri estraro de iu Asocio. Ĉiuj tri cirkonstancoj apogas la tezon ke temas pri lerno-kurso de Esperanto, sed tiukaze estas ne verŝajna tiom granda partopreno de pastroj en la sama kurso. Antaŭ la manko de preciza informo ni povas fari supozon, kaj nia opinio estas ke temas pri la partoprenantoj en Esperanta lernokurso sed konsentis pozi por la foto ankaŭ kelkaj altranguloj de la Katolika Centro por esprimi sian simpation kaj apogon al Esperanto...***



Nu, hodiaŭ ni povas pli ĝuste informi. La informon ni trovis hazarde en ***Interreto.*** Priserĉante alian aferon en la monda reto ni trovis la paĝon, ret-adreso: http://galeon.com/lucasbruma/antiguas.htm

Temas pri retpaĝo entenanta kelkajn antikvajn fotojn de nia urbo, Gijón, kaj inter tiuj fotoj estis du sur kiuj aperas Francisco Menéndez Rúa, fondinto kaj unua Prezidanto de **Astura Esperanta Asocio.** Kaj jen unu el tiuj fotoj estas tiu, kiun ni komentas. Kaj pli bone estas ke la menciita retpaĝo indikas la daton kaj la cirkonstancojn de la foto, samkiel la nomojn de kelkaj el la personoj kiuj aperas sur ĝi. Tiele ni eksciis ke la foto estis farita en la episkopa ĝardeno de Gijón, la 17an de aŭgusto de 1930, kaj estis farita okaze de la transdono de la titolo de Honora Prezidanto de nia E-Asocio al la tiama episkopo de Oviedo. La nomo de la episkopo ne aperas en tiu ret-paĝo sed ni povis konstati, per alia inform-fonto, ke la tiama episkopo de Asturio estis Juan Bautista Luis y Pérez (1878-1934). Li estas la klerikulo kiu sidas en la unua vico de la grupo, preskaŭ en la centro de la foto, apud Tomás Guisasola, Prezidanto de la **Katolika Centro** de Gijón. La alia klerikulo sidanta apud Tomás estas alia episkopo, ĉi-kaze de Salamanca, kaj nomiĝas, laŭ informas la citita retpaĝo, Francisco Frutos Valiente (1883-1933). Flanke de ĉi tiu, maldekstre en la foto, estas Francisco Menéndez Rúa, unua Prezidanto de **AEA**. La episkopa ĝardeno menciita kiel loko de la foto ni ne scias precize kie ĝi troviĝis, sed estas sufiĉe verŝajne ke estis en iu loko nomata Las Clotas (Contrueces) kie tiam ekzistis iu palaco en kiu somerumadis la episkopoj de Asturio.

La alia foto sur kiu aperas Francisco Menéndez Rúa estis farita la 6an de aŭgusto de la sama jaro, do 11 tagojn antaŭ la alia foto. En tiu bildo la Prezidanto de **AEA** promenas surstrate akompanita de Calixto de Rato y Roces, pri kiu ni povis scii ke estis iu fama kuracisto de tiu epoko en Gijón.

Jen ĉi tiu informo iome prilumigas epokon ne bone konata de la historio de nia E-grupo, pri kiu estas ankoraŭ nekonataj datumoj.






## 71a Hispana Kongreso de Esperanto







La landa E-Kongreso okazis ĉi-jare en la urbeto Almagro (Ciudad Real) de la 27a de aprilo al la 1a de majo. La kongresejo estis la Palaco de la Grafoj de Valparaíso, konstruita en la jaro 1699. En la urbo estis aliaj monumentaj konstruaĵoj de la baroka epoko kiel la t. n. «Corral de Comedias» (komedikorto), kiu konserviĝas senŝanĝe de tiam. La gekongresanoj ĝuis tiujn belaĵojn okaze de la vizito al la urbo kaj dum la ekskurso al ***Campo-de-Criptana***, en kiuj ciceronis Jorge Camacho.

Aliaj kongresa amuzaĵoj estis la projekciado de filmo pri Esperanto kaj teatro-ludado de iu fragmento de la verko **Sanga Nupto** de Lorca, laŭ traduko de Miguel Fernández. La muzik-kvaropo ***Sinkopo*** kontribuis per koncerto al la solena inaŭguro de la Kongreso. Estis aliaj artaj programeroj kiel tiu de la kanzonisto Alejandro Cerro kaj tiu de la kataluna grupo ***Kaj Tiel Plu***, kiu ludis tradiciajn popolkantojn okcitanajn kaj sefardajn, kaj aliajn el la hispana civil-milito, ĉiuj en Esperanto.

Ene de la kongresa programo, Alejandro Pareja gvidis la lingvajn kursojn por komencantoj. En la Ĝenerala Kunveno de HEF oni planis agadon por festi la 125an datrevenon de Esperanto. Toño del Barrio estis konfirmita kiel HEF-Prezidanto. Okaze de la 20a datreveno de la t. n. **Ibera Skolo** oni omaĝis en la kongreso la ĉeestantajn membrojn de tiu grupo: Adúriz, Camacho, Miguel Fernández. Ana Manero raportis pri la nuna stato de disvolviĝo de la HEF-projekto **Bitoteko**, kies celo estas disponigi, tra Interreto, Esper-antajn librojn kaj revuojn.

La presaro bone informis pri la kongreso kaj en Interreto (En la HEF-kanalo ĉe **Youtube**) oni povas vidi kelkajn filmetojn pri tiu evento.










2012
La 97-a UK
Hanojo
Vjetnamio




# 97a Universala Kongreso de Esperanto











Kun speciala referenco al la festado de la 125-jara jubileo de Esperanto kaj al la longdaŭra vietnama milito de la pasinta jarcento, la 97a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Hanojo, la Vietnamia ĉefurbo, de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto. La sidejo estis la Palaco de Kulturo por iuj programeroj kaj la hotelo Meliá por aliaj.

En la solena inaŭguro bonvenigis la gekongresanojn la Vicprezidento de la Vietnama Socialista Respubliko, Nguyen Thi Doan. Salutis ankaŭ reprezentantoj de proksimume 60 landoj, inter ili ankaŭ aziaj landoj, el kiuj ĝis nun malofte partoprenis geesperantistoj en univesalaj kongresoj: Laoso, Kamboĝo, Singapuro...

La kongreso havis malgrandan nombron da aliĝintoj —nur 866— kaj la nombro da partoprenantoj estis la plej malalta dum la lastaj 28 jaroj. La kialo de ĉi tio estis, krom la ekonomia krizo en granda parto el la mondo, la fakto ke la kongresurbo estis tre for de la grandaj esperantistaj centroj, kaj ties klimato troas en kio rilatas al la varmo kaj humideco. Tamen la renkontiĝo en ĉi tiu loko ebligis al 150 junaj vietnamaj geesperantistoj partopreni Universalan E-forumon.

Kiel kutime en tiutipaj kongresoj, abundis la kulturaj aktoj: prelegoj, konkursoj, ekzamenoj, rondaj kaj fakaj kunvenoj… kaj ankaŭ la ludaj, amuzaj… Menciinde estas ke en la ekumena diservo estis neniu pastro. La loka presaro sufiĉe amplekse informis pri la Kongreso.

En la ferma saluto de la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, li disvolvis la ideon ke Esperanto krom promocii la pacon inter homo kaj homo celas ankaŭ la pacon inter la homo kaj la Naturo.

La 5a de aŭgusto okazis postkonkresaj ekskursoj al centra kaj suda Vietnamio, Ho-Chi-Min-urbo (iama ĉefurbo de Suda Viet-namio, kiam ĝi nomiĝis Sajgono) kaj al Kamboĝo.






# 20a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo

## Cambrils, de la 6a ĝis la 13a de oktobro 2012



**Kutime la unua oktobra semajno estas rezervita por la tradicia E-aranĝo en Hispanio. La ĉi-jara jubilea 20-a E-Semajno okazis en la ĉemara urbo "Cambrils", situanta 16 kilometrojn sude de Tarragono. La aranĝon organizas grupeto da entuziasmaj esperantistoj el Barcelono kaj Sabadell sub la gvido de Luis Serrano Pérez. Dum la aranĝo li ankaŭ prizorgas libroservon.**

**Ĉi-foje la aranĝo atingis rekordan nombron da partoprenantoj. Alvenis 144 gesamideanoj el 13 landoj. Ni loĝis en granda 4-stela hotelo "Cambrils" en proksimeco de la plaĝo, kiu etendiĝas je 18 kilometroj laŭ la maro. Multaj profitis la posttagmezajn paŭzojn por promenadi laŭ ĝi kaj ankaŭ baniĝi en Mediteraneo. La vetero en tiu ĉi sezono estas ĉiam agrable varma. Ankaŭ la hotela naĝejo estis ĉiutage plenplena de hotelgastoj. La hotelo disponas pri 400 ĉambroj. Ĉiuj estis okupitaj. Oni aŭdis krom la franca, plejparte la rusan lingvon. Iuj gastoj scivolis pri Esperanto. Nia aranĝo estis la lasta de tiu-ĉi sezono dum kiu la hotelo funkciis. La prezoj estas malpli altaj ol dum la someraj monatoj.**

**La dimanĉan inaŭguron ĉeestis kaj bonvenigis nin la urbestrino de "Cambrils" kaj aliaj du membroj de la urbestraro. Nome de UEA salutis la ĉeestantaron Barbara Pietrzak el Pollando. Ŝi pli poste prelegis pri la 125-a centjariĝo de la Unua Libro. La saman temon oni ankaŭ pritraktis en debato, kiun gvidis Luis Serrano. Ĉiutage (krom la tuttaga ekskurso) Rodica Todor el Rumanio animis kun granda sukceso la E-kurson. Pro ŝiaj profesiaj psikologiaj spertoj la kurso fariĝis interesa kaj sekvis ĝin multaj entuziasmaj lingvoŝatantoj. Ŝi eĉ havis ideon krei komunan libron pri la temo: "Kial restas multaj personoj ĉiamaj komencantoj kaj kiamaniere ni povus solvi tiun fenomenon?". Gian Carlo Fighiera el Italio alloge prezentis la verkon de Victor Hugo "La Belulino, la Monstro kaj Nia Damo". La geedza paro Michèle kaj Hubert el Belgio klarigis kiel plibonigi sian esperanto-lingvoscion per prelegoj. Per bildoj kaj komentario ili rakontis pri siaj spertoj en Esperantujo. Josée Boccadifuoco el Francio rakontis kortuŝan biografion de siaj gepatroj. Temis pri "Rememoro de milito". Profesoroj Júrate Buŝiene kaj Aldis Buŝs el Latvio prezentis serion da prelegoj. Ili konigis al ni informojn pri baltaj landoj: Litovio, Latvio kaj Estonio. Pri sia lando ili montris film-fragmentojn el kultura kaj festa vivo kaj rakontis pri sistemo de instruado en Latvio. Krome ni eksciis kio estas hipofeo - planto kun oranĝaj beroj enhavantaj multe da vitamino C. Manfred Sona el Germanio enkondukis kaj klarigis interesan temon: "Baza enspezo senkondiĉa". Ĝi estus bona rimedo por forigi malriĉecon kaj doni kondiĉojn, por ke ĉiu povu vivi digne. Lia prelego instigis al vigla diskutado. La prezidanto de HEF (Hispana E-Federacio) José Antonio del Bario rememorigis gravajn hispanajn esperantistojn de antaŭ la hispana intercivitana milito. Pro la ĉiutaga vespera hotela programo ne eblis okazigi kelkajn el niaj vesperaj programeroj. Tial iuj gesamideanoj pli frue enlitiĝis, aliaj profitis dancadon, spektis flamenkan prezenton kaj magiaĵojn. Tamen ni ĝuis la du interkonajn vesperojn kun hispana "Cava" - ŝaŭmvino kaj ankaŭ vesperon kun "cremat" (bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj). Nur bedaŭrinde la folklora ensemblo "Montjuic" pro certaj miskomprenoj ne venis ĝojigi nin per siaj kantoj. La hotelo provizis disko-muzikon kaj kontentigis nin per kelkaj havanaj melodioj.**

**La premio "Ada Sikorska" estis ĉi-foje aljuĝita al Vilhemo Lutermano, kiu multe laboras por Esperanto. Li organizas retforumon MAS, redaktas Esperanto-version de "Le monde diplomatique" kaj eldonas E-librojn. Li loĝas en Kubo kaj pro tio li ne povis transpreni la premion persone.**

**Kutimaj (dum tiu ĉi aranĝo) estas unu tuttaga kaj du duontagaj ekskursoj. Dum la unua duontaga ekskurso ni vizitis la E-muzeon en "Pau d'Ordal" kaj la vinkelon "Massana". Tie ni gustumis kaj povis aĉeti diversspecajn vinojn. La dua duontaga ekskurso celis la monaĥejon de "Escornabou". Ĝi estis plurfoje renovigita kaj nun servas kiel muzeo. Apuda rigardejo donis eblecon observi belan kaj vastan ĉirkaŭaĵon. La tuttaga ekskurso estis ĉi-foje iom nekutima. Unue ni vizitis planetarion en la urbo "Castelló". Poste atendis nin surprizo. Ĉiuj 90 ekskursantoj estis invititaj al la hispana specialaĵo "paella". Preparis ĝin je niaj okuloj s-ro Conejero en sia hejmo. La afabla akcepto fare de la familio estis por ni vere agrabla surprizo. Ni ankaŭ gustumis kelkajn fruktojn el la ĝardeno de la gastigantoj.**

**La Semajno estis sukcesa, la vetero favora, hotela manĝo abunda, la etoso gaja kaj amika. Koran dankon al niaj fervoraj organizantoj kaj kunhelpantoj pro la bona laboro, kiu ebligis al ni ĉeesti tiun ĉi ŝatatan aŭtunan eventon. Ĝis revido venontjare denove en Katalunio.**

***Liba Gabalda***














CAMBRILS









2012











Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



# Kuirante kun Pilar



## Nukso-kuketoj

**INGREDIENCOJ**

150 gramoj da ĉokolado
Duon-kilogramo da nuksoj
150 gramoj da butero
200 gramoj da sukero
5 ovoj
Nuksoj por surdekorado

**Por la kovraĵo**

200 gramoj da ĉokolado
100 gramoj da butero
200 mililitroj da likva lakt-kremo

**ELLABORADO**

Oni fandu la ĉokoladon dispecigitan kun la butero. Batu la ovo-flavojn kun la sukero ĝis la kremiĝo de la maso; aldonu la nuksojn dispecigitajn kaj la fanditan ĉokoladon. Oni miksu ĉion kaj aldonu la ovo-blankojn batitajn ĝis densiĝo. Verŝu la mason en rektangulan bak-muldilon kaj kuiru ĝin en forno je 180 gradoj dum 30 minutoj. Malmuldigu la mason kaj atendu ĝian malvarmiĝon.

Kovraĵo. Oni varmigu la lakt-kremon ĝis ekbolo, retiru ĝin el la varmigilo kaj aldonu la dispecigitan ĉokoladon kaj la buteron. Miksu ĉion ĝis la fandiĝo de la ĉokolado kaj kovru per ĉi tiu la kukon. Lasu ĝin en la fridujo ĝis la malmoliĝo de la kovraĵo kaj fine tranĉu ĝin kvadrat-forme.

Dekoru ĉiun kuketon surmetante nukso-pecon.




La nun finiĝanta jaro 2012 estas la Dujarcento de Kadiza Konstitucio konsiderata kiel la komenciĝo de la konstituciismo en nia lando. Tial ni decidis priskribi per nia revuo la politikan kaj parlamentan historion de Hispanio dum tiuj 200 jaroj. La unua el tiuj du jarcentoj jam estis prirakontita per la antaŭa numero de la revuo, eldonita en aprilo de la nuna jaro; ĉi-numere ni okupiĝos pri la dua jarcento, t. e. la periodo inter la jaroj 1912 kaj 2012. Per la menciita raporto de nia revuo ni vidis ke la historio de la hispana konstituciismo kaj de la lando mem dum la periodo 1812-1912 estis sufiĉe ĥaosa, senorda, malharmonia, tempesta, akcidenta, perforta, malfeliĉa… kaj nun ni vidos ke tiu de la dua sekva jarcento, de 1912 ĝis nun, tre estis simile plena je malstabileco kaj malfeliĉaj eventualaĵoj.
Nia antaŭa raporto finiĝis, en la jaro 1912, Centjaro de la Konstitucio de Kadizo, rakontante la murdon de la la Registrar-Prezidento Canalejas en novembro de tiu jaro. Nu, en la jarcento antaŭ tiu evento aliaj du Prezidentoj de la Registaro, Prim kaj Cánovas, estis murditaj per similaj atencoj, kaj jen, en la sekvinta jarcento ĝis nun, aliaj du Prezidentoj Dato kaj Carrero Blanco suferis tian sorton.
Se la antaŭa jarcento estis tragike signita de la Karlistaj militoj, jen, la sekvinta vidis la plej kruelan hispanan civilmiliton, tiun de la jaroj 1936-1939. Ankaŭ tiu pesto de la militista interveno en la politikon, kun ties puĉoj, ribeloj kaj regado far militistestroj, kiu karakterigis la 19an jarcenton, havis sian imitadon en la 20a jarcento: puĉo kaj diktaturo de Primo-de-Rivera, ribelo de garnizonoj de Jaca kaj Cuatro-Vientos, Puĉo de Generalo Sanjurjo, ribelo de militistoj en 1936 kaj longdaŭra frankisma diktaturo, sufokita militista puĉo la 23an de februaro de 1981 kaj posta simila intenco… Se la antaŭa jarcento konis la revoluciojn de 1854 kaj 1868, la lasta jarcento havis tiujn de 1917 kaj 1934. Ankaŭ la strikoj, laboristaj konfliktoj kaj sociaj konvulsioj simile abundis en ambaŭ jarcentoj. La malfacilaj rilatoj inter la ŝtato kaj la Eklezio same kiel la entrudiĝo de la pastraro en la landan politikon kaj la popola perforto kontraŭ la klerikaro estis similaj en ambaŭ jarcentoj. Se en la 19a jarcento iuj strangaj kaj samtempe hispane tipaj uloj kriadis: ***vivu la ĉenoj***!, en la 20a jarcento aliaj same strangaj kaj ankaŭ same hispane tipaj uloj kriadis : ***vivu la morto!***
La malstabileco de vidpunkdo de la konstitucioj same karakterigis ambaŭ jarcentojn. Kaj la samon oni povas diri pri la koloniismo kaj imperiismo aventuremo de la hispana regantaro kaj ties fiasko en tiu tereno. La Burbona dinastio, kiu estis detronita kaj poste restarigita en la antaŭa jarcento, traspertis saman sorton en la lasta jarcento. La Reĝa familio kulpis pri grava koruptado sub Izabela la 2a, kaj la lasta jarcento alportis pliajn tiajn skandalojn en la Kortego la Alfonso la 13a kaj eĉ nuntempe… Duafoje oni proklamis Respublikon en ĉi lasta periodo kaj duafoje fiaskis same kiel en la 19a jarcento. La ekonomiaj krizoj frapadas nin same kiel (aŭ eĉ pli kiel akre ol) en la antaŭa jarcenta periodo…
Oni diras ke la popoloj kiuj ne studas sian historion riskas ripeti samajn erarojn… kaj nia popolo ne emas studi sian historion. Per ĉi tiu modesta prihistoria laboraĵo ni intencas iomete kontribui al tio ke la sekvonta jarcent-periodo estu por nia lando pli paca kaj stabila ol la pasintaj ducent jaroj.

# Krizo de la parlamentismo



Oni povas konsideri ke en la jaro 1913 komenciĝis la krizo de la konstitucia monarĥio de Alfonso la 13a kaj de la sistemo de de la Restarigo mem. Post la morto de Canalejas, la liberalisma registaro estis estrita unue de Manuel García Prieto kaj baldaŭ poste de la Grafo Romanones, sed ankaŭ ĉi ties regado daŭris malmulte. Tiam la reĝo konsideris oportune alvoki la moderistan partion al la regado en la spirito de la alterniĝo de la du partioj de la Restariga reĝimo. Sed la lidero de tiu partio, Antonio Maura, rifuzis plu kunlabori kadre de tiu skemo de alterniĝo en la regado; li postulis ke la liberalista partio forlasu la politikon aplikitan de Canalejas.

Verdire la tiama politika situacio de Hispanio tre estis malsama ol ĝi estis en la epoko de la Burbona Restarigo. La du dinastiaj partioj kiuj alterniĝis en la regado de la lando dum la antaŭaj tridek jaroj estis sufiĉe centrismaj. Restis for de ilia politika ludado la karlistoj, la respublikanoj k. a. Sed en la dua jardeko de la 20a jarcento la situacio estis sufiĉe ŝanĝiĝinta laŭsence ke multaj karlistoj kaj aliaj dekstremaj sektoroj pli malpli ligitaj al la RomKatolika Eklezio enkondukiĝis en la Moderistan Partion, kiu tiele fariĝis nete dekstra. Dume, la Liberala Partio nutriĝis el diversaj sektoroj, la katalunistoj kaj respublikanoj, kaj aliaj, ĉefe de maldekstraro, kiel la socialistoj, akirante karakteron de nete maldekstra partio. Do, inter ambaŭ partioj, nun, respektive, nete dekstra kaj maldekstra, ne eblis paca kaj interkonsenta alterniĝo en la povo, kaj la manko de interkonsento devus esti solvita pere de sentrompa balotado. Sed, laŭ la konstitu-cio, estis la Reĝo kiu rajtis elekti la reganton, kaj sekve ĉi tiu organizadis balotojn laŭ sia propra in-tereso pere de klientismo kaj kacikismo. Resume, la konstitucio, fakte, havis tiam neniun rilaton kun la reala situacio.

Krome, al ambaŭ partioj mankis tiam nediskutitaj lideroj; interne de ili formiĝis grupoj ĉirkaŭ tri aŭ kvar grandaj kacikoj. La deputitoj pli estis de grupo ol de la partio, kaj la grupoj pli estis de persono ol de ideologio. Kaj ĉar la balotsistemo estis kiel ĉiam kaj la kacikoj estis pli kaj pli enradikigitaj en sia propra distrikto, neniu grupo sukcesis alporti propran plimulton al la Parlamento. Do, neniu registaro povis kalkuli je parlamenta plimulto.

En ĉi tiu etapo de la reĝimo la alterniĝo de la registara povo devis kontempli ne nur la du partiojn sed ankaŭ la internajn grupojn de ambaŭ partioj. En la iomete pli ol dek jaroj ekde la murdo de Canalejas ĝis la puĉo de Miguel Primo de Rivera estis ne malpli ol 18 registaroj ***(Vidu en la sekva paĝo la tabelon de la Registar-Prezidentoj).*** Nur unu el tiuj 18 rigistaroj daŭris pli ol du jarojn. La meza daŭro de ĉiuj ili estis malmultaj monatoj, kaj estis iu registaro kiu daŭris nur kvin tagojn kaj alia nur du tagojn. Kompreneble, en tiaj cirkonstancoj ne eblis al tiuj regantaroj efike disvolvi projektojn. Ĉar ĉiu nova registaro apartenis al malsama partio aŭ malsama grupo ene de la sama partio ol la antaŭa, ĝi emis nur malfari tion faritan antaŭe. La politika krizo estis konstanta, la problemoj ofte restis sensolvaj.


Grafo Romanones


Eduardo Dato


Manuel García Prieto

Foje, la graveco de la problemoj igis la Registrar-prezidenton demisii, sed plejofte la ŝanĝo de regantaro obeis nur al la decido de la reĝo. La Konstitucio asignis al la monarko tiun rajton, sed ŝajnas ke li trouzis ĝin. Se la homoj kiujn li elektis por regi la landon estis taŭgaj kaj kapablaj, ili devus disponi de pli da tempo por disvolvi siajn projektojn, kaj se ili ne estis indaj por tiu rolo, oni ne komprenas ke oni elektu ilin por keljfoja alternado kun la aliaj: ja, Manuel García Prieto prezidis kvin alternajn registarojn, la Grafo Romanones, Eduardo Dato kaj Antonio Maŭra prezidis, ĉiu el ili, tri registarojn, kaj Manuel Alonsosalazar Muñoz du registarojn.

Sed, kiel dirite, eble la ĉefa kialo de tiu politika malstabileco estis disrompiĝo de la partioj. En kio koncernas al la Liberala Partio, kiam ĉi tiu entreprenis ĝian rekonstruadon subgvide de homo de nediskutebla intelekta kaj politika kapablo kia Canalejas, la murdista mano de iu anarkiisto mortigis lin en la jaro 1912 malebligante tiun projekton. La rekta sekvo de tiu katastrofo estis la disrompiĝo de la Liberala Partio en grupoj, kiujn gvidis Grafo Romanones, García Prieto, Montero Ríos, Alba-y-Gasset, k. a. Se al tiu skemo oni aldonas la aktivan regionistan malplimulton kaj la bataleman aliancon de respublikanoj kaj socialistoj, oni povas kompreni la malfacilaĵojn regadi kun Parlamento en tiaj cirkonstancoj. Tiu politika disrompiĝo tute senekvilibrigis la tiaman sistemon lasante al la Reĝo la tutan respondecon ne nur de la nomumado de la Registrar-Prezidento sed de la tuta ministraro.

Ekde 1912 al 1917 la plej elstaraj figuroj en la regado de la lando estis: en la Liberala Partio Romanones kaj García Prieto, kaj en la konservativa partio Eduardo Dato, sed ĉiuj ili estis nur regantaroj por demarŝado aŭ administrado, sen iu homogena agad-programo, atentante nur pri la solvado de la gravaj problemoj kiuj senĉese prezentiĝis.

Konkrete, la problemoj aŭ aferoj kiuj tiam plej prizorgigis kaj dividis la hispanojn estis la religia, la socia, la regionisma kaj tiu de la milito en Maroko. El la regad-periodo de Canalejas restis iu ne-solvita afero kun la Eklezio. Tiu ministro volis limigi kaj kontroli la agadon de la religiaj kongregacioj, Tiucele li sukcesis ke la Parlamento aprobu, en 1910, iun leĝon, konatan kiel la Leĝo de la Pend-seruro, per kiu oni malpermesadis la

| *Registar-Prezidento* | *ekde* | *ĝis* |
|---|---|---|
| Manuel García Prieto | 12-novembro-1912 | 14-novembro-1912 |
| Grafo Romanones | 14-novembro-1912 | 27-oktobro-1913 |
| Eduardo Dato | 27-oktobro-1913 | 9-decembro-1915 |
| Grafo Romanones | 9-decembro-1915 | 19-aprilo-1917 |
| Manuel García Prieto | 19-aprilo-1917 | 11-junio-1917 |
| Eduardo Dato | 11-junio-1917 | 3-novembro-1917 |
| Manuel García Prieto | 3-novembro-1917 | 22-marto-1918 |
| Antonio Maura | 22-marto-1918 | 9-novembro-1918 |
| Manuel García Prieto | 9-novembro-1918 | 5-decembro-1918 |
| Grafo Romanones | 5-decembro-1918 | 15-aprilo-1919 |
| Antonio Maura | 15-aprilo-1919 | 20-julio-1919 |
| Joaquín Sánchez de Toca | 20-julio-1919 | 12-decembro-1919 |
| Manuel Alonsosalazar Muñoz | 12-decembro-1919 | 5-majo-1920 |
| Eduardo Dato | 5-majo-1920 | 8-marto-1921 |
| Gabino Bugallal Araújo | 8-marto-1921 | 13-marto-1921 |
| Manuel Alonsosalazar Muñoz | 13-marto-1921 | 14-aŭgusto-1921 |
| Antonio Maura | 14-aŭgusto-1921 | 8-marto-1922 |
| Manuel García Prieto | 8-marto-1922 | 13-septembro-1923 |

kreadon de novaj religiaj ordenoj ĝis kiam oni aprobos iun Leĝon de asocioj aŭ estos pasintaj du jaroj sen ties prezentado en la Parlamento. Ĉi tiu ĝena situacio estis fine solvita de Grafo Romanones, rekte negocante kun Romo.

La socia problemaro daŭre restis pli akra ol ĉiam antaŭe, sed oni devas distingi ĉi tie la situacion de la industriaj zonoj el tiuj kiuj daŭre dependis de la agrokulturo. En la alte industriigitaj regionoj la registaroj ne disponis je amplesa manovr-kapablo por arbitracii en la konfliktoj inter burĝaj entreprenistoj posedantaj la propraĵon kaj la kontrolon de la produktad-rimedoj kaj iu laboristklaso organizita kaj enkadrigita en potencaj sindikatoj kiel la socialista UGT kaj la anarkiista CNT. Oftis la strikoj, multfoje kun perforto, kaj en la kazo de la anarkiistoj abundis la terorismaj politikaj atencoj.


La Reĝo Alfonso la 13a

Post la t. n. "Tragika Semajno", kiu tiome timigis la katalunan burĝaron, la regionismo sin tenis diskrete. Sed, baldaŭ ĝi reakiris sian impetan agresemon. La plej elstara figuro kiu tiam enkarnigis la voĉon de la katalunismo en la parlamentejo estis Francisco Cambó, tre inteligenta kaj kapabla homo. La ideo konkretigi kaj oficialigi la regionismajn aspirojn per iu federacio kiel tiu projektita de Maura estis reprenita poste de Canalejas, kiu atingis la aprobon de la koncerna leĝo en 1912 fare de la Parlamento, sed estis Dato tiu kiu promulgis ĝin per iu dekreto post unu jaro. Konstituita la kataluna federacio kaj elektita ties prezidento Prat-de-la-Riba, povis ĉi tiu plenumadi ĝis sia morto profitan agadon serve de la regionaj interesoj. Tiu politika spertado kontribuis plifirmigi ĉe ampleksaj sektoroj de la kataluna loĝantaro senton pri sia propra identeco kaj emon al al plej alta grado je aŭtonomeco kaj eĉ sendependeco.

La registaroj de tiuj jaroj devis alfronti ankaŭ la problemaron rilate al la militistaj operacioj en Maroko. Tiuj operacioj pliintensiĝis en la ĉirkaŭaĵoj de Melilo. Post la granda sangoverŝado de la jaro 1909 en la t. n. Lup-ravino, la hispanaj trupoj sukcesis plifortiĝi en diversaj strategiaj lokoj por certigi la sekurecon de Melilo-urbo kaj kiel bazo por estontaj operacioj. En la jaro 1911, estante Canalejas registrar-prezidento, estis okupitaj, pere de elmaraj operacioj, Laraĉo kaj Alkazarkiviro, kaj far de iu militista korpuso, la zono ĉirkaŭ Ceŭto. En la jaro 1912 oni entreprenis diplomatiajn demarŝojn rilate al tiu Afrika milito. Sur firmaj bazoj estis negocita tiujare la franc-hispana intertraktato kiu asignis al nia lando la "Protektotorato" (kontrolo) de la nordo de Maroko, t. e. iu terzono mezuranta 28.000 kvadratajn kilometrojn, dum Francio aljuĝis al si la centran kaj sudan terzonojn, 572.000 kvadratajn kilometrojn. Ekde tiam la militistaj operacioj de okupado de Maroko daŭris, kaj en kio rilatas al Hispanio estas menciinda, kiel plej grava fakto, la konkeradon de Tetuano fare de generalo Alfau en la jaro 1913. Ĉi tiu afrika aventuro vekis la rifuzon de la hispana loĝantaro, ĉefe de ĉi ties plej malaltaj sociklasoj, kiuj devis provizi la kanon-furaĝon, t. e, la soldatojn kiuj devis batali kaj morti tie favore al la koloniismaj interesoj de la burĝaj investantoj. Dume ĉi lastaj ne atingis grandan profiton en tiu milito ĉar la teritorio asignita al Hispanio estis tre malriĉa. Sed la plej fia sekvo de tiu aventuro estis la formiĝo de iu militista klastavolo, al kiu oni nomis "afrikanista", kiu ludus estontece malfeliĉan rolon en la hispana politiko.

Se la registaroj de tiu epoko kondutis malprudente en kio rilatas al la milito en Maroko, decas agnoski ke ili saĝe tenis la landon for de la kolosa konflikto kiu kondukis al la memdetruado de Eŭropo de la jaro 1914 al 1918. Nia lando, ja, restis neŭtrale dum la Unua MondMilito. Kaj tio alportis grandan profiton al la landa ekonomio. Hispanio, ja, komercadis, de neutralecaj pozicioj, dum la militaj jaroj, kun ĉiuj militantaj landoj, kaj tio en epoko kaj cirkonstancoj favoraj por la vendantoj antaŭ la urĝa neceso de la aĉetantoj… Rarafoje en la historio, tiam nia lando havis saĝan politikon dum la mondo agadis freneze. La amasa eksportado de krudmaterialoj, produktaĵoj de terkulturo, bestbredado kaj industrio igis ke grandaj monsumoj venis al la poŝoj de la riĉposedantaj klasoj sed dume provokis plialtiĝon de la prezoj de la konsumaj varoj, kiuj kreskis pli rapide ol la salajroj, kaj tio provokis socian malkontenton kaj problemaron kiuj manifestiĝis jam antaŭ la finiĝo de la MondMilito, konkrete en la jaro 1917.

# La Ŝtorma jaro 1917 kaj ties sekvoj



Al la malstabileco de la registaroj kaj la senefiko de la Parlamento aldoniĝis io, kio jam estis montrinta minacajn signojn en la antaŭa etapo; la krizo je aŭtoritato, la trudado sur la publika povo fare de kolektivoj kaj grupoj, kaj la taktiko de la perforto. La fama, tiutempa, filozofo Ortega-y-Gasset difinis tiun situacion kiel influita de iu partikulareco en kiu ĉiu grupo sin sentis kiel parto kaj, sekve, ĉesas kunhavi la sentojn de la ceteraj… Ĉiu aparta grupo kaj klaso emis tujan altrudon pere de rekta agado. Verdire, la soci-politika agitado de tiu jaro en nia lando iamaniere respeguladis la revolucian etoson tiam reganta en Eŭropo, ĉefe en Rusio kie okazis la falo de la Caro en februaro kaj venkis bolŝevistan revolucion en oktobro.

En Hispanio, la plej grava problemo tiam aperinta estis tiu de la t. n. **Militistaj Defend-Komisionoj**. La kaŭzoj kiuj estigis ĉi tiun strangan movadon de armea sindikatismo naskiĝis el la malkontento okazigita de la grandnombro da oficiroj, la malgrandeco de la salajroj de la armeanoj, la favorismo aplikita en la aljuĝado de rekompencoj kaj altrangigoj, samkiel la neegaleca trakto al la diversaj armeaj korpusoj. La rezulto estis la ampleksa movado de la **Militistaj Defend-Komisionoj**, kiuj trudis al la registaroj sian kriterion kaj intertraktadis kun ili kiel sampotencaj entoj. La ekzemplo etendiĝis al aliaj korpusoj, pretaj altrudi siajn interesojn al la publika povo. Oni konstituis Komisionojn de sub-oficiroj, serĝentoj, kaj de publikaj funkciuloj de la Ŝtata Financo-Servo, de la Poŝt-Servo kaj Telegrafoj... Sed vere danĝeraj estis la militistaj pro tio ke ili havis grandan nombron da apogantoj kaj signifis minacon por la civila povo kaj la landa sekureco. La registrar-Prezidento, Manuel García Prieto, volis igi sin respekti de la **Militistaj Komisionoj** perforte, provokante tiamaniere sian propran falon. Male, sia sukcedanto, Eduardo Dato, kiu estis koninta la staton de perturbo de la proletaraj organizaĵoj paktis kun ili kaj publike agnoskis ilin.

Asembleo de Parlamentanoj: La dua grava problemo estis la Asembleo de Parlamentanoj. Dato, antaŭ la graveco de la situacio, tenis malfermitaj la Kortesoj. Tial, la Kataluna Ligo kaj ties estro, Francisco Cambó, postulis la tujan malfermon de la Parlamento. Tial ke la respondo estis nea, Cambó volis ripeti la antaŭan movadon de la kataluna solidareco, sed landskale, io kvazaŭ ia hispana solidareco, kiu metu finon al la politika falseco de la hispana vivo kaj la paktita alternado de la konvenciaj partioj por alfronti, kun la vera apogo de la publika opinio, la gravajn problemojn de la lando. La plano de Cambó celis tujan kunvenon de Konstituciaj Kortesoj. Kvankam la registaro deklaris ribela la Asembleon de Parlamentanoj, ĉi tiu kun-

venis en Barcelono, kun ĉeesto de deputitoj kaj senatanoj el la plej diversaj partioj, ekde la karlistoj ĝis la socialistoj, kvankam kun la notinda foresto de la sampartianoj de Maura. La Asembleo faris sian depostulojn en ordo.
Revolucia striko: Sed ĉi tiu vera politika skuigilo, ebla sav-rimedo de la reĝimo, fiaskis kiam, post malmultaj tagoj, ekestis revolucia ĝenerala striko. La registaro sufokis la ribelon kun la apogo de la Armeo kaj restarigis la ordon; sed reage kontraŭ la laborista iniciato, la asembleista fronto, majoritate burĝa, rezignis ĝian konstitucian celon por apogi la sociekonomian sistemon. Temis pri tipa reago de la burĝaro kiu perfidas sian propran politikan progresismon kiam ĉi tiu povas veki la sociajn depostulojn de la proletaro.
Fiaskinta la provo renovigi la strukturon de la Monarkio kaj la ŝtato, starigante veran parlamentan sistemon, kun aŭtonomio por la regionoj kaj ia alireco de la maldekstraro al la politika demarŝado, la registaro plu dronis en la senefikon, tute for de la landa realo, vane intencante alfronti la multajn problemojn senĉese aperantajn. La disrompiĝo de la partioj de la reĝimo igis necesaj la koaliciajn registarojn, kiuj ne sin distingis pro ilia efiko. Estis krizo ne de la sistemo sed de la reĝimo. La registaroj sin turnantaj de 1918 al 1923 iradis sendirekte, sen plia politiko ol tiu de urĝostato. Estis ega politika malstabileco: dum tiuj jaroj okazis en Hispanio tridek registaraj krizoj.
En 1918, antaŭ la graveco de la situacio, la reĝo Alfonso la 13a per sia propra demarŝado, sukcesis formi iun nacian registaron prezidita de Antonio Maura kaj konstituita de la estroj de ĉiuj parlamentaj frakcioj (Dato, García Prieto, Romanones, Cambó, Ventosa, Alba…), kiuj entreprenis gravan leĝodonan kaj regan taskon, kvankam la daŭro de la kabineto estis efemera. En tiu malfacila etapo regadis García Prieto kaj Romanones de la liberalista partio, kaj Maura, Sánchez de Toca, Allendesalazar, Dato kaj Sánchez Guerra de la konservativa partio. La plej gravaj problemoj kiujn devis alfronti tiuj kabinetoj daŭre estis la regionismo, la socia situacio kaj la milito en Maroko.
La kataluna afero denove pliakriĝis en la jaro 1918. Komisiono de parlamentanoj redaktis la bazojn de iu statutaro pri aŭtonomio kiu estis prezentita al la registrar-Prezidento, García Prieto, por ties studado kaj posta diskutado en la kortesoj. La teksto estis sufiĉe radikala kaj vekis la rifuzon de la ceteraj regionoj de la lando. Je la prezentado de la projekto en la Parlamento, Cambó konstatis ke tie la ĝenerala teniĝo estis kontraŭa al la kataluna iniciato, tial li decidis retiri la regionisman malplimulton. De tiam estis malakordo en la agado. Dum la registaro subgvide de grafo Romanones nomumis, en 1919, eksterparlamentan komisionon por studi eblajn solvojn, la Kataluna Federacio agadis ribele pretigante Statutaron kaj prezentante ĝin al la aprobo de la municipoj de la regiono. Cambó prezentis lastfoje en la Parlamento la katalunan problemon; li akre rifuzis la informon de la Komisiono kaj kromanfoje deklaris ke la kataluna problemo ne estis pri malcentralizado sed pri suvereneco. Romanones respondis ke la registaro estis preta koncedi la projekton ellaboritan de la Komisiono, sed ne preterpasante ĝin.
Sed tiu afero de la naciismo restis senŝanĝa kaj kiel duaranga problemo ĉar en Katalunio mem estiĝis pli grava problemo: la socia problemo en tiu regiono fariĝis pli akra ol la aŭtonomisma. La anarkiismo estis tre aktiva tiam en la tuta lando: en 1921 estis atenc-murdita la tiama registrar-Prezidento, Eduardo Dato. La anarkiistaj atencoj estis speciale multenombraj en Barcelono ĉefe kontraŭ la entreprenistoj, kaj estis ankaŭ perforta batalado inter la membroj de la diversaj sindikatoj.
Al ĉio ĉi aldoniĝis la malbonaj rezultoj de la militaj operación en Maroko. La hispana militista interveno en tiu teritorio cele pacigi la Rifan terzonon ne estis interrompita dum tiuj jaroj spite al la forta rezisto de la tieaj enloĝantoj. La hispanaj trupoj antaŭeniradis en la regionon nur pere de intensa batalado. En la jaro 1921, okazis neatendita katastrofo por Hispanio en tiu milito. La neglekto de la regantaro, la eraroj en la dispono de la militaj operacioj kaj la troa konfido de Generalo Silvestre provokis la militan katastrofon de Annual kaj la falo de la tuta fronto antaŭ la lerta strategio de la rifa gerilestro Abd−el−Krim.
Sekve de tiu katastrofa malvenko de Annual perdis Hispanio, krom grandkvanton da milita materialo, ankaŭ 14.000 soldatojn, inter mortintoj kaj milit-kaptitoj far Abd−el−Krim, kaj falis sub la kontrolo de la rifa militestro la lokoj Dar Drius, Batel, Monte Arruit kaj Nador. Melilla restis en tre danĝera situacio fronte al la malamiko.
Antaŭ la graveco kaj amplekso de la malvenko la lando ricevis egan skuon kaj impreson. Ekde tiam la milito de Maroko estis la koŝmaro de ĉiuj hispanaj registaroj. La katastrofo kaj la postuloj pri la klarigo de ĝia respondeco estis afero senĉese uzita de la opozicio. La hispana militministro ordonis esploron. Subgvide de Juan Picasso González, la komisiono alvenis al la konkludo, ke okazis multaj milit-strategiaj eraroj, sed oni ne kulpigis la reĝon Alfonson la 13an, kvankam diversaj fontoj montris, ke la reĝo kuraĝigis la generalon Silvestre al la ofensivo de Annual. La krizo subfosis la prestiĝon de la monarĥio.

# 1923-1930 Direktorio de Primo de Rivera



Estis registrar-Prezidento en 1923 Manuel García Prieto, kies ĉefaj kunlaborantoj en la ministrejoj pri Internaj Aferoj kaj pri Milito estis Santiago Alba kaj Niceto Alcalá Zamora. En tiuj cirkonstancoj la marŝalo de Katalunio, Miguel Primo-de-Rivera, markizo de Estella, homo trapenetrita de militistecaj idealoj, tre naciismaj kaj aŭtoritatemaj, estris militistan ribelon la 13an de septembro de tiu jaro postulante la politikan povon. Li ne havis konkretan politikan programon, lia celo estis nur meti finon kaj apliki drastajn solvojn al la ĥaosa politika situacio. Li havis tradiciajn valorojn tipe armeanajn: ordo, disciplino, aŭtoritato kaj amo al la patrujo. Lia devizo estis: ***Patrujo, Religio kaj Monarkio***. Li pensis ke sufiĉus bonvolo kaj honesteco por regi iun landon; li malkonfidis je la politikistoj kaj malestimis la partiojn.



Generalo Primo-de-Rivera

La demisio de García Prieto faciligis ke la reĝo aprobu la puĉon. La monarĥo, afina al la ideoj de la militistestroj konsentis la regadon de Primo-de-Rivera pere de iu militista Direktorio leĝigante tiele iun akton kiu, fakte, estis kontraŭkonstitucia kaj fariĝante tiamaniere rekta responsulo de la diktaturo.


Diversaj cirkonstancoj eksplikas tion ke la militista diktaturo estis vidita kiel solvo al la krizo de la lando inter la alta burĝaro, grandparto el la mezaj klasoj kaj la Armeo: Estis malkontento en la armeo post la katastrofo de Annual kaj la emo eviti la sekvojn de la informo Picasso por iuj gravaj generaloj, inter ili Berenguer. En la menciitaj sociklasoj estis ankaŭ maltrankvilo pro la ekspansio de la periferiaj naciismoj kaj la plifortiĝo de la respublikanismo kaj la laborista movado samkiel la pliakriĝo de la sociaj konfliktoj. Ekde la krizo de 1917 kaj rezulte de la Unua MondMilito kaj la influo de la rusa revolucio de 1917, multenombraj strikoj kaj mobilizoj de la laboristklaso estis minaco por la burĝa sociordo. Krome la burĝaro timegis antaŭ la kresko de la anarkiista terorismo, ĉefe en Barcelono, kaj emis rigorajn disponojn por kontraŭbatali ĝin. La militista elpaŝo de Primo-de-Rivera havis kiel internacian referaĵon la venkon de la faŝismo en Italio en 1922 post la Marŝado al Romo kaj aliro de Mussolini al la politika povo. Ankaŭ en aliaj landoj en Eŭropo estis tiam diktaturoj de dekstraro: Portugalio, Grekio, Polujo…

La diktaturo sin prezentis kiel provizora solvo por meti ordon kaj alfronti la problemojn de Hispanio. La puĉo ĝuis dekomence la komprenon kaj la apogon de la reĝo Alfonso la 13a. La ribelintoj deklaris la sieĝo-staton, la ĉeson de la konstituciaj garantioj kaj la dissolvon de la Parlamento. La reĝimo de la konstitucio de 1876 estis anstataŭita de militista diktaturo meze de popola indiferenteco kaj preskaŭ sen rezisto. Grand-

parto el la ĵurnaloj esprimis simpation kaj apogon. Do, kun la kompliceco de la reĝo Alfonso kaj la konsento de grandparto el la labor-mastraro, la klerikaro, la armeo kaj la konservativaj fortoj, Primo-de-Rivera estris iun Militistan Direktorion kiu kuncentrigis ĉiujn ŝtatajn povojn (ekzekutiva, ĵura ka leĝ-dona) ekskludante la profesiajn politikistojn. Fakte, la generalo sin deklaris unika ministro, regante per dekreto-leĝoj, helpita aŭ konsilita de la Militista Direktorio.

Li metis militistojn en la esencajn postenojn de la Administracio (provincestroj, registrar-delegitoj en la municipoj…) Malantaŭ tiu regantaro troviĝis la sama pov-bloko kiu regadis la landon dum la reĝimo de la Restariĝo, t. e. la oligarkio de terposedantoj kaj industrio-mastroj. Sed, laŭŝajne la politiko kiun tiu regantaro pretis apliki estis inspirita en la regenerigaj idealoj de la komenciĝo de la jarcento por restarigi la ordon kaj elradikigi la kacikecan influon el la politika vivo. Komence, eĉ la socialistoj rigardis kun respekto la eksperimenton. Anarkiistoj kaj komunistoj estis la solaj kiuj sin oponis al la puĉo de Primo-de-Rivera kaj kunvokis manifestaciojn kaj strikojn kontraŭ la diktaturo, kio utilis al la Direktorio por pravigi ilian malleĝigon. Sed, ĝenerale, kvankam formale inspirita en la faŝisma modelo de Italio, la diktaturo de Primo-de-Rivera estis pli modera kaj konservativa.

Krom malpermesi la sindikatojn kaj la strikojn, la Direktorio rigore defendis la publikan ordon. La regantaro de Primo-de-Rivera rapide atingis grandan sukceson en kio rilatas al la publika ordo. Tio estis notinda en la urboj kun grandaj industriaj centroj kiel Barcelono kaj Bilbao. Por atingi tiun celon, la diktatoro kreis la t. n. ***somatenon,*** iu milico katalun-tipa formita de volontuloj kaj apogita de la konservativaj mezklasoj por kontraŭbatali la sindikatismon, kaj etendis ĝin al la tuta Hispanio por defendi la publikan ordon. Jam dum la unua fazo de la diktatoreco (inter 1923 kaj 1925), oni persekutis la anarkiistojn (kies sindikato CNT iĝis kontraŭleĝa) kaj la komunistojn.



**La Militista Direktorio**

En Hispanio estis Komunista Partio ekde la jaro 1920. Same kiel okazis dum tiuj jaroj en multaj aliaj landoj, ankaŭ en nia lando naskiĝis komunistaj organizaĵoj subinflue de la prestiĝo de la partio gvidinta la revolucion kiu venkis en Rusujo en oktobro-novembro de 1917. Dum la jaroj de la diktaturo de Primo-de-Rivera, la hispana Komunista Partio estis nur malgranda kaj malgrava organizaĵo de aktivaj kaj konsciaj laboristoj, multaj el ili devenintaj de la anarkiista CNT kaj aliaj el la socialista partio.

La Direktorio de Primo-de-Rivera devis alfronti ankaŭ la naciisman problemon. La diktatoro fluktuis en konfuzo. Komence li estis inklina sekvi politikon de malcentralizado kaj prudenta aŭtonomio. La Kataluna Federacio estis komplete respektata dum iom da tempo; sed fine ĝi estis nuligita, kun granda malkontento de ties partianoj. Aliaj disponoj malpli gravaj fine interrompis la bonajn interrilatojn de la Direktorio kaj la katalunismo. Dum iuj moderaj naciistoj retiriĝis al pozicioj de kultura kaj folklora ostracismo, la ekzaltitaj naciistoj amase transiris al la vicoj de la respublikanismo. Primo akuzis la katalunajn naciistojn, tiel la aŭtonomistojn kiel la separatistojn, je rompigo de la unueco de Hispanio. Oni malpermesis la administran sistemon de Katalunio, t. e. la Katalunan Federacion, samkiel la flagon kaj la himnon de tiu regiono, kaj eĉ la tradician katalunan rondo-dancon (sardano). La kataluna lingvo restis forlimigita en la privatan terenon. La rezulto de tiuj disponoj estis la pliradikaliĝo de la katalunismo, aperante nova partio: ***Estat Catalá***, prezidita de Maciá. Ankaŭ oni ne respektis la naskiĝantajn naciismojn de Galegio kaj Eŭskio. Estis malpermesataj la aliaj lingvoj krom la hispana.

Alia dispono de la Direktorio estis la malpermesigo de la politikaj partioj. La nova reĝimo kreis en la jaro 1924 sian propran politikan partion, la Patriotisma Unio, kiu estis la sola permesata en la lando kaj kiu estis subgvide de iu militisto. Tiu aranĝo estis inspirita en la itala modelo de la faŝismo de Mussolini. Cetere, la Direktorio ankaŭ

protektis la nacian industrion, kaj helpis publikan konstruadon.
Unu en siaj plej grandaj sukcesoj estis plifirmigi la hispanan ĉeeston en Maroko. La decido de Abd-el-Krim ataki la zonon okupitan de Francio ebligis iun francan interakordon kun Hispanio kiu starigis la bazojn de fakta kunlaborado de ambaŭ landoj en la milito de Maroko, unika rimedo por alveni al la ĝenerala pacigado en tiu lando. La elŝipiĝo en Alhucemas estis malfacila milita operacio sukcese plenumita en 1925 subgvide de Primo-de-Rivera mem, kio signis la ĉefan momenton de la kampanjo. La generalo Sanjurjo estis militista figuro elstarinta en la dua fazo de la operacioj kiuj, ekstartante de la kontrolitaj terzonoj, progresis malrapide, malgraŭ la sieĝon de la rifaj triboj (kabiloj). La fina rezulto estis la kompleta kontrolo de la maroka terzono kaj la kapitulacio de Abd-el-Krim antaŭ la aŭtoritatoj de la franca zono de Maroko. Tiu milita venko metis finon al jaroj de senĉesaj militoj kaj malvenkoj kiel tiu de Annual en 1921. La fino de la milito en Maroko alportis grandan popularecon al la hispana diktatoro. Lia sukceso en la afero de Alhucemas kuraĝigis lin daŭrigi la diktatorecon.
Alia sukceso de Primo estis lia agado en la sociala tereno. La leĝaro defendanta la laboron ege intensiĝis, akirante grandan disvolviĝon kiel organo celanta la rektan demarŝadon de la socia sekureco la ***Nacia Instituto de San-Protekto***. La diktatoro krome sukcesis dialogadi kaj pakti kunlaboradon kun la socialista partio kaj la sindikato UGT, kies lidero Francisco Largo Caballero estis membro de la Ŝtata Konsilantaro. Frukto de tiu profitdona interkonsento estis la t. n. Parti-egalaj Komitatoj por solvi la prilaborajn problemojn, kiuj kontentigis la laboristklason kaj samtempe ne provokis la opoziciadon aŭ malkontenton de la industrimastra klaso.
Kun la paco reganta en ĉiuj terenoj venis ia komforto kaj ekonomia disvolviĝo, kiel atestis la du gravaj Ekspozicioj (Barcelono kaj Seviljo) inaŭguritaj en la jaro 1929.



Apogis la Direktorion, krom la reĝo, la armeo kaj la konservativaj fortoj de la lando: la klerikaro kaj la oligarkio de ter-posedantoj kaj industrio-mastroj.

Se Primo-de-Rivera estus retiriĝinta el la politiko post la venko de Alhucemas, igante sian diktaturon provizora kiel li promesis en la momento de la puĉo, sendube li estus pasinta al la historio de la lando kun tre favora memoro pri li. Sed li volis plurestigi sian regadon kaj instituciigi sian reĝimon, pensante ke senĉese li kapablus alfronti ĉiujn situaciojn kaj solvi ĉiujn problemojn. Tiel, fine de 1925 iu civila registaro, prezidita de li, anstataŭis la Militistan Direktorion kaj daŭris gis 1930. Estis elstaraj figuroj de tiu civila registaro José Calvo Sotelo kiel ministro de Financoj kaj la grafo de Guadalhorce kiel ministro de Disvolvigo. Iu el la ĉefaj disponoj de la ministrejo de Calvo Sotelo estis la starigo de la monopolo pri la la nafto (la entrepreno CAMPSA) kontraŭ la interesoj de la potencaj fortoj de la internaciaj financistoj. La grafo Guadalhorce estis la aŭtoro de la fama plano por la renovigo kaj ampleksigo de la reto de la landaj ŝoseoj. Aliaj ministroj de tiu civila registaro estis Martínez Anido en Internaj Aferoj, kaj Eduardo Aunós, ĉiuj de la ekstrema dekstraro.
Inter la atingaĵoj de la reĝimo notindas ĝian ekonomian politikon, plenumitan de la ministro Calvo Soltelo. Profitante la favoran ekonomian konjunkturon (la feliĉaj dudekaj jaroj), la etapo de la diktaturo estis de ekonomia prospero, plifirmiĝante la kapitalismo en Hispanio. Estis iu forta ŝtata intervenismo kontrolante ĉiujn produktigajn sektorojn. Oni subvenciis entreprenojn kun publika mono kaj pliintensigis la publikan investadon en substrukturoj: ŝoseoj, lernejoj, hidraŭlikaj laboraĵoj… Aperis la ***Hidrografiaj Korporacioj*** kaj la monopoloj: CAMPSA, Tabak-industrio, Telefon-industrio, Loterioj… La plej granda profito estis por la kapitalistoj. La ŝtato tro enŝuldiĝis kaj kvankam la laboristoj vidis pliboniĝi sian vivnivelon, daŭre estis malaltaj salajroj, kaj la taglaboristoj estis en mizera stato.
La Patriotisma Unio, oficiala partio de la reĝimo, intencis aglutini ampleksan politikan spacon por

legitimi la diktaturon sed fiaskis en tiu intenco kaj restis kiel sola ilo de la oficiala propagando en kiu instaliĝis fiaskintaj politikistoj kaj oportunistoj. Do, en la institucia tereno la diktaturo ne kapablis krei ion, kio igus forgesi sian devigan provizorecon. Cetere, li ne posedis la sperton kaj la trejnadon por plenumi en Hispanio rolon similan al tiu de Mussolini en Italio.

En la jaro 1927 konstituiĝis iu Nacia Asembleo konsultiĝa, plejparte formita de membroj de la Patriotisma Unio elektitaj laŭ limigita voĉdonado, simila al la Faŝista Konsilantaro de la itala modelo. Tiu Asembleo entreprenis en 1929 la ellaboradon de projekto de konstitucio sed rapide fiaskis en tiu intenco redakti fundamentan leĝon kiu rolus kiel la Konstitucio de la diktaturo. Tiu ŝajno de Parlamento ne demokratia montris la diversecon de politikaj pozicioj inter la apogantoj de la diktaturo, katolikaj konservativuloj, simpatiantoj de la faŝismo, militistoj kaj oportunismaj negocistoj.

Oni imitis ankaŭ la socian modelon de la itala faŝismo, starigante la Korporacian Organizaĵon de la laboro, io simila al sindikato kies celo estus arbitri inter industrio-mastroj kaj laboristoj. Ankaŭ tiurilate fiaskis la intenco instituciigi la reĝimon de Primo-de-Rivera.

Meze de la jaro 1928 evidentiĝis la dekadenco de la diktaturo. Dividitaj la fortoj kiuj apogadis la diktaturon kaj malpliboniĝintaj la rilatoj de la diktatoro kun la reĝo, ili ne kapablis alfronti la reagon kaj plifortiĝon de la opozicio pli kaj pli unuigita kaj mobilizita antaŭ la danĝero vidi pludaŭri la reĝimo. La opozicio al la reĝimo ampleksis grandan politikan diversecon kaj unuigis kontraŭ la diktaturo socialistojn, respublikanojn, anarkiistojn, komunistojn, naciistojn, studentojn kaj intelektulojn, inter kiuj elstaris Unamuno, Ortega-y-Gasset, Marañón... Surstrate studentoj kaj laboristoj manifestaciis kontraŭ la reĝimo. Oni povas diri ke la diktaturo sukcesis unuigi kontraŭ si mem ĉiujn, kiuj ĝis tiam kunlaboradis neniom: la antikvaj monarkismaj politikistoj: Sánchez Guerra, Romanones, Alba, Osorio-y-Gallardo, Alcalá Zamora… formis komunan fronton kun la respublikanoj. Eĉ militistoj estis konspiraciintaj en 1926; la malkontento de iu parto el la armeo kreskis pro la arbitreco de la diktatoro. La reformoj de Primo-de-Rivera kaj la erodo kiun alportas ĉiu longdaŭra demarŝado de la publikaj aferoj poziciigis kontraŭ li kelkajn generalojn kaj oficirojn, kiuj evoluis al respublikanismo. En iu interna konflikto de la korpuso de artilerio la generalo reagis perforte kontraŭ la rezisto kaj sendisciplineco kaj eĉ proponis al la reĝo la dissolvon de la artileriaj korpusoj. De tiam la armeo ĉesis esti neŭtrala kaj nepolitikema forto por poziciiĝi parto el ĝi en iu teniĝo kontraŭ la reĝimo.

Primo-de-Rivera malkovris tiam, je lia kosto, ke estas pli facile detrui reĝimon kiel la oligarkian liberalismon ol generi novan reĝimon. Lia registaro traspertis ankaŭ la kreskantan budĝetajn malfacilaĵojn de la ŝtato, enŝuldita kaj nekapabla realigi fiskan reformon kiu starigus unikan kaj progresivan imposton pri la rento pro la opono de la riĉaj klasoj. La Universala Ekspozicio de Seviljo (en 1929), kiun la diktatoro estis organizinta celante prestiĝon, pligrandigis la ŝtatan ŝuldon. Krome la ekonomia krizo de 1929 malplibonigis la situacion de la lando: reaperis la sociaj konfliktoj kun grandaj strikoj. Estis tiam kiam la socialistoj ĉesis apogi la reĝimon kaj aldoniĝis al la ceteraj opoziciantaj fortoj.

Fine de la jaro 1929 Primo-de-Rivera estis suferante gravan malsanon. En iu diktaturo la persono de la diktatoro estas ĉio; kiam li feblas, la tuta reĝimo troviĝas subdanĝere. Krome, sen la apogo de la altaj militistestroj kaj de la reĝo, la generalo devis prezenti sian demision. Tion li faris la 27an de januaro de 1930 al Alfonso la 13a, kiu haste akceptis ĝin premita de la konservativaj kaj liberalistaj politikistoj kiuj estis dezirantaj reveni al la parlamentismo kaj iu opozicio kiu minacis ne nur la diktaturon sed ankaŭ la monarkion kiu estis apoginta ĝin. Primo-de-Rivera ekziliĝis en Parizon kaj tie li mortis la 16an de marto de 1930 pro diabeto.

Post la demisio de la generalo, la reĝo devis alfronti la konstituon de nova regantaro kadre de nova landa situacio en kiu la publika opinio de la hispanoj devus esti zorge priatentata.



La apogo de Alfonso la 13a al la militista diktaturo de Primo-de-Rivera endanĝerigis la monarkion



# Fino de la reĝado de Alfonso la 13a




Antaŭ la fiasko de la diktaturo, la reĝo Alfonso la 13a volis reveni al la parlamenta reĝimo kaj nomumis registrar-Prezidento generalon Berenger-n kun la tasko restarigi la Konstitucion de 1876 kaj savi la monarkion, kiu restis tre endanĝerigita pro ĝia koluzio kun la diktatoro. Temis pri politika procezo tre malfacila: la transiro el diktaturo al konstitucia normaleco sen la kunlaboro de tiuj kiuj regadis ĝis nun kaj ankaŭ ne de la opozicio.

Dámaso Berenguer formis sian registaron kun konservativaj politikistoj, prestiĝaj personoj kaj personaj amikoj liaj. Kiam li anoncis sian celon reveni al la konstitucia leĝeco la teniĝo de la publika opinio estis notinde favora. Dum la unuaj monatoj de lia regado malaperis la militistaj konspiroj.


Dámaso Berenguer

Sed la lanteco de la registara agado igis pridubi la alvenon de la normaleco. Laŭ la pasado de la monatoj senĉese suferadis damaĝon la popola konfido je la regantaro. Tamen la plej grava eraro de tiu registaro estis ke Berenguer pretendis reveni al la politikaj kutimoj ekzistintaj ĝis la puĉo de 1923, t. e. li planis rekonstrui la kacikecan sistemon kiun Primo-de-Rivera estis malmuntinta kvankam kreis nenion por anstataŭigi ĝin. La hispana loĝantaro de la jaro 1930, ĉefe tiu de la urboj, estis sufiĉe matura de politika vidpunkto por aspiri al pli demokratiaj strukturoj ol ties de la 19a jarcento. Oni entreprenis la revenon al la konstitucio de 1876 kun ties strukturoj de la liberalisma oligarkio. Tial, la registaro sin apogis sur la tradicia politika korupteco de la rura medio, indiferenta kaj pasiva, kiu ajn estus la reganto.

Ankaŭ rilate al la priekonomia politiko la Berenguera registaro teniĝis anakronisme. Dezirante la registaro praktiki striktan kaj ortodoksan budĝetan politikon, unu el ties ministroj fieris pri tio ke dum lia mandato oni ne faris eĉ unusolan publikan laboraĵon, kio kontribuis pligrandigi la senlaborecon. La ĉefa celo de tiu registaro estis la restarigo de la Konstitucio de 1876 kaj kunvoki ĝenaralan balotadon por la urĝa konstituo de la Kortesoj. Dume ĝi devis sin dediĉi al la detruado de granda parto el la leĝaro de la diktaturo, restarigi la provincajn kaj la municipajn gvidorganojn kaj apliki politikajn pun-pardonojn. Sed revenis la sociaj konfliktoj, strikoj, atencoj, perforto.

Laŭ Berenguer mem, Hispanio faris kiel ĉampanbotelo senkorkiĝata. La publika opinio ŝajne dorminta la pasintajn sep jarojn komencis ludi tre aktivan rolon en la politika vivo. Al tio kontribuis la malfacila ekonomia situacio kiam oni komencis percepti la sekvojn de la krizo de 1929, dum en iuj andaluzaj provincoj la pluv-manko generis senlaborecon kaj strikajn konfliktojn.

La forto de la respublikismo pligrandiĝis per la kunlaborado de gravaj intelektuloj, kiel Marañón, Ortega-y-Gasset, Pérez-de-Ayala, Valle-Inclán, Azorín, Unamuno, Machado… kaj parto el la Armeo: iu sektoro el la junaj oficiroj estis influitaj de ideoj de radikala maldekstraro, ĉefe komunismaj.

La malnovaj partioj reaperis kun iliaj anakronismaj programoj. Sed, escepte la konservativaj frakcioj, pretaj reveni al la normaleco, la ceteraj monarkiismaj grupoj konsideris nuligita la Konstitucion de 1876 kaj pretiĝis kontraŭbatali la registaron, postulante tujan kunvenon de Konstituaj Kortesoj. Elstaris en tiu teniĝo Sánchez Guerra, Romanones, García Prieto kaj Melquides Álvarez. Pli aktiva estis la respublikista opozicio. Niceto Alcalá-Zamora, liberalista eksministro sin deklaris respublikanisto; aliĝis al lia partio Miguel Maura, filo de la konservativa lidero kaj aliaj transfuĝintoj de la monarkiismo.

En aŭgusto de 1930 oni subskribis la t. n. “Pakto de San-Sabastián” inter ĉiuj respublikismaj opoziciantoj: socialistoj, radikalistoj kaj maldekstraj katalunistoj; la anarkista **CNT** ne partoprenis sed tamen esprimis sian apogon. Ili interakodis meti finon al la monarkio. Tiu pakto signifis la aliancon inter la malnova kaj la nova respublikismo samkiel ilia kunlaborado kun fortoj situitaj en la

marĝenoj de la sistemo kaj la komenciĝo de kunordiga gvidado de ĉiuj-ĉi sektoroj. Krom Alcalá Zamora, Miguel Maura, Azaña, Lerroux… ĉefaj figuroj de la respublikismo, partoprenis ankaŭ membroj de la kataluna respublikismo kaj de la galegismo (Casares Quiroga). Indalecio Prieto reprezentis la socialistojn. Tiamaniere du gravaj politikaj fortoj, katalunismo kaj socialismo, enkondukiĝis en la kadron de la respublikismo. De tiam ekzistis iu respublika provizora registaro kiu, en Madrido, kunvenadis en la Ateneo kaj estis prezidita de Niceto Alcalá-Zamora.

La respublikista opozicio ne atendis la anoncitan balotadon por doni vivo-signojn. En decembro de 1930 okazis en Jaca iu respublikista militista insurekcio kun alilokaj komplicoj. La tiea garnizono ribelis subgvide de la kapitanoj Fermín Galán kaj Ángel G. Hernández, sed la movado fiaskis ĉar aliaj kompromisitaj militistoj ne asistis la operacion. Ambaŭ oficiroj estis kaptitaj, juĝitaj kaj paf-mortigitaj. La afero estis malbone organizita; la ribelo de la du junaj oficiroj antaŭiĝis rilate al la disponoj de la respublikistaj gvidantoj. La manko je preparo de la puĉo estis tia ke la ribelintaj trupoj antaŭenmarŝis nur 86 kilometrojn dum 19 horoj, kaj, fine, ili estis facile venkitaj de fortoj lojalaj al la monarkio. La sekreto en la konspiro estis preskaŭ nula: la ĝenerala direktoro pri Sekureco mem (Mola), skribis al Galán por konvinki lin ne ribeli. Queipo-de-Llano kaj Ramón Franco intencis insurekcii en Cuatro-Vientos (garnizono de aviadistoj) sed la tiea oficiraro ne volis kunlabori. La laboristklaso ĝenerale restis pasiva ĉar en Madrido Besteiro konsilis ne kunlabori kun la movado; nur en iuj urboj estis strikoj kiuj, ĉiukaze, estis pacaj. Paradokse ĉi tiu respublikista katastrofo fariĝis sukceso; la kapitanoj Hernández kaj Galán fariĝis martiroj de la respublikismo kaj post kvar monatoj la reĝimo, kiun ili ne sukcesis faligi perforte, falis rezulte de iu baloto.



**Kapitanoj Galán kaj Hernández**

Dum la registaro de Berenguer persistis en sia plano kunvoki ĝeneralan balotadon por elekti Korteson, plejparto el la partioj minacis ne partopreni en tiu balotado: ekde la finiĝo de januaro 1931 ĝis la mezo de februaro, sinsekve faris tiun anoncon la konstituciistoj, respublikistoj kaj socialistoj, poste faris tion ankaŭ la liberalistoj kaj la katalunistoj. Koninte la decidon de ĉiuj partioj, monarkiistoj kaj respublikistoj, ne partopreni en la balotado, Berenguer decidis prezenti sian demision kiel registar-prezidento. La reĝo havis multajn malfacilaĵojn kaj fiaskojn en lia intenco trovi iun politikiston por estri novan regantaron. Fine Juan B. Aznar formis iun registaron de ampleksa bazo monarkiisma en kiun eniris kiel ministroj: Romanones, García-Prieto, Ventosa, La-Cierva, la Duko de Maura, Bugallal, kaj la demisiinta Dámaso Berenguer.

La nova regantaro ne ŝanĝis la taktikon, kaj decidis, laŭ la konsilo de Romanones, ke la reveno al la normaleco okazu per sinsekvaj balotadoj: municipaj, provincaj kaj ĝenerala. El ĉi tiu lasta devus eliri Konstitua Korteso. Oni revizius ankaŭ la katalunan aŭtonomecon. La unua balotado estus la municipa kaj ĝi devus okazi en monato aprilo. Dum la monatoj antaŭ la balotado estis ega kontrasto inter la indiferenta apatio de la ministroj kaj la agitiĝo de la publika opinio, la universitataj disturboj, la intensa balotkampanjo de la partioj. La balotado por la municipaj konsilantaroj estis fiksitaj por la 12a de aprilo de 1931. En tiu voĉ-donado atingis grandan venkon en la urboj de la lando la partioj subskribintaj la Pakton de San-Sebastián, t. e. la respublikistaj kandidataroj. Kompreneble, la rezulto estis malsama en la urbetoj kaj vilaĝoj de la kampara medio kiuj, laŭtradicie, estis kontrolitaj de la lokaj kacikoj serve de la registaro, kiu ajn ĝi estus.

En la mateno de la 14a de aprilo, je la 6a horo frumatene, la elektitaj municipaj magistratanoj de Eibar kunvenante en la urbodomo, proklamis la Respublikon. La ministro Romanones kontaktis kun la reĝo kaj anoncis konversaciojn kun la respublikistoj, konkrete kun Alcalá-Zamora. Je la 11a horo matene, generalo Sanjurjo, direktoro de la korpuso de la Civila Gvardio, sin metis je la servo de la Respubliko. Je la 14a horo, vespere, Romanones, nome de la reĝo, anoncis la rezignon de la monarko. En Katalunio, komence de la vespero, Luis Companys, lidero de ***Esquerra Catalana*** (Kataluna Maldekstro) ekde la balkono de la Urbodomo, anoncis la naskiĝon de la Respubliko

kaj hisis la trikoloran flagon. Vespere de tiu 14a de aprilo, okazis la lasta kunsido de la registaro de la monarkio en la reĝa palaco. Nur unu ministro (La-Cierva) sin oponis al tio ke Alfonso la 13a rezignu la reĝan povon. Je la 21a horo kaj kvarono, nokte, la reĝo foriris destine al Kartageno por enŝipiĝi tie destine al Marsejlo.
En la madrida placo «Sunpordo», je 21a horo, Niceto Alcalá-Zamora, ekde la oficejo de la Ministro pri Internaj Aferoj proklamis la Respublikon al la tuta lando pere de la radio. Tiamaniere, unuafoje en la historio de Hispanio, stariĝis nova politika reĝimo sen sango-elverŝado.
De tiam oni multe debatadis pri la stranga maniero fali la monarkio pere de nur iu balotado por elekti la municipaj aŭtoritatoj, balotado en kiu, krome, la respublikistaj kandidataroj venkis nur en la urboj, ne en la plejampleksa kamparo de la lando. Do, por tiuj, kiuj ne konas la sociajn karakteraĵojn de ĉi tiu lando estas necesa ia ekspliko.
En la ĝeneralaj balotoj, t. e. por elekti la parlamentajn deputitojn, ofte la rura voĉdonintaro, kontrolita de la lokaj kacikoj, kompensis la rezultojn de la urbaj elektantoj. Tamen, en la municipaj balotoj ne okazadis tio ĉar la rezulton de la voĉdon-komputado oni aplikas en ĉiu aparta loko konkrete, kaj krome, oni povas diri ke unu municipa magistratano de Madrido aŭ Barcelono rangas same aŭ eĉ pli ol unu deputito en kio koncernas al la politika kariero. En ĉi tiu municipa nivelo, al la monarkio restis nur la kacikoj, kapablaj, kiel multe, de manipulado kaj artifikoj sed ne por alfronti iun veran vekiĝon de la landa publika opinio. Laŭlonge de la reĝado de la Alfonso la 13a ĉiam oni asignis malsaman gravecon al la balotaj rezultoj de la urbaj medioj kaj de la ruraj zonoj. En aprilo de 1931 la provincaj ĉefurboj donis klaran venkon al la kandidataroj de maldekstraro. Estas altsignifa tio ke en Madrido kaj Barcelono venkis la respublikistaj kandidataroj eĉ en la distriktoj klare burĝklasaj. En Andaluzio la Maldekstro venkis en la ensemblo de ĉiuj urb(et)oj de pli ol dek mil enloĝantoj. La reĝo, akorde kun siaj konsilantoj, konsultis la opinion de la generaloj, sed la disvolviĝo de la situacio igis lin fine elekti la ĉeson de la ekzercado de la reĝa povo kaj forlasi la landon.
En la sekvintaj jaroj Hispanio devis malkovri ke proskribi la monarkion ne signifis, nepre, la finon de la problemoj. Verdire, la problemaro rezulte de la krizo de 1929, kiu forbalais la monarkion, konservis sufiĉe da forto por endanĝerigi kaj fine forbalai ankaŭ la naskiĝantan respublikon.






Popola entuziasmo en la hispanaj urboj festante la proklamon de la Respubliko la 14an de aprilo 1931




# Dua hispana Respubliko




En la disvolviĝo de la Dua hispana Respubliko ekzistis tri klaraj etapoj: La unua estis la t. n. Maldekstra Jarduo (1931-1933), pri kiu ni okupiĝos en ĉi tiu ĉapitro. Poste ni pritemos la du ceterajn periodojn: Dekstra Regado (1934-1935**)** kaj Popola Fronto (Februaro-Julio 1936).

Post la ekziliĝo de la monarko, iu provizora registaro estis prezidata de Niceto Alcalá Zamora, kun respublikistoj el diversaj ideologioj kaj socialistoj. La provizora respublika registaro kunvokis balotadon por elekti Parlamenton kiu studu kaj aprobu novan Konstitucion. La balotado okazis la 28an de junio de 1931. Antaŭe, oni restarigis la universalan voĉdonadon kaj oni ebligis ke la virinoj povu esti elektataj, kvankam ankoraŭ oni ne koncedis al ili la rajton voĉdoni. Ankaŭ oni mallevis la plenaĝecon al 23 jaroj.

La 14an de julio la nova Konstitucianta Parlamento malfermis sub la prezidanteco de la socialisto Julián Besteiro. Oni interakordis krei Ĵuran Konsilantan Komisionon. Ĉi tiu, siavice, nomumis subkomisionon, preziditan de Ángel-Ossorio-y-Gallardo, kaj konstituita de specialistoj pri politika rajto, kiaj García Valdecasas, González Posada kaj Antonio-de-Luna. Sed estis la socialisto Luis-Jiménez-de-Asúa kiu, en la daŭro de 20 tagojn, pretigis la projekton kiu estis presentita en la Korteso la 27an de aŭgusto. La Konstitucia teksto konsistis el 121 artikoloj. Ĝia aŭtoro difinis ĝin kiel ***«maldekstra sed ne socialista Konstitucio»***, sed ĝia enkonduko tekstis: ***"La socialismo celas grandajn sintezojn; la socialismo volas igi ke la mondo estu unusola granda ŝtato; la Eŭropa Federacio, kaj eĉ tiu de la mondo, estas ĝia plej kara aspiro. Estas ni, la socialistoj, ne iu politika partio, sed iu civilizacio kiu alvenas, kaj ĝuste tio igis nin pensi pri totala kaj ne federacia, ŝtato".***

Post vigla debatado en la Parlamento, la Konstitucio estis fine aprobita la 9an de decembro de 1931 kun 368 favoraj voĉdonoj, neniu kontraŭa kaj 89 forestoj, tiuj kiuj ne konsentis ke Hispanio fariĝu laika ŝtato.

La fina teksto konsistis el 125 artikoloj grupigitaj en dek ĉapitroj kaj du transiraj disponoj. La unua artikolo deklaris ke: "***Hispanio estas demokratia Respubliko de ĉiutipaj laboristoj, kiuj organiziĝas en reĝimo de libereco kaj de justeco. La povo de ĉiuj ŝtat-organoj devenas de la popolo. La Respubliko konstituas totalan ŝtaton, akordigebla kun la aŭtonomeco de la municipoj kaj de la regionoj. La Respublika flago estos ruĝa, flava kaj viola***".

En la nova teksto oni proklamis la egalecon de la virino, kiu de tiam rajtis voĉdoni. Oni agnoskis, ekde la landa suvereneco, la regionan aŭtonomecon por artikigi la diversecon ene de la ŝtato. Oni formulis la sendependecon inter iu plenuma povo nomumita de la Prezidento de la Respubliko, kaj iu leĝ-dona povo de unusola ĉambro elektita laŭ universala voĉdonado, same kiel la municipoj. Oni difinis la ŝtaton kiel laika, sekve oni nuligis la pagadon de la kulto kaj la subvenciojn al la

religiaj ordenoj, al kiuj oni malpermesis la oficialan instruadon, kiu estis difinita kiel ŝtata rolo. Laŭ la Konstitucia teksto, la riĉaĵoj devas esti submetitaj al la intereso de la landa ekonomio kaj, se necese, la eksproprigoj estu farataj per pagado de monkompenso. Oni nuligis la specialajn jurisdikciojn, kiel la militistan kiun oni estis aplikante al civiluloj ekde la jaro 1906, kaj oni pliampleksigis la aplikadon de la ĵurio kadre de la leĝaro kiu kulminis la politik-juran sistemon kun la novaĵo de la Tribunalo de Konstituciaj Garantioj.

La Konstitucio deklaris ke la suvereneco estas popola kaj ke ĉiuj ŝtataj povoj devenas el la popolo. Oni proklamis la apartiĝon de la ŝtataj povoj kaj oni precizigis ke la registaro devas ĝui la konfidon de la Parlamento aŭ Korteso kaj de la Prezidento de la Respubliko. Oni inkludis en la Konstitucian tekston ampleksan ensemblon da bazaj rajtoj kaj publikaj liberecoj, inter kiuj elstaras la rajto al voĉdonado de ĉiuj hispanaj civitanoj sendepende de la sekso kaj la civila stato. Ĉi tio okazigis akran debatadon en la Parlamento. Oni leĝigis ankaŭ la eksedziĝon kaj la libereco pri opinio, kunveno, cirkulado, k. c.


Niceto Alcalá Zamora, unua Prezidento de la Dua hispana Respubliko.

La Konstitucio de 1931, de sekulara karaktero, starigis la liberecon pri kulto kaj samtempe nuligis ĉiun ajn ŝtatan helpon al la RomKatolika Eklezio kaj dekretis la malaperon de ĉiuj religiaj ordenoj kiuj postulus promeson de obeo al iu aŭtoritato krom la Respublika, kaj establis laikan instruadon. Alia el la grandaj novaĵoj enkondukitaj en la teksto de la respublika Konstitucio estis la afero de regionismaj postuloj, kreante iun statutaron pri aŭtonomiaj teritorioj kiu utilis kiel bazo por tiu alia kiun oni establis en la jaro 1978. La Tribunalo pri Konstituciaj Garantioj kompetentis pri konfliktoj inter la centra ŝtato kaj la regantaj organoj de la aŭtonomaj regionoj, la respondeco de la aŭtoritatuloj kaj altranguloj, la zorgado pri la indiduaj garantioj. La Konstitucia teksto atentis ankaŭ pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj de la gecivitanoj, samkiel pri la ebleco socialigi la privatajn posedaĵon. La 44a artikolo tekstis: "***La tuta riĉaĵo de la lando, kiu ajn estu ĝia posedanto, estas submetita al la interesoj de la landa ekonomio kaj rilatas al la subteno de la publikaj devoj, akorde kun la Konstitucio kaj la leĝoj. Ĉiutipa posedaĵo povos esti celo de deviga eksproprigo kaŭze de socia utilo aplikante konvenan monkompenson, escepte se dekretos alisence iu leĝo aprobita de absoluta parlamenta plimulto. Pere de samaj postuloj la propraĵo povos esti sociigita***".

Male ol antaŭaj hispanaj Konstitucioj, ĉi tiu de 1931 disponis ke la Parlamento aŭ Korteso konsistu el unu sola ĉambro, kies deputitoj estu elektataj per universala, rekta kaj sekreta voĉdonado. Ĝi devus kunveni dum kvin monatoj ĉiujare, kaj ili havus povon je leĝo-farado, kaj inter ties roloj aŭ fukcioj estis tiu de la elektado de la Prezidento de la Respubliko. Ĉi tiu, siaflanke, havis povon por deklari militon, rajtigi la dekretojn de la registaro, subskribi traktatojn, meti finon al la parlamentaj sesioj kaj dissolvi la Parlamenton ĝis dufoje.

La 9-an de decembro de 1931 la Korteso aprobis la Konstitucion de la Respubliko. Post tio, Azaña gvidis registaron formitan de koalicio de maldekstraj burĝaj respublikanoj kaj socialistoj. La registaro entreprenis leĝan laboron, kiun forte alfontris la tradiciaj fortoj ĝis tiam regantaj en Hispanio. La Katolika Eklezio kontraŭis la novan laikan leĝaron, fiksitan en la Konstitucio. La klopodoj de reformo de la Armeo trovis la oponon de granda sektoro de la militistaro. En la jaro 1932 estis puĉo de Generalo José Sanjurjo, kiu fiaskis. Fine de 1931 kaj komence de 1932 estis okazintaj en diversaj hispanaj lokoj tumultoj kaj mortoj inter policanoj kaj laboristoj. La maniero laŭ kiu la regantaro traktis tiujn eventojn malkontentigis Generalon Sanjurjon. Pro tio li preparis kun kelkaj karlistoj kaj iuj armeaj oficiroj, ribelon en Sevilo la 10a de aŭgusto de 1932. Ĝi sukcesis nur dekomence en Sevilo, sed absolute fiaskis en Madrido kaj poste ankaŭ en la andaluza ĉefurbo okaze de ĝenerala striko, pro tio li rezignis kaj fuĝis al Portugalio, sed oni arestis lin en Onubo kun sia filo. Li estis juĝita kaj kondamnita je morto, sed la respublika registaro ŝanĝis la kondamnon al dumviva mallibero, sed finfine li estis amnestiita en novembro de la jaro 1933 fare de la tiama dekstra registaro. Ĉiukaze Sanjurjo ne povis reveni al la armeo kaj iris al ekzilo al Portugalio.

La tre modera agrara reformo entreprenita de la registaro de Azaña estis bojkotata de la grandaj terposedantoj. La registaro dekretis ke tiuj riĉaj terposedantoj estu devigitaj kultivi la teron minacante pri ekspropriigo la nekultivitajn bienojn. La terposedantoj estis devigitaj kontrakti taglaboristojn el la sama municipo de la kultiveblaj teroj. Pro la malkontento okazigita de tiuj dekretoj, estis riĉaj terposedantoj kiuj financis la puĉo-intencon de Sanjurjo kiun ni jam menciis. Sed okazis ankaŭ ega elreviĝo inter la malriĉa kamparanaro, ĉefe en la sudaj regionoj de la lando. Okazis ribeloj de la anarĥiistoj, perforte sufokitaj. Azaña apartenis al la respublika meza klaso, ne socialisma. Li kaj liaj sekvantoj ne sentis entuziasmon pri la socialista programo. La Agrara leĝo ne inkluzivis leĝon de financado de kolektivaj bienoj, kiel la socialistoj postulis, kaj ne estis proklamita ĝis tre malfrue en 1932. Krome tiu leĝo estis mise redaktita. Resume, tiu Agrara leĝo de 1932 samtempe kaj samgrade malkontentigis la riĉajn terposedantojn kaj la malriĉajn kamparanojn. La registaro formita de Azaña en koalicio kun la socialistoj, devis alfronti la anarkiistojn de la CNT kun la revolucia ĝenerala striko kiel taktiko konstanta kaj konfliktoj kiuj evoluis al sangaj, perfortaj bataloj, kiel tiuj de ***Castil-blanco***, ***Arnedo*** kaj ***Casas Viejas.*** La registaro de Azaña faris malmulte en la aplikado de la Agrara leĝo: dum la unuaj du jaroj, nur 12.000 familioj en la tuta lando ricevis ter-pecon. Krome, Azaña apenaŭ reformis la sistemon je impostado por ke la ŝarĝo de la impostoj estu subportita de la riĉuloj. Cetere, la Registaro daŭre subtenadis la posedantojn de la tero kaj la industrio kontraŭ strikoj de la laboristoj kaj la agado de la sindikataj aktivuloj, ĉefe tiuj de la anarkiista organizaĵo **CNT**. Ĝuste estis anoj de tiu sindikato la viktimoj de la sanga konflikto de ***Casas Viejas.*** En la finaj jaroj de la periodo koincidas ekonomia krizo kaj procezo de radikaliĝo en ambaŭ flankoj de la politikaj movadoj. En 1932 la Parlamento aprobis Statutaron per kiu estis garantiita aŭtonoman regadon en Katalunio. Francesc Macià estis elektita unua Prezidento de la kataluna registaro. La kataluna statutaro establis formulojn por la kunvivado en ŝtato kun diversaj naciecoj. La ***Generalitat*** fariĝis referaĵo de demokratia leĝeco kaj Katalunio komencis vojiron de memregado. Alia reformo entreprenita de la registaro de Azaña estis tiu de la armeo. Por la lando estis grava ŝarĝo la armeo heredita el la monarkio, tre saturita je oficiraro. Tio kaj libereco pri religia kulto pliintensigis la rifuzon al Respubliko fare de la tradiciaj sektoroj de la lando. Krome inter la tagoj 10a kaj 13a de majo de 1931 estis en kelkaj lokoj, ĉefe en Madrido, kontraŭ-klerikara perforto, kun bruligado de monaĥejoj.

En la ĝenerala balotado de novembro de 1933 rezultis venkitaj la politikaj fortoj regintaj dum la du antaŭaj jaroj. La malkontento de la sektoroj de mal-dekstraro damaĝis la socialistan partion, kiu estis partopreninta en la registaro de Azaña. La elrevigita voĉdonantaro de maldekstro apogis la kandidatarojn de la Radikala Partio gvidita de Alejandro Lerroux, iu politika forto pseŭdo-maldekstra estr-ita de oportunisma kaj senskrupula politikisto. La voĉdonantaro de la dekstraj sektoroj kuncentriĝis en la apogo al iu koalicio, nomita **CEDA** (Hispana Konfederacio de Aŭtonomaj Dekstraroj) estrita de José María Gil-Robles. Tiu koalicio ĝuis la ĝeneralan apogon de la dekstrema burĝaro inkludante la monarkistoj, kaj la stilo de ĝia politiko sufiĉe imitis la tiam laŭmodaj faŝismoj de Italio kaj Germanio. Ekzemple, la sekvantoj de Gil-Robles salutadis lin per la titolo de ***Führer***. En historiistaj medioj oni spekulas pri la influo, sur la balota venko de la dekstraro, de la ina voĉdono; en tiu balotado de 1933, unuafoje en la historio, povis voĉdoni ĉiuj virinoj, kaj oni pensis ke, eble pro religiaj kialoj, plejparto el ili donis sian apogon al la politikaj fortoj de dekstraro, kvankam ili ricevis la voĉdon-rajton el la maldekstraro.



La komenca popola entuziasmo pri la Respubliko suferis elreviĝon pro okazintaĵoj kiel tiu de Casas Viejas



# LA REVOLUCIO DE OKTOBRO 1934

Oni devas precizigi ke la anstataŭo de Azaña far Lerroux estis okazinta jam antaŭ la balotado de novembro de 1933, konkrete, la 12an de septembro. La respondeculo de la politika krizo estis la Prezidento de la Respubliko, Niceto Alcalá Zamora kiu, laŭlonge de la revolucia jarduo 1931-1933 malamikiĝis kun la registaro de Azaña, kiun li konsideris tre influita de la Socialista Partio. Do, la Prezidento, uzante la rajton kiun li havis laŭ la Konstitucio, sed troigante en ties uzado, elektis Lerroux-n kiel novan registrar-prezidenton. Dum tiu mallongdaŭra etapo de Lerroux en tiu posteno li ne povis multe ŝanĝi la faritan laboron de la revolucia jarduo. Sed, kiel ni vidis en la antaŭa ĉapitro, en la hispana socio estis maturiĝante la kondiĉoj por ebligi la reagon de la desktremaj politikaj fortoj.

Iu malvenko de Lerroux en la Parlamento elektita en 1931 igis ke li ne povis prezidi la neeviteblan ĝeneralan balotadon. Anstataŭis lin en la prezidanteco de la registaro Diego Martínez Barrio. Sed la rezulto de la balotado de novembro de 1933 kreis novan politikan situación. La dekstremaj partioj sukcesis unuiĝi en komunan kandidataron, tiun de la **CEDA**, dum la respublikistaj fortoj dividiĝis inter tiuj kiuj ne hezitis koalicii kun la socialistoj kaj tiuj, kiel Lerroux, kiuj preferis koalicii kun la dekstraro. La programo de la dekstra koalicio gvidata de Gil Robles enhavis proponojn pri reformo de la Konstitucio kaj defendo de la ekonomiaj interesoj de la ter-posedantoj.

Rezulte de la balotado de novembro 1933 la Prezidento Alcalá Zamora troviĝis antaŭ ne-dezirita por li situacio. La dekstraro atingis faktan venkon (53 procento el la voĉdonoj). Sed plej grave estis ke la maldekstraro estis, kiel dirite, dividita. Lerroux akceptis prezidi registaron kun la apogo de la **CEDA** de Gil Robles. Krome la pribalota sistemo favorigis ĉi-lastan. En Parlamento kun 470 sidlokoj la unuigita dekstraro kontrolis du cent. Do la oportunista Lerroux povis regadi nur kun la apogo kaj konsento de la faŝistoida Gil Robles.

En aliaj cirkonstancoj eble la respublika reĝimo estus atinginta ian stabilecon surbaze de la modera respublikismo de la partio de Lerroux, sed kun la alta grado je politika mobiliziĝo de Hispanio en la jardeko de 1930 kaj la amasigo de la ekzistantaj problemoj surprizigas tio ke Lerroux sukcesis kunlabori dum tiom da tempo kun iu politika grupo kiu reprezentis la malon de ĉio kion signifis pasintece la maljuna estro de la radikalismo.

Ne estas facile difini kun precizeco la ideologian enhavon de la **CEDA**. Iuj insistas pri ĝiaj faŝistaj aspektoj, aliaj difinas ĝin kiel konservativan naciismon. La gvidantoj de la partio, ĝenerale, montris respekton pri la respublikaj institucioj, almenaŭ publike, sed ĝi ĝuis la apogon de ampleksaj monarkismaj sektoroj kaj de plejparto el la klerikaro kaj la katolikaj amasoj. Ĉefe, tiu partio estis la politika peranto de la posedantaj klasoj de la socio. Sed la faktoro kiu eksplikas la unuecon de tiom da diversaj tendencoj estis la persono de Gil Robles, la ĉefa lidero de la dekstrara koalicio. Li estis deputito laŭ Salamanko kaj Ĉefinstruisto pri Politika Rajto. Li sciis gvidi la dekstraran partion sed kelkfoje kondutis kiel danĝerulo por la respublika reĝimo kaj ofte eraris en sia interrilato kun la Prezidento de la Respubliko. Jam dekomence la kunlaborado de radikalistoj kaj cedistoj estis tre malfacila: ekde decembro de 1933 kaj aprilo de 1934 estis kelkaj ministraj krizoj kaj du malsamaj registaroj. La ĉefa protagonisto de tiu etapo estis la malstabileco. Lerroux fiaskis en sia intenco alveni al interkordo kun la Eklezio. Estis redonitaj al la nobelaro la posedaĵoj konfiskitaj dum la regadetapo de Azaña. Tamen Lerroux ne satigis la aspirojn de

la **CEDA** kaj dume la kontraŭdiroj de lia kunlaboro kun tiu dekstrara koalicio okazigis la rompiĝon de lia radikalista partio: Martínez Barrio estris la disidentojn de la grupo de Lerroux. Krome estis ankaŭ malakordo inter la **CEDA**-lideroj kaj la Prezidento Niceto. La dekstrara koalicio volis plenumi ĝian balotan promeson pri amnestio sed al Niceto Alcalá Zamora ne plaĉis la revenon al la armeo de la ribelintoj de aŭgusto-1932. La konflikto solviĝis favore al la **CEDA** kaj tio signifis la finiĝon de la registaro de Lerroux. Lia anstataŭanto, Ricardo Samper, estis respektita nek de la dekstraro nek de la maldekstraro. La Socialista Partio, subgvide de Largo Caballero, radikaliĝis kaj sin aplikis al la radikaligo de la amasoj. Oni argumentadis pri la ekzistado de "faŝista danĝero", pri kiu ne interakordis ĉiuj socialistaj lideroj, kiel, ekzemple, Besteiro.

Tamen al la Socialista Partio mankis revolucia konspiracia tradicio. Ĝia prepariĝo por la revolucia ribelo estis publika, tute ne sekreta afero. Ĝia presorgano predikadis "malamon al la kriminala burĝaro" kaj dume ĝiaj gvidantoj deklaradis ke la respublika demokratio jam ne plu utilis al ili. Kaj dume la fakta prepariĝo por la revolucia agado estis preskaŭ nula. Fakte, la socialistoj nur paroladis pri revolucio anstataŭ organizi ĝin. La registaro facile malkovris en Asturio arsenalo-ŝipon destinita al la revoluciuloj. Kaj al la movado mankis ankaŭ difinita plano aŭ programo.

Dume estiĝis iu grava konflikto inter la ŝtata aŭtoritato kaj ties de la la Kataluna aŭtonomaĵo. La malakordo komence havis nur administran, juran karakteron, sed baldaŭ evoluis al politika interfrontiĝo de ambaŭ regantaraj entoj. Kaj kvankam la rezulto ne tiel estis grava, ankaŭ en Eŭskio estis priaŭtonomecaj problemoj fine de 1933 kaj komence de 1934.

La **CEDA**, sen kies apogo la radikalista partio ne povus regi, premis la registaron por ke ĝi ne estu fleksebla en la konfliktoj kun la aŭtonomaj regionoj, ĉefe Katalunio. Kaj fine Gil Robles provokis kroman registaran krizon postulante partoprenon de la **CEDA** en la regado. Tiu partopreno konkretiĝis en la eniro en la registaron de tri ministroj de la dekstrara koalicio. Por la maldekstraro tio ĉi estis kvazaŭ provoko. Prave, la progresistaj fortoj timis ke la maniero aliri la dekstraro al la kontrolo de la ŝtato sufiĉe similis al tiu de la faŝismo en Italio, Germanio, Aŭstrio… Tiu timo eksplikas, eĉ se ne pravigas, la revolucian ribelon de socialistoj, komunistoj kaj aliaj maldekstruloj kontraŭ la leĝeco de la Respubliko.

En la unuaj tagoj de oktobro 1934 okazis serio da eventoj mezvoje inter la barikadoj kaj la insurekcia strikado. En plejparto el la lando estis nur striko en kiu la partopreno ne estis kompleta. En Madrido okazis nur iuj malgrandaj incidentoj far iuj amasoj al kiuj mankis armiloj kaj sperto por ilin uzi. En Eŭskio la ministoj kontroladis la zonon sed ili nur patroladis tra la teritorio dum la ŝtataj policaj fortoj provizore retiriĝis por eviti alfrontiĝon kaj reveni poste, kiam la movado estus finita.

La escepto estis konstituita de la gravaj okazintaĵoj en Katalunio kaj Asturio. La Kataluna Prezidento Companys, sukcedinto de Maciá, estis preterpasita de la plej radikala katalunismo tiamaniere ke la situacio igis lin konduti ŝajne ne kalkulinte la sekvon de sia agado. Li proklamis ian "katalunan ŝtaton ene de la hispana federacia respubliko". La konfuzo estis totala kaj la manko de armilaj rimedoj estis evidenta. Companys, kiu dirante defendi la Respublikon faris proklamon klare kontraŭkonstitucian de federacia Respubliko, devis resti je la defensivo, eĉ sen la apogo de la laborista maldekstraro. Parto el la CNT-sindikato strikis kontraŭ la hispana registaro sed ne favore al la Kataluna Federacio, kaj la oficiala CNT restis merĝene de la konflikto ne helpante la ribelintojn. La Kataluna regantaro baldaŭ devis kapitulaci antaŭ Generalo Batet kiu, estante respublikista militisto, ne dubis pri kie estas la leĝeco.

Estis nur en Asturio kie la okazaĵoj pli similis al tio kio oni interpretas pri la termino "revolucio". Nur en tiu regiono ekzistis kompleta kunlaborado de ĉiuj maldekstraj fortoj kaj kie oni prenis disponojn pri organizado de revolucia movado. La du ĉefaj sindikataj fortoj UGT kaj CNT interakordis "por aboli la burĝan reĝimon". La revoluciuloj sukcesis konstitui 14 armildeponejojn kaj krome ili disponis je abunda dinamito. Dank´al tio ili baldaŭ sukcesis kontroli la ministajn terzonojn kaj lasante tuj sieĝitan la regionan ĉefurbon Oviedon, kiu rezultis parte detruita en la sekvaj bataloj. Kvankam oni ne efektivigis la okupadon de la urbo, oni kalkulas ke la ribelintoj disponis je proksimume tridek mil batalantoj, do estis necese sendi al Asturio armeon je 18.000 soldatoj, parto el ili venintaj el la milita zono de Maroko, kiuj realigis veran okupadon de la provinco pere de serio da militistaj operacioj. Tiuj operacioj estis efektivigitaj de kvar militistaj kolonoj, tiu de Yagüe elŝipiĝis en Gijón, tiu de López Ochoa, antaŭenmarŝis de la ŭesto, tiu de Solchaga el la easto kaj tiu de Bosch-Balmes stariĝis en la sudo. Ĉiuj kvar armeaj kolonoj dediĉiĝis al la submetigo de la ministoj laŭ la gvidado kiun faris Generalo Franko (Francisco Franco) ekde la plejsupera armea stabo en Madrido. La rehavo de la kontrolo far la armeo postulis kelkajn semajnojn da intensa kaj sanga batalado.

Iasence oni povas diri ke la revoluciaj eventoj antaŭanoncis la civilmiliton: la apero de milicoj, la formiĝo de lokaj komitatoj kiel supera politika aŭtoritato, la uzado de la perforto, plejofte kontraŭklerikala, kaj eĉ iu revolucia dispono, kiel la abolo de la mono realigita de la anarkiistoj. La homaj viktimoj estis sufiĉe multenombraj, mortis proksimume mil kvincent personoj, kaj la perforto realigita de ĉiuj batalantoj kreis abismon inter ambaŭ sektoroj de la hispana socio. Multaj revoluciuloj estis enkarcerigitaj, sed krom tio, la politikaj sekvoj ne estis tro gravaj por la maldekstraro, la socialista kaj komunista partioj ne estis eksterleĝitaj, male ol estis okazinte en Aŭstrio en similaj cirkonstacoj, kaj la Ka-taluna aŭtonomec-statutaro estis provizore ĉesigita sed ne abolita.

Sed rezulte de la revolucio estis gravaj konfliktoj en la Parlamento dum la tempodaŭro inter oktobro de 1934 kaj la registrara krizo de aprilo de 1935. Estis konfliktoj kaj interfrontiĝo kiuj kontribuis malfaciligi la kun-

laboradon inter la radikalista partio kaj la **CEDA**, kaj samtempe provokis kontraŭdirojn kaj dividon inter la malsamaj sektoroj de la dekstrara koalicio. Gil Robles provokis novan registaran krizon en aprilo de 1935 celante pliigi sian povon. La okazo estis maloportuna. Kiam Lerroux kaj la Prezidento de la Respubliko volis amnestii la asturan socialistan deputiton González Peña, kiu estis mort-kondamnita pro ties interveno en la Oktobra Revolucio, Gil Robles ordonis al la ministroj de la **CEDA** voĉdoni kontraŭ tiu dispono kaj tiamaniere provoki la registaran krizon. Dum unu monato regis iu ministraro kiu havis nur teknikan signifon dum la du partioj de la reganta koalicio pridiskutadis novan formulon de interakordo. Fine Lerroux formis novan registaron en kiu la partopreno de la **CEDA** estis eĉ pli granda ol en la antaŭa: kvin ministroj, inter kiuj estis Gil Robles mem. Tamen eĉ kun tiu pligrandigita povo la dekstraro ne sukcesis plenumi la du reformojn kiuj ĝi celis: la konstitucia kaj la pribalota. Se la maldekstraro estis malsukcesinta intencante promocii eksterleĝan, revolucian solvon, la dekstraro fiaskis en la laŭleĝa realigado de siaj politikaj postuloj. Aliflanke kreiĝis ia abismo inter la Gil Robles kaj la Prezidento de la Respubliko, kiu pli kaj pli estis timanta la plifortiĝon de la povo de la lidero de la **CEDA**. En la terenoj en kiuj la agado de la nova registaro ne estis sterila ĝi estis kontraŭsocia, kio ne kontribuis plifortigi la simpation de la amasoj al tiu regantaro. Grava problemo de la socio daŭre estis la alta grado je senlaboreco.



**Alejandro Lerroux**



**José María Gil Robles**

Al ĉiu-ĉi problemaro aldoniĝis la eksplodo de administraj skandaloj de la radikalistoj. El nova registara krizo, krome komplikita pro la troa interveno de la Prezidento de la Respubliko, eliris nova regantaro gvidata de Chapaprieta, ĝistiama ministro pri Financoj. Tiu-ĉi nova registar-prezidento estiu nur homo de la Prezidento, kiu trudis lian nomumon, sen ia ajn apogo de iu el ambaŭ partioj de la koalicio. Tiom da krizoj kaj la manko de fakta registara laboro estis anoncante la finan kolapson de la koalicio radikalist-cedista, sed la vera drono de tiu politika formulo venis okaze de la publika ek-kono de la administra koruptado de la radikalistoj. La unua skandalo okazis en oktobro de 1935.Temis pri la afero de du fremdaj friponoj (Strauss kaj Perl) kiuj, kun la apogo de influopovaj radikalistoj, organizis iun tipon je trompa ruleto-ludo. El la nomoj de tiuj du ekster-landanoj –***Strauss*** kaj ***Perl***– formiĝis tiam en la hispana lingvo nova vorto, kiu restis sufiĉe uzata ĝis la nuntempo, –***estraperlo***– kun la signifo de "trompo", "fraŭdo", "nigra merkato", "kaŝ-komerco"…

Al la malakordo inter ambaŭ partioj de la reganta koalicio aldoniĝis ankaŭ malakordo kaj kvereloj interne de ambaŭ partioj la radikalistoj kaj la **CEDA**. Fine, en novembro de la jaro 1935 aperis nova kaj pli grava kazo de administra koruptado de la radikalistoj, kaj tio estis la definitiva bato al la jam mortanta koalicio radikalist-cedista. Chapaprieta devis demisii en decembro de 1935. La nova krizo prezentis la eblecon, ĝis tiam nepensebla, ke Gil Robles fariĝu registar-prezidento, sed tiu solvo ne povis konkretiĝi pro la absoluta rifuzo de Alcalá Zamora, Prezidento de la Respubliko, kiu estis tute ne akordigebla kun la lidero de la **CEDA**. Kiam Gil Robles petis la povon por li mem Alcalá Zamora troigante pluanfoje en siaj konstitucia funkcioj preferis elekti nekonatulon por gvidi registaron. Ŝajnas ke la lidero de la **CEDA** kontemplis tiam la eblecon puĉi kontraŭ la respublika leĝeco kaj tiucele li konsultis kelkaj arme-estrojn.

Do, estris du sinsekvajn registarojn, laŭ decido de la Prezidento, Portela Valladares, kiu eĉ ne estis parlamentano. Oni mendis al li krei kaj organizi centrisman politikan forton, sed tio jam ne eblis en la tiama politika situacio de la lando kaj oni devis eksigi la Parlamenton kaj kunvoki novan balotadon. La bilanco de tiu dua jarduo de la Respubliko estis sterileco kaj malstabileco. Pri la sterileco kulpis la partioj de la reganta koalicio: radikalistoj kaj la dekstraro, kaj pri la malstabileco kulpas, ĉefe, la opozicio, la maldekstraro, kiu ribelinte kontraŭ la respublika leĝeco provizis pravigajn argumentojn al la reakciularo kiun ĝi volis kontraŭstari.




La ĝenerala balotado de februaro de la jaro 1936 okazis estante Registar-Prezidento Portela Valladares. Por kompreni la rezulton de tiu balotado estas necese koni la politikajn fortojn kiuj kontraŭfrontiĝis tiam.

Pri la Socialista Partio oni devas rimarkigi ke la alveno de la Dua Respubliko alportis al ĝi grandan kreskon dum malgranda tempodaŭro (1.041.000 aliĝintoj en 1932) fariĝinte la unua socipolitika forto en la lando. La anarĥiista sindikato CNT havis 800.000 membrojn fine de 1931. Unu el ĉiu kvar laboristoj estis senlaborulo. Tio-ĉi eksplikas la tiaman radikaliĝon de la bazo de la partioj kaj la sindikatoj. Tiu radikaliĝo okazigis, interne de la Socialista Partio, la aperon de diversaj tendencoj kiuj malsimilis inter si pri la grado je batalemo kaj kontraŭstaro al la kapitalisma sistemo. Besteiro lideris la plej moderan el la tri sektoroj en kiuj dividiĝis la partio. La aliaj du sektoroj estis gvidataj de Prieto kaj Largo Caballero. Ĉi lasta, kvankam tre ŝanĝiĝema, estis la plej radikala. Li tre klopodis la implikiĝon de la Socialista Partio en la Oktobra Revolucio de 1934. Ene de la plej radikala socialista sektoro elstaris la junularo de la partio. Fakte, tiu junularo, subgvide de Santiago Carrillo, entreprenis, en aprilo de la jaro 1936 sian unuiĝon kun la komunista junularo.

La anarkiista sindikato CNT daŭre havis tiam grandan membraron sed, unuafoje en la historio, la membraro de la socialista sindikato UGT estis pli granda, kaj krome la nebatalema pozicio de la CNT dum la Oktobra Revolucio (kun la escepto de Asturio) montris ke la anarkiistoj perdis ankaŭ la socian liderecon de la revolucia radikalismo. Krome konsiderinda parto el la anarkiistaj aktivuloj, lideritaj de Andrés Nin, fariĝis membroj de la tiam kreskanta Komunista Partio.

Ĝis tiam la komunista membraro estis sufiĉe malgranda kaj tre sektisma. Dum tuta jardeko, ekde la fondiĝo de la partio en 1920 la KP penis superi tiun karakteraĵon kaj estis nur sub la partia gvidantaro José Díaz, Dolores Ibárruri…, kiu anstataŭis tiun de Bullejos, kiam la komunista organizaĵo fariĝis sufiĉe alloga por esti referaĵo de la maldekstra sektoro de la Socpartio. Ekde la somero de 1934 la komunistoj komencis proponi sinceran politikon de paktoj kun aliaj organizaĵoj. En la jaro 1931 la Kompartio atingis nur 60.000 voĉdonojn kaj en 1933 estis jam 400.000 kaj atingis unu deputiton. La kompleta unuiĝo de la partioj Socialista kaj Komunista okazis nur en Katalunio.

Rilate al la dekstraraj politikaj fortoj, la influo de la ekstrema dekstraro en Hispanio ĉiam estis forta, sed la faŝista tipo estis ankoraŭ malgrava ĝis la komenciĝo de la jaro 1936. La falangista partio, liderita de José Antonio, filo de la diktatoro Miguel Primo-de-Rivera, havis influon dum ĝiaj komencaj jaroj nur en la gestudentaj medioj. Poste tiu partio ege kreskis ĉefe post sia unuiĝo kun kelkaj aliaj similaj organizaĵoj. Tiu falangista partio tre estis imitanta, ĉefe en la liturgiaj gestoj, de la itala kaj germana faŝismoj sed kun ia katolika komponaĵo pli akcentita. Oftis perfortaj incidentoj de membroj de tiu partio kun maldekstruloj. En la balotado de 1933 la falangista partio atingis du deputitojn.

En la hispana dekstraro estis ankaŭ monarkiismaj organizaĵoj. Krom la karlismo neniam tute malaperinta, estis krome la partianoj de la borbona dinastio reĝinta ĝis aprilo de 1931. La inklino al tiu politika pozicio estis speciale forta inter la militistaro. Sed plejparto el la fortoj de dekstraro daŭre estis enkadrigitaj, komence de la jaro 1936, en la CEDA-koalicio.

Por kompletigi la kadron de la politika situacio en Hispanio kiam estis kunvokita nova ĝenerala balotado, oni devas mencii ke Azaña aranĝis politikan formacion "Respublikista Maldekstro" kun influo en burĝaj intelektularaj sektoroj, kaj ke Martínez Barrio kreis similan organizaĵon nomatan "Respublikista Unio" kies politika klientaro estis ĉefe devenintoj el la radikalista partio elreviĝintaj de Lerroux pro ĉi ties kunlaborado kun la CEDA. Kvankam ĉi lastaj du partioj estis sufiĉe similaj estis inter ili granda diferenco en kio koncernas al la preteco kunlabori kun la socialistoj. Ja, tiu kunlaborado estis nepra por Azaña sed Martínez Barrio ne inklinis al ĝi, eĉ se poste li cedis.

Menciendas ankaŭ ke Andrés Nin kaj ties komunistaj eks-anarkiistaj sekvantoj, reage al la stalinismo de la hispana Kompartio forlasis ĝin kaj fondis apartan, trotskisman, rondon, nomatan POUM.

En grandaj publikaj mitingoj Azaña postulis la kunlaboradon kun la socialistoj. Dume ankaŭ la komunistoj postuladis kunlaboradon de ĉiuj politikaj fortoj de maldekstraro. Ene de la socialistaj vicoj, unue Prieto kaj poste ankaŭ Largo Caballero akceptis tiutipan kunlaboradon. Tiamaniere oni avancis al pribalota koalicio kiu baldaŭ alprenis la nomon de "Popola Fronto". Eĉ tiuj anarĥiistoj kiuj neniam estis voĉdonintaj, komprenis la neceson apogi balote la maldekstraron kontraŭ la faŝismo kaj la CEDA. En la pribalota kampanjo la Popola Fronto emfazis la neceson de la venko de maldekstraro por efektivigi la liberigon de la arestitoj okaze de la Revolucio de 1934. En tiaj cirkonstancoj la

Popola Fronto rezultis esti la plej taŭga ilo por atingi pribalotan venkon, kvankam poste rezultus ne tiel taŭga por plenumi la regadon. Tiu koalicio kapablis unuigi fortojn tre heterogenajn ne malkovrante la realajn diferencojn de la komponaĵoj. Ja, ne okazis interakordo inter partioj tiel malsimilaj kiel ties de Martínez Barrio kaj la POUM, sed okazis ke la respublikistoj interakordis kun la socialistoj kaj siavice ĉi tiuj faris la samon kun la grupoj meldekstre de ili. Neniam ekzistis, dum la balotkampanjo, lokaj komitatoj de la Popola Fronto kiuj montrus nereversigeblan unuiĝon, kaj ankaŭ ne mitingoj en kiun oni puvus konstati la egajn diferencojn inter, ekzemple, Nin kaj Azaña. La pribalota programo rezultis esti katalogo de diferencoj inter la respublikista kaj tiu pli maldekstra en tre esencaj aferoj kiel la agrara reformo aŭ la publika ordo, sed, almenaŭ kompare kun tio okazanta en la dekstraro ĝi estis vera resumo de regadcelo, nur iomete pli progresista ol tiu de la periodo 1931-1933. Azaña ne hezitis sin proklami burĝulo, kaj foje li evitis la esprimon “Popola Fronto” kaj preferis tiun pli ĝeneralan de “maldekstra koalicio”.

Laŭlonge de la balotkampanjo, la maldekstraj kandidatoj, esceptante tiujn de la sekvantoj de Largo Caballero, estis sufiĉe moderaj kaj ŝajnis ke ili estis je la defensivo kontraŭ la reakciularo. Eble ili ne kredis je la ebleco atingi la balotan venkon kiun ili fakte atigis. La rapida ellaborado de la kandidataroj kaj la disciplino kun kiu ili estis akceptitaj evitis la disiĝon de la maldekstrara voĉdonaro kiu okazis en la dekstraro.


Manuel Azaña

La situacio de ĉi tiu, ja, estis tre malsimila. La sperto el la dua jarduo montris al la diversaj fortoj enkadrigitaj en la CEDA ke la diferencoj inter ili estis tre gravaj. La ellaborado de iliaj kandidataroj estis tre komplika. Gil Robles hezitis inter alproksimiĝi al la fortoj de ekstrema dekstraro aŭ tiuj pli moderaj. Fine li aranĝis akordon kun la tiama Registrar-Prezidento, la centristo Portela Valladares. Ellaborante la kandidatarojn ne eblis kontentigi la monarkiistojn kaj la falangistojn.

La balota rezulto konstituis kompletan surprizon. Konsiderante la voĉdon-nombro, Hispanio aperis en februaro de 1936 dividita en du tendencojn simile grandaj, sed la parlamenta rezulto ne respegulis tiun ekvilibron, sed asignis konfortan plimulton al la Popola Fronto. Portela Valladares demisiis kiel Prezidento de la Registaro ne atendante, kiel li devus, la malfermon de la nova Parlamento. Por anstataŭi lin tuj estis nomumita Azaña, kiu, ĉi foje, havis pli da fidelaj parlamentanoj ol dum la unua jarduo.

Dum la balotado kaj en la procezo de asignado de parlamentaj aktoj estis incidentoj kiuj rezultas malfacile kompreneblaj por la nuntempuloj. Oni devas konsideri ke en tiu epoko ne ekzistis io simila al la nuntempaj identkartoj por certigi la identecon de la voĉdonantoj. En tiu balotado de 1936, same kiel en ĉiuj antaŭaj, voĉdonis multaj mortintoj, kaj estis malregulaĵoj ankaŭ en la distribuo de la parlamentaj akredit-dokumentoj. La kacikismo kaj ĉi ties metodoj estis planto malfacile elradikigebla dum multe da tempo en nia lando. Ĉi-foje, tio kaj la sekvaj disponoj de la registaro tro kontribuis venenigi la interrilatojn de la du politikaj sektoroj en kiuj dividiĝis la hispana socio. La registaro amnestiis la asturajn revoluciulojn de 1934 sed ne la militistojn kiuj eksterleĝe agadis perforte en tiu okazo. La Prezidento de la Respubliko mem estis alia viktimo de la sektismo de la regantoj de la Popola Fronto. Alcalá Zamora konfliktis kun la registaro pro iu afero ne tro grava. La gvidantoj de la Popola Fronto povis pensi ke la Prezidento pretis kontraŭbatali ilin kaj decidis elpostenigi lin. La uzita proceduro por tion fari ŝajnas ne klare laŭkonstitucia. Multaj membroj de la Popola Fronto ne aprobis tiun metodon sed ili faris nenion por eviti ĝin. La ĉefa responsulo de tiu decido estis Azaña, kiu anstataŭis Niceton kiel Prezidento. Tio solvis neniun problemon sed tute male, malplibonigis la politikan situacion de la lando. Iompostiom la publika ordo malboniĝis; abundis la perfortaj atencoj fare de la plej ekstremistaj grupoj de la dekstraro kaj maldeskstraro.

Kiel Prezidento de la registaro estis elektita Casares Quiroga, amiko de Azaña. Lia regad-etapo karakteriĝis pro nekapablo alfronti la problemojn de la lando, ĉefe tiu de la socia kunvivado. La registaro decidis ŝanĝojn de armeaj estroj pri kies fideleco al la Respubliko ĝi ne fidis, ekzemple, la Generalo Franko estis destinita al la garnizono de Kanariinsularo. La Kataluna aŭtonomeco estis restarigita sed la priaŭtonomecaj postuloj –eĉ en regionoj kie antaŭe ne estis tiutipaj zorgoj– preterpasis la kapablon de la registaro –kaj eĉ de la sistemo mem– plenumi ilin.

La etoso de socia interfrontiĝo kaj la sento de danĝero de militista puĉo kontraŭ la Respubliko generis ian militistigon de la politikaj organizaĵoj. Ja, preskaŭ ĉiuj amasorganizaĵoj pretis krei militistecajn taĉmentojn. La karlistoj, kun longa sperto en tia agado, havis jam en 1932 proksimume 25.000 membrojn enkadrigitajn en tiaj batalpretaj organizoj. La komunistoj en 1936 havis preskaŭ 4.000 aktivulojn en sia milico. Ankaŭ la socialistoj komencis organizi sian milicon en 1932, kaj io simila okazis kun aliaj socipolitikaj fortoj; anarkiistoj, falangistoj… Verdire, ĉiuj-ĉi armitaj taĉmentoj havis kapablon nur por perturbi la publikan ordon, ne por alfrontiĝi kontraŭ la armeo. Sed la perturbado de la publika ordo fariĝis vera problemo de socia kunvivado. La interfrontiĝo de la armitaj taĉmentoj de la dekstraro kaj maldekstraro okazigis en la unuaj monatoj de la regado de la Popola Fronto proksimume 350 mortigitojn, sufiĉe supera al la nombro de 200 mortigitoj okazinte en Italio antaŭ la alpreno de la povo far Mussolini. Krome en la kazo de Hispanio oni devas aldoni la antaŭajn politikajn viktimojn, tiujn de la Revolucio de 1934 kaj ĉi ties sufokigo. Laŭ la

pasado de la semajnoj la spiralo de la socia perforto ŝajnis nehaltigebla. Krome la politikaj murdoj estis akompanitaj de detruado, ĉu de preĝejoj en la kazo de la maldekstrara perforto, aŭ de agrokulturaj maŝinoj de okupitaj farmoj en la kazo de la faŝismaj atencoj.
Ja, la perforto estis efektivigita de ĉiuj politikaj tendencoj. La amasoj de la Popola Fronto bruligadis preĝejojn kaj ĵurnalejojn kaj sidejojn de la dekstraro, dum la falangistoj metis bombojn en sindikatajn ejojn kaj intencis murdi elstarulojn kiel Jiménez-de-Asúa kaj Ortega-y-Gasset. Estas malfacile determini kiu estis la ĉe-fa kulpanto de tia perforto. Ĉiukaze ambaŭ perfortoj atestis pri la nekapablo de la registaro meti efikan solvon al ĝi. Estis ankaŭ kazoj de perforto blinda, spontana, fare de ne organizitaj amasoj.
En tiu kunteksto okazis la malleĝigo de la Falange kaj la aresto de ties lidero José-Antonio Primo-de-Rivera. Okaze de iu eksterleĝa okupado de farmo fare de kamparanoj la Civila Gvardio okazigis dekunu mortigitojn. Ĉiuj ĉi kazoj kontribuis pli kaj plu malbonigi la sociajn interrilatojn en la lando. En la politika tereno estis evoluo al la ekstremoj de ambaŭ flankoj. Multaj socialistoj aŭ senpartiaj laboristoj aliĝis al la Komunista Partio dum en la dekstraro la lidereco de Gil Robles malfortiĝis favore al la pli agresema Calvo Sotelo.
Estis en monato Julio kiam okazis la eventoj kiuj provokis la komenciĝon de la civilmilito. Unue estis murdita iu konata policisto de maldekstraro, la Leŭtenanto Castillo, kaj poste, kiel reago estis murdita, far ekstremistaj maldekstruloj, la deputito Calvo Sotelo. Malmultajn tagojn poste, la 17an de Julio, okazis la ekribelo de la armeaj trupoj en Maroko kaj sekvinttage multaj militistaj garnizonoj en la landa territorio agis same. Estis la komenciĝo de enlanda milito kiu meritas apartan pritrakton, kiun ni faros per sekva ĉapitro. Sed ĉar ĉi teksto estas prihistoria studo decas ke ni eltiru el ĝi ian instruon. Ni entreprenis ĉi studon de vidpunkto de la hispanaj konstitucioj, kaj ĝis nun nia raportado montris nur la senĉesan malsukceson de la enradikiĝo de la konstituciismo en Hispanio. Kiam ni alvenas al la fiasko de la Dua Respubliko, eĉ konsiderante kion multe influis en tiu procezo la tiama ekonomia krizo, ni devas tamen substreki la fakton, sufiĉe konstatitan, ke dum la preskaŭ unu jarcento kaj duono ĝis nun priraportita, oni ne perceptis en la hispana socio la ekziston de konstituciisma kulturo. Tio estas, tiel por la superregantaj klasoj kiel por la sociaj sektoroj kiuj celis kontraŭstari la klasan superregadon, la konstitucioj, kiam oni sukcesis starigi iun, ne estis konsideritaj kiel respektindaj leĝaj kadroj por la kunvivado sed nur kiel armiloj per kiuj damaĝi politikajn kaj/aŭ klasajn kontraŭulojn, kun preteco uzi, senecese, verajn armilojn samcele, eĉ kontraŭ la teksto kaj la spirito de la eventuale reganta konstitucio. En tia tereno malfacile povas kreski kaj disvolviĝi la plantoj de la konstituciismo kaj la demokratio.


Francisco Largo Caballero


Indalecio Prieto


Santiago Carrillo


José Calvo Sotelo


José Díaz


Dolores Ibárruri


Andrés Nin


José Antonio Primo de Rivera

# Civil-milito en Hispanio



La Civilmilito estis historia okazo en kiu Hispanio ludis protagonisman rolon en la mondo kaj altiris la atenton de la homaro. Neniu alia civila milito kun centmiloj da mortintoj estis okazinta en Okcidenta Eŭropo dum la lastaj jarcentoj.

Eble la konflikto ne estis ne-evitebla, tamen, estiĝinta ĝi, fariĝis decida faktoro de la estonteco de la lando. Iasence, la civilmilito (ties sekvoj) daŭris ĝis 1977 ĉar ekde 1939 ĝis la morto de la diktatoro, la karakteraĵoj de la hispana vivo estis markitaj de la rezulto de la civilmilito.

Grava faktoro de la konspiro kontraŭ la Respubliko estis la monarkistoj. Ĉi tiuj, ĉar ili ne havis apogon en la sociaj amasoj, organizis sian konspiradon ene de la militistaj medioj kaj kun fremda apogo, ĉefe de la Italio de Mussolini. Tamen, pli pretaj por la ribelo estis la tradiciistoj, t. e. la karlistoj, en la regionoj kie ili havis socian apogon. Alia faktoro de popola, ĉefe junulara, kontraŭrespublikismo estis la ***Falange***, kiu lasttempe estis tre kreskinta domaĝe al la klientaro de la **CEDA**. Ekde lia prizono en Alikanto, ĝia lidero, José Antonio, faris alvokojn agadi kontraŭ la reĝimo. Tamen la rilato de tiu partio kun la armeaj estroj ne estis tute bona. La politika katolikismo estis dividita inter tiuj kiuj volis resti ene de la leĝeco de la Respubliko kaj tiuj kiuj volis ĝin detrui.

Ŝajnas ke komence la militista ribelo ne iris kontraŭ la Respubliko mem sed kontraŭ la Popola Fronto. La celoj de la ribelintoj estis konkretiĝante laŭlonge de la trijara civilmilito. Kvankam ne partoprenis en la ribelo la tuta landa armeo, tamen ĝi havis pli grandan apogon ol ties de Sanjurjo en 1932. La ĉefaj militistaj ribelintoj apartenis aŭ estis iam apartenintaj al la garnizonoj de Afriko. La kunordiganto de la konspiro estis Generalo Mola ekde ĝia garnizono en Navaro.

Laŭ la planoj de la militistaj konspirantoj, la operacio kontraŭ la politikaj gvidantoj de la lando konsistus en io simila al puĉo efektivigota per la marŝado de kelkaj armeaj kolonoj al Madrido. Sed la reago de la amasoj en multaj lokoj en la lando igis fiaski la militistan ribelon en kelkaj regionaj garnizonoj kaj ebligis la mobilizon de armeaj unuoj kontraŭ la ribelo. Tio estigis la kondiĉojn por longdaŭra konflikto. Tio okazinta dum tri tagoj, —la 17a, la 18a kaj la 19a de la monato julio— montris ke la ribelo ne estis tute venkinta sed samtempe ankaŭ ne estis komplete sufokita.




Generalo Sanjurjo, tiam konsiderita la plej verŝajna gvidanto de la ribelo, mortis okaze de akcidento de la aviadilo kiu devis porti lin ekde lia ekzilejo en Portugalio. Do, jam dekomence la trupoj ribelintaj de la marokaj garnizonoj konsideris kiel sia naturan estron Generalon Franko-n, kiu iam estis gvidinta ilin en la koloniisma milito en tiu teritorio. Por alpreni la gvidadon de tiuj trupoj Generalo Franko sekrete forlasis sian garnizonon en Kanario-insularo kaj translokiĝis al la hispana zono de Maroko. La ribelo venkis tie kaj en aliaj lokoj en la lando, sed fiaskis en Madrido, Barcelono, Valencio, norda zono de Hispanio… En la lokoj kie la ribelintoj

fiaskis la kaŭzo estis la divido inter la armeaj trupoj kaj/aŭ la rapida reago de la laboristaj kaj civitanaj amasoj. Rezulte de la okazintaĵoj de tiuj tri decidaj tagoj la lando restis dividita laŭ montras la mapo kiu aperas en la antaŭa paĝo. Tiam Azaña nomumis kiel Prezidenton de la registaro Martínez-Barrio-n celante eviti la civilan interfrontiĝon sed estis jam tro malfrue por tio. Ĉar la militista ribelo ne ĉesis, la registaro devis transdoni armilojn al la amasoj por kontraŭbatali ĝin. Post la rezigno de Martínez-Barrio oni mendis la formadon de nova registaro al José Giral.

Generalo Quepo-de-Llano, bofilo de la antaŭa Prezidento de la Respubliko, Alcalá-Zamora, favore al la ribelintoj sukcesis kontroli sufiĉe da teritorio ĉirkaŭ Seviljo por ebligi la alvenon de trupoj el Maroko. Ĉi-tiuj, subgvide de Franko konstituis armean kolonon kiu antaŭenmarŝis norden celante atingi Madridon.

Sed tiam la ribela movado de parto el la armeo ne estis la sola problemo de la regantaro de la Respubliko. En la zonoj kie la ribelo ne sukcesis, la amasoj, krome tiam armitaj, estis ne kontroleblaj de la ŝtata povo… Laŭteorie tiuj amasoj bataladis favore al la legitimaj aŭtoritatoj sed dume ili ne obeadis tiun aŭtoritaton. Tiuj amasoj, por kontraŭbatali la faŝismon volis efektivigi sindikatecan revolucion. Paradokse, tiu faŝisma ribelo kiu celis eviti ne-verŝajnan revolucion, fakte, vekis kaj ebligis realan revolucion. Kiam estiĝis la revolucio kiel respondo al la dekstrara ribelo, ĝi rezultis nerenversigebla. La respublika povo ne povis sufoki ĝin kiel estis farite en 1934. La revoluciaj organismoj malpliigis la povon de la ŝtato sed dume anstataŭis ĝin en malfacilaj momentoj. Tamen, ili ne sukcesis konstitui efikan gvid-sistemon. Male ol estis okazinta en Rusio en 1917, en Hispanio en 1936 la revolucio ne generis unuecajn organismojn, kiaj la sovetoj, kapablajn tute anstataŭi la ŝtatajn instituciojn, sed estis diverseco de komitatoj aŭ organismoj kiuj malpermesis la funkciadon de unusola formulo kaj ne kreis disciplinon kiel tiu kiun Trotsky metis en la ruĝan armeon, sed kelkajn apartajn kaj foje interbatalantajn organizaĵojn kontribuante ruinigi la komunan celon: unu sindikatista forto, alia anarkiista, du komunistaj (**PCE** kaj **POUM**) kaj tri socialistaj respektive gvidataj de Largo-Caballero, Prieto kaj Besteiro, krom aliaj malpli gravaj. La registaro de Giral, do, restis kondamnita al iu radikala paralizo okazigita de situacio pri kiu ĝi ne kulpis kaj kiun ĝi ne povis superi. Ne estis pli forta la registaro de Largo Caballero kiu anstataŭis tiun de Giral la 4an de septembro. Kiam la armea kolono gvidata de Generalo Franko, post liberigi la sieĝitan kastelon (Alkazaro) de Toledo, estis alveninte al la proksimaĵoj de Madrido, Largo-Caballero decidis forlasi la ĉefurbon kaj translokigi la registaron al Valencio. Tiam, kelkaj ministroj estis devigitaj reveni al Madrido subminace de la trupoj defendantaj tiun urbon sed kiujn la regantaro ne kontroladis. En la respublikista zono multobliĝis la komitatoj kaj konsilioj konkurantaj kun la registaro kaj interkonkurantaj ili mem. La revoluciuloj estus povintaj anstataŭi la centran povon sed malebligis tion ilia interbatalado. La rezulto estis granda konfuzo kaj malordo, kaj nenia efiko en la batalado kontraŭ la faŝismo dum la unuaj monatoj de la milito. Sed krom tiu efiko sur la politika situacio kaj sur la disvolviĝo de la milito, la revolucio havis, ĉefe, sekvojn en la sociekonomia tereno. Okazis granda eksproprigo de agrokulturaj bienoj, pli granda ol tiu okazinta dum la bolŝevista revolucio en Rusio, kaj oni efektivigis kolektivigon, t. e. kreadon de agrokulturaj komunumoj, ĉefe anarkiistaj, sed ankaŭ komunistaj kooperativoj kaj de la sindikato **UGT**. En iuj kazoj la kolektivigado estis paca kaj spontana sed estis ankaŭ perfortaj devigoj far la revoluciaj organizaĵoj. Durruti, la ĉefa anarkiista armeestro, pravigis tion dirante ke la armeoj rajtas vivi sur la tereno kiun ili konkeris. Estis ankaŭ ia kolektivigo en la industrio, precipe en Barcelono kaj Asturio, sed en malpli granda skalo ol en la agrokulturo. Aragono estis la regiono kie la agrokultuta kolektivigado estis pli granda. En grandparto el tiuj komunumoj estis nuligita la mono.




**Generalo Mola** **Queipo de Llano** **F. Franko** **Enrique Lister** **Durruti**

Tuj post la komenciĝo de la milito estiĝis ega perforto inter personoj de ambaŭ flankoj de la konflikto. La grandkvanto da elverŝita sango igis ke la civilmilito fariĝu nehaltigebla, malfermante egan abismon en la hispana loĝantaro. Ambaŭ partoj el la landa loĝantaro reciproke malamis kaj timis unu la alian. La senkompata intermasakrado efektiviĝis sen ia respekto, eĉ ne formala, al la leĝaro. Sed pri tiu perforto kulpis la personoj, ne la ideologioj: atestas pri tio la fakto ke ne mankis homoj, el ĉiuj politikaj teniĝoj, kiuj kondutis fratece rilate al siaj politikaj malamikoj.

En la teritorio kontrolita de la Popola Fronto la diverseco de politikaj entoj generis ankaŭ diversecon de subpremigaj organismoj. En Madrido ekzistis proksimume 200 eksterleĝaj prizonoj kaj torturejoj ligitaj al la politikaj partioj sed agante sen ia ajn kontrolo. En la teritorio de la faŝistaj fortoj, kvankam la politika aŭtoritato estis unueca ŝajnas ke ne mankis perforto kaj subpremado for de la kontrolo de tiu aŭtoritato. En tiu teritorio la viktimoj de la subpremado estis framasonoj, universitataj profesoroj, maldekstremaj instruistoj, dekduo da generaloj kiuj ne volis apogi la ribelon, respublikistaj kaj socialistaj parlamentanoj kaj eksparlamentanoj, provincestroj kaj urbestroj, kaj nekalkulebla nombro da nekonataj personoj. Dume, el la regionoj dependantaj de la Respubliko la viktimoj estis pastroj, monaĥoj, militistoj suspektitaj je faŝismo, dekstremaj politikistoj…

Estis rimarkinda la severa persekutado al la katolika pastraro en la zono de la Respubliko dum la unuaj du monatoj de la milito. Estis granda ankaŭ la nombro da bruligitaj kaj detruitaj preĝejoj, proksimume 20.000 religiaj konstruaĵoj. Kelkmilo da religiuloj, proksimume dek procento el la tuto, estis masakritaj laŭloge la milito. La procento kaj eĉ la nombro da mortigitaj klerikuloj kaj detruitaj temploj estis pli grandaj ol tiuj okazintaj dum la Granda Franca Revolucio (1789-1993) kaj la Rusa Revolucio (1917). Tamen ne temis pri religia persekutado sed pri politika reago al politika teniĝo de la Eklezia hierarkio. Ja, kvankam kun notindaj esceptoj, ĝenerale, la hispana katolika klerikaro, ĉefe ties hierarkio, klare kaj obscene enviciĝis kun la faŝistaj ribelintoj jam ekde la komenciĝo, —kaj eĉ antaŭe— de la civilmilito, al kiu atribuis karakteron de krucmilito. Cetere, tiu dekstrema teniĝo de la RomKatolika Eklezio ne estis novaĵo sed respondis al longa tradicio de tiu institucio.



**Kvankam kun notindaj esceptoj, ĝenerale, la hispana katolika klerikaro, ĉefe ties hierarkio, klare kaj obscene enviciĝis kun la faŝistaj ribelintoj dum la civilmilito, al kiu atribuis la karakteron de krucmilito.**

Rilate al la disvolviĝo de la militaj operacioj, laŭ la planoj de Generalo Mola, kelkaj kolonoj el la ribelinta parto de la armeo devus marŝi destine al Madrido. Tiu plano povis efektiviĝi nur partece pro la fiasko de la ribelo en kelkaj gravaj urboj kaj regionoj. La kolono gvidata de Mola mem ekde Navaro troviĝis distance 100 kilometrojn de Madrido jam la 22an de Julio, sed restis draste haltigitaj tie far la rezisto de la fortoj lojalaj al la Respubliko.

La kolono gvidata de Generalo Franko, post transpasi la Ĝibraltaran Markolon nur en Septembro estis alveninte al Talavero kaj poste dediĉiĝis al la liberigo de la Alkazaro de Toledo kie estis sieĝita Generalo Moscardó kun 1.700 personoj inter militistoj kaj geciviluloj. Nur en Novembro la trupoj de Franko alvenis al la suda kaj ŭesta eksteraĵoj de la hispana ĉefurbo, kie ankaŭ ili estis haltigitaj de la rezisto de la madridanoj.





Generalo José Miaja Generalo Vicente Rojo



Internaciaj brigadistoj

Alia kolono, veninta el Afriko kaj transportita permare eniris tra Galicio por starigi koridoron ĝis la sieĝita urbo Oviedo, kie rezistis Generalo Aranda. Aliaj garnizonoj en Asturio, kiel la kazerno Simankas en Gijón, falis sub la povo de la ruĝaj batalantoj. Krom Asturio estis kun la Respubliko ankaŭ Eŭskadio kaj Kantabrio.

Alia kolono, ĉi-foje anarkiista, eliris el Katalunio destine al Aragono, kiu estis konkerita de tiu forto. Sed tiu kolono ne sukcesis eniri en la provincajn ĉefurbojn Hŭesko kaj Terŭelo. Fiaskis alia kataluna ekspedicio al la Baleara insularo.

Fine de la jaro 1936 estis evidenta ke la komencaj planoj de la ribelintoj ne plenumiĝis. Madrido, eĉ post la retiriĝo de la registaro al Valencio, rezultis nokonkerebla por la faŝista armeo. Defendis tiun ĉefurbon du kapablaj militistoj, Generaloj Rojo kaj Miaja, la rezoluteco de la madridaj gecivitanoj kaj la internaciaj brigadistoj kiuj komencis alveni al Hispanio en Oktobro por kontraŭbatali la faŝismon. Fakte, la ĉefurbo rezistis ĝis la fino de la milito, do la ribelintoj devis ellabori alian militan strategion.


Dume reorganiziĝis ambaŭ armeoj, la respublikista kaj la faŝista, kaj la aŭtoritatoj de ambaŭ zonoj pretiĝis profiti la ekonomiajn rimedojn de siaj respektivaj teritorioj. Sufiĉe pliiĝis de tiam la kontrolo de la registaro de la Respubliko sur la diversaj batalantaj grupoj de la Popola Fronto, kio plibonigis la efikon de la respublikistaj armeaj fortoj. Do, fiaskis tri atakoj de Franko kontraŭ la defendaj linioj de Madrido. La sola faŝista venko en la unuaj monatoj de 1937 estis la konkero de Malago. Tie la anarkiista sindikato **CNT** estis batalante kontraŭ la ceteraj fortoj de la Popola Fronto. Kiel ni vidos poste, tiu interfrontiĝo ene de la respublikistaj fortoj ne estis la sola tiutipa kazo dum la civilmilito. Fakte, kelkfoje por la afero de la Respubliko la anarkiistoj estis tiel danĝeraj kiel la faŝistoj mem. En la konkero de Malago intervenis, helpe de la armeo de Queipo-de-Llano, italaj trupoj senditaj de la faŝista diktatoro Mussolini.

La trupo de Franko plu fiaskis en la bataloj ĉirkaŭ Madrido, en Jaramo en Februaro kaj en Guadalajaro, antaŭ Generalo Enrique Líster, en Marto de 1937, spite al la helpo de italaj trupoj.

Ĉar rezultis evidente ke la milito ne povus esti decidita en tiu Madrida fronto, Franko decidis kuncentrigi la forton en la fronto de la nordo de Hispanio. Dume pliintensiĝis la helpo de la fremdaj faŝismoj al la hispana. Krom la italoj, ankaŭ la germanoj de A. Hitler kontribuis al la hispana milito ĉefe per armilaro: aviadiloj, kanonoj… La demarŝoj kun la faŝistaj potencoj estis faritaj, rolante kiel Ministro pri Eksteraj Aferoj, Serrano Súñer, bofrato de Franko. Tamen la potencoj kiuj povus helpi la respublikon interakordis ne interveni en la hispanan konflikton timante ke tio akcelu internacian konflikton kiu poste konkretiĝis en la Dua MondMilito. La Respubliko devis altekoste pagi la akiritan armilaron kaj por tion fari oni translokigis la oron de la ŝtata banko al Rusio.

Ĉar ekde ĉi paĝoj ni kontemplas la hispanan historion de vidpunkto de la konstituciismo en ĉi tiu lando, decas ke ni pli atentu pri la politikaj eventoj ol pri la militaj operacioj. Tiurilate ni devas registri ke kiam Franko entreprenis la atakojn kontraŭ Madrido, t. e. ekde Oktobro de 1936, li estis jam oficiale la ĉefa estro de la armeo batalanta kontraŭ la Respubliko. Tiu funkcio estis esprimita per la titolo de ***Generálisimo***, en la hispana lingvo, kiun ni povas esperantigi kiel **Generalego** aŭ **Ĉefgeneralo**. Sed en la tiamaj cirkonstancoj tiu titolo enportis ankaŭ la politikan estrecon de la reĝimo tiam naskiĝanta. Fakte, li nomumis konsilantaron

kiu rolis kiel vera registaro de la teritorioj sub la kontrolo de la ribelintoj. En Novembro 1936 la lidero de ***Falange***, José-Antonio-Primo-de-Rivera, en prizono en Alikanto ekde antaŭ la komenciĝo de la milito, estis mort-pafita. Li estis laŭleĝe juĝita kaj ŝajnas ke la proceso estis korekta, sed de politika vidpunkto lia mortigo estis granda eraro. Lia malapero el la politika scenejo de Hispanio plifaciligis la absolutisman povon de F. Franko. La pafmortigo de la fondinto de ***Falange*** okazis la 20an de novembro. Hazarde, la saman tagon mortis en Madrido la anarkiista militisto Buenaventura Durruti kiu estis vundita la antaŭan tagon en ne-klarigitaj cirkonstancoj.



**Ramón Serrano Súñer**

Fine de Marto 1937 Franko decidis la atakon al la nordaj regionoj apogantaj la Respublikon: Eŭskadio, Kantabrio kaj Asturio. Oni povas diri ke la milito estis decidita en tiu fronto, ĉar per la konkero de tiu zono, finplenumita en Septembro de la sama jaro, la frankista zono rezultis pli ampleksa, riĉa kaj potenca ol tiu ankoraŭ kontrolita de la Respubliko. Dum tiu kampanjo mortis, pro iu aviadil-akcidento, la Generalo Mola.



**Juan Negrín**

La 17an de Majo 1937 la Prezidento Azaña nomumis novan registaron de Respubliko. Juan Negrín anstataŭis Largo-Caballero-n kiel Prezidento de la Registaro, kaj ties Ministro pri Defendo estis Indalecio Prieto. La nova regantaro evidentigis ian iniciativon en la milita tereno. Oni entreprenis iujn ofensivojn kontraŭ la frankisma zono sed la rezulto ne estis konsiderinda. Pli grave por la respubliko kaj por la Popola Fronto estis la interfrontiĝo, foje perforta, inter la diversaj politikaj kaj sindikataj fortoj de Maldekstraro. Sed la plej danĝera, por la komunaj interesoj, el tiuj interfrontiĝoj estis tiuj komenciĝintaj en Barcelono en la unua semajno de Majo de 1937. La aŭtonomeca aŭtoritato de Katalunio intencis apliki la disciplinon kiu jam ekzistis en la cetero de la zono de la Popola Fronto. La politika forto kiu pli estis kreskanta tiam estis la komunistoj de la **PSUC** (kataluina referaĵo de la hispana **PCE**). La 3an de Majo la kataluna aŭtonomeca aŭtoritato kaj la komunistoj intencis, en la kadro de la politiko de militista unuigo, okupi la konstruaĵon de Telefona entrepreno de Barcelono konfiskita de la anarkiista **CNT**. En tiu operacio estiĝis perforta rezisto kaj en la sekva batalado rezultis mortaj kelkaj altrangaj komunistoj kaj anarkiistoj. Tiam alvenis al Barcelono anarkiistaj trupoj kiuj retiriĝis el la fronto de Aragono kontraŭ la faŝismo por batali kontraŭ aliaj fortoj de la Popola Fronto. La incidento estis spontana, ne antaŭe elpensita, sed ĝi havis gravajn sekvojn. Estis tio kio okazigis la demision de Largo Caballero kaj ties anstataŭo fare de Negrín. En la posta subpremado de la responsuloj de la anarkiista maldisciplino estis likviditaj ankaŭ la trotskisma komunista partieto **POUM** kaj ties gvidanto Andrés Nin kiuj iome estis kunlaborintaj kun la anarkiistoj en la ĵusa malordo en Barcelono.



**Indalecio Prieto**

La registaro de Negrín daŭris ĝis la fino de la milito. Sendube li estis la plej kapabla el la Registar-Prezidentoj de la Respubliko ekde la komenciĝo de la civilmilito. Krome la partopreno de Prieto en tiu registaro en la Ministerio kun militaj funkcioj estis alia favora faktoro en la tiama malfacila situacio. Tiu nova regantaro aplikiĝis al la rehavo de la ordo kaj la disciplino ene de la ankoraŭ respublikista zono. La idealo de Negrín estis rekuperi la Respublikon de 1931. Li ordonis meti finon al la persekutado de religiuloj kaj garantii la liberecon de la religia praktikado.
En Oktobro de 1937 kunvenis en Valencio granda nombro da parlamentanoj kiuj, tiamaniere atestis antaŭ la internacia publika opinio pri la parlamenta kaj demokratia karaktero de la institucioj. La translokigo de la ŝtataj institucioj al Barcelono celis ke Katalunio pli efike kontribuu al la komuna batalado kontraŭ la malamiko. La ĉefaj kaj plej seriozaj bataloj kontraŭ la faŝismo: ofensivo de Terŭelo, Ebro-batalo, defendo de la Maestrazgo… okazis sub ĉi tiu regantaro kaj laŭ ĉi ties iniciato. Kvankam la ofensivo de la armeo de la Respubliko kontraŭ Terŭelo komence estis sukcesa, fine la trupoj de Franko rekonkeris la urbon kaj ĉirkaŭan teritorion pere de pli supera armilaro kaj kun grandaj perdoj (40.000 homoj). En marto de 1938 la armeo de la Popola Fronto atingis alian sukceson per la detruo de la

frankista krozo-ŝipo ***Baleares.*** Menciindas ke en la maro la faŝistaj fortoj havis preskaŭ ekde la komenco de la milito egan superecon krom la helpon de la itala eskadro. Dum monatoj marto kaj aprilo de 1938 la frankista armeo entreprenis ofensivon en Katalunio kaj tre progresis en sia antaŭenirado. La 4an de aprilo tiu armeo konkeris la urbon Lerido-n. Poste tiuj trupoj alvenis al la maro per la alveno al Vinarozo kaj la konkero de 6.400 kvadrataj kilometroj.
Poste Franko entreprenis alian ofensivon en la Maestrazgo celante la konkeron de Valencio. Sed ĉi tie la armeo de la Popola Fronto, subgvide de Generalo Miaja efektivigis efikan defensivon dum tri monatoj. Nur meze de Junio povis la trupoj de Franko eniri la urbon Castellono-n. Sed tiam tiu armeo devis interrompi la ofensivon kiam la Popola Fronto entreprenis ofensivon en la zono de la Ebro-rivero subgvide de Generalo Rojo.
La 24an de Julio la ruĝa armeo (tri divizioj) transiris la Ebro-riveron en kelkaj lokoj. Sed la impeto de la ofensivo elĉerpiĝis post malmultaj tagoj. Tiu batalo estis por ambaŭ interbatalantaj armeoj la plej sanga el la tuta civilmilito. Inter la 26a kaj la 31a de Julio la armeo de la Popola Fronto estis haltigita. La frankista armeo ĝuis la apogon de peraviadila bombardado kaj duoblnombron da kanonoj. Meze de Aŭgusto la trupoj de Franko estis rekuperante la perditan terenon. Nur en la unuaj tagoj de Novembro kaj post la uzado de pli ol 500 kanonoj la armeo de Franko povis kompletigi la revenon al la linio de la Ebro-rivero. Oni kalkulas ke ĉiu el ambaŭ armeoj perdis inter 60.000 kaj 70.000 homojn. Tiu Ebro-batalo signis la kapablo-finon de la ruĝa armeo. Kaj krome estis la demoraliziga efiko de la aviad-bombardado sur la urboj kiel Barcelono.




Iuj misfamigantoj de Negrín asertis ke li estris tro aŭtoritatema, sed aliaj akuzas lin esti dominita de la komunistoj. Ja, dum la regado de Negrín la komunistoj akiris grandan povon kaj influon. Malkontenta kun tiu situacio Prieto fine demisiis el tiu registaro. Sed iuj opinias ke la demisio de Prieto okazis kiam li komprenis ke la civilmilito jam estis perdita por la Respubliko kaj ne volis prezidi pluajn malvenkojn. Verdire en tiuj momentoj (aprilo de 1938) la Prezidento de la Respubliko, Manuel Azaña, estis same pesimisto. La alveno de la frankista armeo al la Mediteraneo igis ke multaj personoj en la zono de la Popola Fronto perdis esperon pri venko de la Respubliko.
Post la reorganizado de la registaro de Negrín ĝi suferis novan krizon en Aŭgusto de 1938. Tiam la Registrar-Prezidento havis problemojn ankaŭ kun Azaña sed li sukcesis superi ĉiujn malfacilaĵojn kaj persistis en sia regado. Vere, la Prezidento de la Respubliko ne havis en tiuj cirkonstancoj alian alternativon por la regantaro. Negrín estis neanstataŭigebla eĉ se tio okazis pro tio ke neniu volus akcepti tiam la respondecon gvidi la registaron de la Respubliko.
En Septembro de la jaro 1938 okzis en la kastelo de Figeras la lasta sesio de la Parlamento de la Respubliko. Ĉeestis nur 62 el la 473 deputitoj elektitaj en Februaro de 1936. Neniu disputis la povon de Negrín sed inter iuj militistoj de la Respubliko formiĝis la ideo ke por alveni al la paco oni devus ignori la politikistojn, tezo kiu kondukos al la ribelo de Generalo Casado en Aprilo de la sekvonta jaro.
Se en la zono de la Respubliko oni antaŭsentis la malvenkon, Franko sin vidis jam kiel venkanto de la jam baldaŭ finiĝonta civilmilito. Sekve, li alprenis kelkajn politikajn disponojn kiel la formala nomumo de registaro prezidata de li. Lia naskiĝanta reĝimo havis nenion simila al Konstitucio. Ĝi estis dekomence persona diktaturo en kiu la homoj ne plu estu civitanoj sed regatoj. Post malpli ol unu jarcento kaj duono ekde la unua hispana konstitucio, tiu ĉi lando estis revenanta al la Antikva Reĝimo.
Sed oni devas mencii la promulgadon de iu leĝo kiu, iamaniere, kontemplis personajn rajtojn. Temas pri la tiel nomata "Foruo de la Laboristoj". En Marto de 1938 Franko proklamis tiun leĝon kiu tre similas al aliaj tiam ekzistantaj en la faŝistaj reĝimoj de Italio kaj Germanio kaj estis inspirita en la doktrinoj de la ***Falange***. Ĝi estis difino de rajtoj kaj devoj de la laboristoj. Kompreneble ne estas en ĝi rajto de strikado, kaj per tiu teksto oni preparas la terenon por la starigo de unusola sindikato kontrolata de la ŝtato. Oni sakraligas la privatan propraĵon sed dume oni kontemplas ankaŭ kelkajn rajtojn kiel sociaj kaj sanecaj servoj. Oni devas ne forgesi ke la faŝismaj reĝimoj naskiĝis kiel reago al la socialistaj revolucioj kaj la komunista reĝimo de Rusio, do, ili devis alpreni kelkajn elementojn de la socialismo, kiel la sanec-servojn, laborrajton, k. s. por efike konkuri kun la maldekstraro. Tiuj rajtoj ne malaperis el la kapitalisma mondo dum ekzistis la socialista alternativo, t. e. ĝis la fino de la 20a jarcento kaj komenco de la 21a.



# Faŝisma venko

La ofensivo de la armeo de Franko kontraŭ la Katalunia teritorio komenciĝis en la antaŭtago de la Kristnaskofesto de la jaro 1938 kaj post dusemajna feroca batalado restis detruita la ruĝa armeo de la Ebro-batalo kiu de tiam ne povis fari alie ol retiriĝi, ofte senorde. Dum malmultaj tagoj la frankistaj trupoj konkeris sep mil kilometrojn. Meze de januaro 1938 estis okupita la urbo Tarragono. Fiaskis la intenco ripeti en Barcelono reziston similan al ties de la defendo de Madrido. La 26an de tiu monato okazis la eniro de la armeo de Franko en Barcelono sen ia ajn rezisto. Pli ol duonmiliono da personoj trairis la landlimon al Francio; multaj el ili neniam revenos. Tamen, dume, la respublikistaj fortoj bone rezistis la ofensivojn kiujn la faŝista armeo faris en la sudo kaj aliaj punktoj de la hispana geografio kaj eĉ entreprenis ofensivon kiel tiun de Pozoblanco.

Sed tiam la internaciaj cirkonstancoj fariĝis favoraj por la faŝismaj fortoj. Ofte oni povas ekspliki la disvolviĝon de la politika situacio de lando kia Hispanio sen ia ajn rilato kun la eksterlandaj aferoj. Sed iam la internaciaj eventoj havas rektan kaj decidan influon sur tio okazanta ene de la lando. En ĉi tiu historio de la konstituciismo en Hispanio jam ni vidis kiel iu eksterlanda militista interveno en 1823 metis finon al konstitucia provo en nia lando. Ankaŭ la milito kontraŭ Usono pro la aferoj de Kubo kaj Filipino generis en nia lando la krizon de 1898.

La jaro 1939 estis alia okazo en kiu la internacia influo klinis la pesilon de la milita venko favore al tiuj fortoj kiuj, en la lando, volis detrui la Respublikan reĝimon. Ni jam menciis tion ke, en 1937, iu **Komitato pri Ne-interveno** respegulis la volon de la ĉefaj eŭropaj potencoj ke la hispana milito ne plikomplikigu la kontraŭdirojn inter ili. Sed ĝuste tiu **Ne-interveno** estis ia maniero interveni en la hispanajn aferojn ĉar la fakta rezulto de tiu plano estis ke la hispanaj aŭtoritatoj de la Respubliko ne povis ricevi la necesan armilaron dum la faŝistaj ribelintoj ĝuis la malavaran apogon de Germanio kaj Italio. Nur Rusio alportis al la hispana Popola Fronto iom da fremda helpo. Proksimume 20 rusaj ŝipoj portante armilojn por la hispana Respubliko estis atakitaj de germanaj kaj italaj militŝipoj. Sed ĝuste tiu rusa helpo fariĝis problema en la unuaj monatoj de 1939. Okazis ke la kontraŭdiroj inter la eŭropaj potencoj spertis strangan evoluon. Stalin perdis sian intereson pri la hispanaj aferoj. Ni memoru ke la fino de la hispana civilmilito okazis nur plurajn monatojn antaŭ la subskribo de la stranga kaj surpriziga pakto inter la faŝista Germanio de Adolf Hitler kaj la komunista sovetia reĝimo de Stalin. Kio okazis por veni al tiu strangaĵo? Ĉi-tiu afero tute ne rilatas al nia studo de la hispana konstituciismo, do ni faros nur etan resumon pri ĝi. La kontraŭdiroj inter la eŭropaj potencoj ne estis afero de du sed de tri interkontraŭantoj: la eŭropaj demokratioj (Britio, Francio), la faŝistaj landoj (Germanio, Italio), kaj la komunista Sovetunio. Ĉiu el tiu tri grupoj estis malamika de la ceteraj du, do eblis kelkaj malsamaj kombinoj de alianco de du kontraŭ unu. Por la demokratioj estus interese ke la germanoj ataku So-

vetunion kaj ke ambaŭ malamikoj detruu unu la alian. La eŭropaj demokratioj, ĉefe Britio, foroferis Aŭstrion kaj Ĉeĥoslovakion al la perspektivo de la realigado de tiu plano. Sed la problemo de tiaj planoj estas ke ankaŭ la personoj kiujn oni intencas manipuli havas pensokapablon kaj siavice ili povas fari siajn proprajn planojn. La pakto inter naziaj germanoj kaj rusaj komunistoj ne estis pli kontraŭnatura ol tiu kiu okazis poste inter la kapitalistaj demokratioj kaj Sovetunio kontraŭ la faŝismo. La kontraŭnaturaj paktoj ne estas longdaŭraj –kaj tiuj du menciitaj ne daŭris– sed ili povas dum iom da tempo okazigi alies damaĝojn. Kaj ĝuste tio okazis en 1939. La unua damaĝita parto de la germansovetia pakto estis la hispana Respubliko (la dua estis Polujo kaj la tria Finlando kelkajn monatojn poste).
Post la konkero de Katalunio la reĝimo de Franko estis agnoskita de Francio kaj Britio. En februaro kapitulacis Menorko-insulo. Tiam la plej altrangaj respondeculoj de la Respubliko estis forlasante la landan teritorion: Azaña foriris fine de februaro por ne plu reveni. Negrín, kaj siaj solaj apogantoj, la komunistoj, fariĝis tre malpopularaj pro ilia teniĝo rezisti ĉiurimede. Negrín revenis al la centra zono kaj kunvenis en Albaceto kun la ĉefaj estroj de la armeo de la Respubliko. Tie li povis konstati la malakordon de la militistestroj rilate al la formo meti finon al la milito. Ĉiuj estis plenkonvinkitaj ke la milito estis perdita por la Respubliko sed la afero de malakordo estis la maniero oficialigi tiun akcepton. Por Negrín, Miaja kaj aliaj estis neakceptebla la postulo de Franko pri senkondiĉa kapitulaco. Sed aliaj militistoj, kiel Kolonelo Casado, estro de la defendo de Madrido, jam estis entreprenintaj sekretan negocadon kun la malamiko por efektivigi la kapitulacon laŭ tiu postulo. Negrín decidis anstataŭi la nefidindajn militestrojn per aliaj pli fidelaj, plejparte komunistaj kiel Enrique Líster.
La 4an de marto estis en Kartageno ribelo de la garnizono favore al rapida negocado de la paco sed baldaŭ la movado estis kontrolita kaj estrita de uloj kiuj volis kapitulaci antaŭ Franko senkondiĉe; ili celis tiamaniere liberiĝi el la kutimaj reprezalioj de la venkintoj. Tamen tiu ribelo estis sufokita dum la du sekvintaj tagoj fare de militistaj unuoj kiuj, teorie, obeis la registaron de Negrín, sed tiu kiu gvidis tiujn trupojn malkovris poste ke la Prezidento de la Registaro jam estis forlasinte Hispanion, do, ankaŭ li aliĝis poste al la kapitulacema movado tiam estrita, jam malkaŝe, ekde Madrido de Kolonelo Segismundo Casado.
Tiu ulo estis forminta en la hispana ĉefurbo iun komitaton nomatan **Landa Konsilio pri Defendo** kies vera kaj sola celo estis la kapitulaco antaŭ la Ĉefgeneralo F. Franko. Al tiu Konsilantaro apartenis ankaŭ, interalie, la anarkiisto Cipriano Mera, kaj la socialistoj Besteiro kaj Wenceslao Carrillo, patro de Santiago Carrillo la gvidanto de la unuigita socialista-komunista junularo.
La agado kaj la deklaracioj de tiu **Landa Konsilio pri Defendo**, en ties intenco atingi favoron antaŭ Franko, alprenis tre kontraŭkomunistan karakteron. Tio vekis la reziston de la tri armeo-korpoj de la ĉefurbo plejparte formitaj el komunistoj. Dum la tagoj 6a al la 11a de marto estis ĉirkaŭ la ĉefurbo granda batalado inter la komunistoj kaj la ceteraj fortoj de la armeo de la Respubliko en kiu intervenis 30.000 soldatoj. Ĉi tio finruinigis la armeon de la Popol-Fronto kaj plifaciligis la finan venkon de Franko.
Casado kaj Besteiro baldaŭ komprenis ke ili eraris en ilia taksado de la situacio. Ili estis pensintaj ke por negoci kun la faŝista Ĉefgeneralo estus en favora situacio tiuj kiuj estis likvidintaj la komunistojn, sed Franko volis meti finon al la tuta Popola Fronto. Li akceptis nur senkondiĉan kapitulacon. La 1an de aprilo la faŝistaj trupoj eniris en Madridon kaj Franko anoncis la venkon de sia armeo.
La finiĝinta milito lasis la landon tre ruinigitan de materia kaj morala vidpunktoj. Mortis miliono da homoj kaj multe pli restis vunditaj kaj kripligitaj. Multaj aliaj devis foriri ekzilen kaj multaj aliaj estis metitaj en koncentrejojn, la mararmeo estis perdita, la industrio kaj la agrokulturo restis preskaŭ tute detruitaj, kaj la lando restis enŝuldigita pro la egaj militaj elspezoj. Krom tio, perdiĝis la demokratio kaj Hispanio restis dumlonge sub faŝisma diktatuturo en kiu la homoj, jam ne plu civitanoj sed nuraj regatoj, ĝuis neniun liberecon kaj neniun demokratian rajton. Cetere, la loĝantaro restis politike dividita. Finiĝis la civil-milito sed estiĝis neniu repaciĝo; funkciis nur la venĝemo de la venkintoj.
La 19an de majo okazis en Madrido la granda triumfparado de la venkintoj de la civil-milito. 120.000 soldatoj defilis antaŭ la Ĉefgeneralo, al kiu oni estis asignita ankaŭ la titolo "Caudillo" (prononcendas **Kaŭdiljo**) hispana titolo samsignifa kiel la germana **Führer** kaj la itala **Duce**. Laŭŝajne la nova hispana reĝimo apartenis al la sama tipo kiel tiuj du fremdaj faŝismoj. Kvankam oni ne informis al la publika opinio, tiam la eksreĝo Alfonso la 13a sendis al Franko





**Franko prezidas la triumf-paradon de la venkintoj de la civil-milito**

mesaĝon deklarante sin meti je ĉi ties ordonoj. Eble li pensis ke tiamaniere oni plifaciligus la restariĝon de la monarkio sed, tiutempe, Franko ĉesis esti monarkisto kaj li mem agadis kiel monarko. Sekvintan tagon, la 20an de majo, okazis alia ceremonio ĉi-foje kun religia karaktero. Franko eniris en iun madridan preĝejon sub-paliume, t. e. iu honoro rezervita al la Sankta Sakramento kaj al la reĝoj. Ĉio ĉi montras la karakteron de la naskiĝanta reĝimo kaj la ideon kiun la diktatoro havis pri si mem. Li sin konsideris sendito kaj reprezentanto de la Alta Dio por gvidi la landon sen ia ajn limo. La absolutismo revenis al ĉi tiu malfeliĉa lando. Tamen tiutempe oni ne sciis ĉu la diktaturo estos persona aŭ faŝista, kaj ĉu Hispanio partoprenos aŭ ne, flanke de la eŭropaj faŝismoj, en la monda milito kiun jam oni antaŭsentis proksima.

La historiistoj sufiĉe pridebatis la temon pri la tipo al kiu apartenis la diktaturo de Franko: ĉu faŝista, militista, konservativa, burĝe katolika, teknokratisma…? Ja, dum ĝia longa daŭro la frankismo alprenis en iu aŭ alia epoko, ĉiun el tiuj formoj, sed esence ĝi estis persona diktaturo; Franko estis, ĉefe, iu supervivinto, kaj dum la cetero el sia vivo li neniam ĉesis esti la vera kontrolanto de la povo. Dum kelkaj jardekoj ekzistis en la reĝimo nur unu Registaro, kies Prezidento li estis, krom Ŝtatestro. La Ministroj estis ŝanĝitaj sed ĉiam persistis la sama registaro kun la sama Prezidento.

En la unua etapo de la reĝimo 1939-1945) la imitata modelo estis tiu de la germana naziismo kaj la itala faŝismo kaj ŝajnis ke la frankista Hispanio estis preta batali en la Dua Mondmilitito flanke de tiuj potencoj. Sed jen la German-Soveta pakto okazigis elreviĝon kaj konfuzon en la frankisma, kontraŭkomunista reĝimo. Do, la registaro de Franko proklamis sian neŭtralecon pri tiu konflikto. Sed pro la helpo kiun Franko estis ricevinta dum la civilmilito el la du faŝistaj potencoj Hispanio restis tre enŝuldigita kaj devis efektivigi longdaŭran pagadon. Tio igis ke la postmilita rekuperiĝo de la lando fariĝis malfacila kaj malrapida. Por alfronti la penigan ekonomian situacion la frankisma reĝimo starigis sistemon de ŝtata interveno kaj preskaŭ nula komercado kun aliaj landoj. Dum multaj jaroj (preskaŭ ĝis 1949) oni uzis, por la provizado de la plej bazaj nutraĵoj, la t. n. «porci-kartoj» kaj «porci-kuponoj». Kompreneble, laŭ la kapitalisma naturo de la reĝimo, ekzistis grandaj diferencoj en la vivmaniero de la sociaj klasoj. Abundis la Eksterleĝa provizado tra la “nigra merkato”, difinata en la hispana lingvo per la vorto “estraperlo”. La frankisma ŝtato montris plian intereson puni la politikajn kontraŭulojn ol la kulpantojn je tiuj eksterleĝaj negocoj.


Franko kun Hitler en Hendajo


Franko kun Mussolini en Bordiĝero

En aprilo de 1940 la milito en Eŭropo alportis grandajn novaĵojn. La germana armeo invadis Francion kaj konkeris parton el tiu lando restante la cetera parto sub la kontrolo de kunlaborema reĝimo (subgvide de Marŝalo Pétain) submetita al Hitler. Tiam revekiĝis en Hispanio, ĉefe en la sektoroj de la ***Falange,*** la emon interveni en la milito favore al la naziismo. Franko mem estis preta organizi tiun intervenon kun la celo profiti la postrestaĵojn de la franca koloniisma imperio en Afriko. Sed Hitler ne volis akcepti tiun aranĝon cele de ne malfortigi la politikan pozicion de sia nova alianculo Pétain. Do, vo-le nevole Franko devis persisti en sia neŭtraleco.

Sed kiam, en oktobro de tiu jaro, evidentiĝis la fiasko de la germana aviad-ofensivo kontraŭ Britio cele prepari la invadon de la brita insulo, Hitler, pretigis novan strategion kiu kontemplis la intervenon de Hispanio en la milito. Konkrete, la nova plano estis konkeri la britan fortikaĵon de Ĝibraltaro, sude de Hispanio, kun la celo igi ke la Mediteraneo restu kiel lago kontrolata de la fortoj de la ital-germana akso. Por interakordi la hispanan partoprenon en la operacio okazis, la 23an de oktobro de 1940, renkontiĝo de Franko kun Hitler en Hendajo. Poste, la 12an de februaro de 1941 la hispana diktatoro kunvenis kun Mussolini en la itala urbo Bordiĝero. Ĉeestis ambaŭ rendevuojn la hispana Ministro pri Eksteraj Aferoj, Serrano Súñer, bofrato de Franko.

La germana kaj la itala lideroj efektivigis premojn sur la hispanaj regantoj por ke Hispanio partoprenu en la mond-milito helpe de la faŝistaj potencoj. Sed ĉi-foje Franko kondutis pli prudente ĉar tiam li ne tiel estis optimista kiel antaŭe pri la venko de tiuj potencoj kaj ne volis kompromiti la pludaŭron de sia reĝimo se la eŭropaj faŝismoj rezultus venkitaj en la milito. Sed la prudento konsilis ankaŭ ne kontraŭstari la volon de Hitler, do Franko konsentis pri la eniro de Hispanio en la militon sed li sukcesis ke en la subskribita dokumento oni ne fiksu la daton por tion fari. La germanaj premoj por ke Hispanio intervenu en la milito daŭris dum pluaj kelkaj monatoj, sed iom-post-iom la militaj interesoj de Hitler adresiĝis orienten. En la monato junio la germana diktatoro rompis sian pak-ton kun Stalin kaj atakis Sovetunion. Dum la sekvaj monatoj la germana armeo invadis ankaŭ Jugoslavion

kaj Grekujon. Tiu evoluo de la milito efikis entuziasmige sur tiuj politikaj sektoroj de nia lando, kiel la ***Falange***, kies ekzisto-kialo estis ĝuste la kontraŭkomunismo. Do, la premoj por la milita interveno de Hispanio de tiam venis ankaŭ el tiuj internaj sektoroj de la reĝimo de Franko. Sed tamen tiu eniro de Hispanio en la milito neniam okazis. Por kontentigi la internajn militemulojn kaj la eksterlandajn premigantojn oni organizis iun divizion de volontuloj, nomatan "Blua Divizio" por batali en Rusujo, konkrete en Leningrado, enkadrigita en la germana armeo.

La periodo de 1941 al 1944 estis terura por Hispanio de vidpunkto de la nutrado kaj dum tiu tempo okazis multenombraj mortoj pro malsato. Same, kaj kiel rezulto de la manko de higieno aperis la tifo kaj aliaj malsanoj, inter ili la veneraj. La problemo pro manko de loĝejoj estis enorma. La laborist-klaso estis la ĉefa viktimo de la frankisma reĝimo. La sindikataj organizaĵoj estis malpermesataj; la reĝimo intencis organizi unikan, oficialan sindikaton, kiu ricevis la nomon de «Vertikala» kies celo estis la kontrolo kaj doktrinigado de la laboristoj. La salajroj estis tre malaltaj dum la entreprenistaro faris profitajn negocojn. Kaj dume, pludaŭris la persekutado de la politikaj kontraŭloj de la reĝimo. En la jaro 1942 estis liberigitaj multaj milit-prizonuloj post kelkjara restado en koncentrejoj, sed de tiam daŭre restis multaj aliaj en la prizonoj.

Ne mankis problemoj interne de la socipolitika koalicio subtenanta la reĝimon. La 15an de aŭgusto de 1942 okazis perforta atenco kontraŭ la Ministro pri la Armeo fare de iuj falangistoj. La Ministro, Generalo Varela, ne estis trafita sed rezultis kelkaj vunditoj el la atenco. La kulpintoj estis juĝitaj kaj iu grava falangisto estis kondamnita al mortpafo. Franko solvis la krizon laŭ lia politika stilo, simile kaj samgrade punante la respons-ulojn de ambaŭ kverelantaj fortoj; li eksoficigis la Ministron kaj alian gravan militiston sed samtempe ĉesigis ankaŭ iun gravan falangistan Ministron, tiu pri Eksteraj Aferoj, sia bofrato Serrano Súñer, kiu de tiam ne plu rolis en la frankista reĝimo. Malantaŭ tiu incidento troviĝis la kontraŭdiroj inter la partianoj de la faŝismaj potencoj, kiel la falangistoj, kaj tiuj politikaj fortoj de la reĝimo kiuj, tamen, pli simpatiis al la aliancanoj. Ene de la reĝimo havis forton kaj influon ankaŭ la monarkistoj kaj la Eklezia pastraro. Franko intencis –sukcese– teni ĉiujn tiujn fortojn sufiĉe kontrolitaj profite al sia persona dumviva regado.

Ekde aŭtuno de 1942 oni konstatis ke la germana armeo estis perdanta impeton en Rusio kaj NordAfriko. La 8an de novembro okazis surpriza elŝipiĝo de anglo-usona armeo en Maroko kaj en la printempo de 1943 la germanoj suferis gravan malvenkon antaŭ Sta-lingrado dum la anglo-usona armeo finvenkis la italo-germanojn en Tunizo. Franko vidis ke oni estis profilante la venko de la aliancanojn kaj komprenis ke li devus manovri por savi sian reĝimon el la kataklismo minacanta la faŝismojn. En oktobro de la jaro 1943 estis retirita la Blua Divizio el Rusio.

En majo de tiu jaro estis okazinta la solena inaŭguro de la unua frankisma Parlamento aŭ Korteso. Temis pri alia institucio serve de la persona povo kaj regado de Francisko Franko. Laŭ la oficiala propagando tiu leĝdona organo estis la popola interveno en la landa politiko. Sed nur triono el la deputitoj estis nomumitaj laŭ publika elektado, sed krome en la balotado povis partopreni nur la familiestroj, kaj ili devis elekti unu kandidaton inter tri prezentitaj de la reĝima regantaro. Krome Franko elektadis li mem la Prezidenton kaj la Sekretariojn de la Parlamento, kaj la leĝoj ellaboritaj kaj aprobitaj de tiu Parlamento devus esti akceptitaj de la ŝtatestro por ilia valideco.

En la printempo de 1945 plenumiĝis la totala ruino de la faŝismaj reĝimoj en la mondmilito. Hitler kaj Mussolini malaperis el la historio. La fortoj venkintaj en la hispana civilmilito estis venkitaj en la Dua Mond-Milito. Tiam okazis en Hispanio, ene de la reĝimo de Franko, potenca movado intencanta ke la diktatoro demisiu el lia reganta povo kaj restarigu la monarkion en la persono de Johano de Burbono, filo de la jam forpasinta eks-reĝo Alfonso la 13a. Inter la iniciatintoj de tiu plano estis multaj membroj de la nova Parlamento kaj ankaŭ elstaraj generalo kaj militistoj, inter ili Varela, Ponte, Orgaz, Kindelán, Monasterio, Dávila, Solchaga, kaj Saliquet, t. e. la supervivantoj el tiuj kiuj antaŭ sep jarojn aljuĝis al Franko la ŝtatan povon. Sed la diktatoro ignoris tiun peton kaj lerte manovris por kontraŭstari tiun iniciaton kiu minacis lian povon.

Sed eĉ li komprenis ke oni devus ion fari por ke lia reĝimo aspektu pli deca kaj honesta ol ĝi reale estis. Tiurilate estis aprobita, far la Korteso, iu kvazaŭ konstitucio nomata «Foruo de la Hispanoj», en kiu oni agnoskis iujn personajn rajtojn. Samtempe oni malpliigis iujn punojn pere de iu diskreta amnestio. La Foruo de la Hispanoj estas reguliga teksto kiu skizas la rajtojn kaj liberecojn de la gehispanoj samtempe ke oni listigas ankaŭ la devojn. Reale, ĝi estas retorika meĥanismo ellaborita de aŭtoritata reĝimo normigante la rajtojn de civitanoj sen politikaj rajtoj, sub la kontrolo kaj senlima aŭtoritato de ŝtatestro kiu estas devigita respekti neniun leĝon kaj estas leĝe rajtigita proklami ĉiun ajn leĝojn.

Ja, la fino de la Monda Milito vekis en la sferoj de la hispana reĝimo la timon ke oni metu finon al la frankismo pro ties kunlaborado kun la venkitaj faŝismoj. La falo de la itala monarkio estis minaca signo de ebla simila disvolviĝo de la aferoj en Hispanio. Kvankam la itala Reĝo intecis manovri por savi sian dinastion rompante kun la faŝismo kaj eĉ arestante Mussolini-n, li ne kapablis eviti poste la ruinon de la monarkio en tiu lando, unue per la decido de Mussolini, liberigita de la germanoj, kaj poste per la dispono de la venkintaj aliancanoj. En Hispanio la afero estus povinta disvolviĝi simil-maniere, kaj se fine ne okazis tiele estis pro la estiĝo de nova internacia situacio de streĉiĝo inter la militaj venkintoj, inter la komunista Sovetunio kaj la kapitalistaj potencoj, tio estas, la t. n. «Malvarma Milito». La reĝimo de Franko, pro ties kontraŭ-komunista karaktero povus fariĝi natura aliancano de la kapitalista mondo preta kontraŭbatali la ekspansion de la komunismo en la mondo.

# La jaroj de izoliĝo kaj ties superado



Kiam, en aŭtuno de la jaro 1944, alvenis al la landlimo inter Hispanio kaj Francio fortoj de la kontraŭgermana rezistado, estis inter ili multaj hispanoj ekzilitaj ekde la fino de la civilmilito. Tiuj hispanoj, plenaj je konfido post ilia venko sur la germana armeo sed mise informitaj pri la tiama realaĵo de la internacia politiko efektivigis subitan militeniron en Hispanion tra kelkaj pirineaj pasejoj en la provincoj de Navario, Osko (Huesca) kaj Ilerdo (Lérida). Tiele komenciĝis la kontraŭfrankisma gerila militado kiu daŭris kelkajn jarojn. La gerilanoj konfidis trovi la hispanan popolon preta batali kontraŭ la diktaturo. Ili ne estis ĝuste taksintaj la efikon de la frankisma subpremado dum la kvin jaroj pasintaj ekde la fino de la civilmilito. La gerilaj atakintoj estis tute forbalaitaj far la frankista armeo sed poste okazis dua enfiltriĝo laŭ alia strategio kaj dum kelkaj jaroj la gerilanoj bataladis en la landaj montaroj kaj diversaj urbaj centroj. Sed ĝenerale ilia batalado rezultis fiasko ĉar la enlandaj amasoj ne kunlaboris kun tiutipa agado.



Johano de Burbono

Tamen al la frankisma reĝimo ne mankis aliaj problemoj. Post la finiĝo de la Mondmilito plejparto el la ambasadoroj forlasis Madridon kaj la hispana regantaro restis izolita el la internaciaj rilatoj. Ŝajnas ke la kialo de tiu politiko ne estis la pasinta kunlaborado de Franko kun Hitler sed la persisto de iu reĝimo kiu, esence, estis ŝanĝinta nenion ekde ĝia origino. Se Hispanio estus evoluinta, kiel faris Turkujo, eble oni estus forgesante ĝian kunlaboradon kun Germanio kaj Italio. En marto de 1945, Johano de Burbono, filo de la lasta reĝo de Hispanio, publikigis manifeston mendante al la Generalo Franko la restarigon de la monarĥio. Du monatojn poste okazis la finruiniĝon de la reĝimoj de Hitler kaj Mussolini. Jam en la kunsido de Jalto, en februaro de tiu jaro, inter Stalin, Roosevelt kaj Churchill, estis kondamnita la reĝimo de Hispanio. Ĉi tiu lando ne estis poste akceptita en la Unuiĝintaj Nacioj.

La izoligo aŭ blokado de la lando signifis, krome, la rompo de la komercaj interrilatoj. Sed ĉi tio pli estis nura teorio ol fakta praktiko. La komercado, tiel de eksportado kiel de importado, pludaŭris sed tiamaniere ke la afero damaĝis nur la malriĉajn klasojn kaj pliriĉigis la posedantajn klasojn. Okazis ke rezulte de la Monda Milito estis detruitaj per la bombardadoj en la Eŭropa kontinento ĉiuj industrioj. Tiuj de Rusio estis translokitaj al Siberio antaŭ la germana invado. La fakto estis ke la solaj altfornoj funkciantaj en Eŭropo troviĝis ĝuste en Hispanio. Kaj pro la dummilita detruado estis ega neceso rekonstrui ĉion, do estis ega neceso je fero kaj ŝtalo kaj oni devis importi ĝin el Hispanio kun aŭ sen blokado, t. e. funkciis la nigra, eksterleĝa merkato, kaj la prezo de la feraj produktaĵoj plialtiĝis senlime. La hispanaj entreprenistoj de la ferindustrio kolose pliriĉiĝis sed la laboristoj de tiuj entreprenoj ricevadis malaltajn salajrojn. La dumtaga salajro de tiuj laboristoj estis inter 15 kaj 20 pesetoj kaj dume unu litro da olivoleo kostis 150 pesetojn. Tiuj laboristoj troviĝis antaŭ la stranga fakto ke la feraj iloj per kiuj ili laboradis: marteloj, fajliloj, mankrankoj, stangoj… estis pli altekostaj ol iliaj salajroj, do tiam oftis la rabado de tiuj iloj kaj estis necese kontroli ĉiutage ke la laboristoj forlasante la fabrikojn post la taglaborado ne alportu kun si tiun feran ilaron. Kaj estis neeviteble ke la kontrolistoj mem komplice partoprenu en la ilar-rabado. Cetere, multaj rabadis en tiaj cirkonstancoj, iuj pro neceso kaj aliaj pro ambicio. En iu industria fabriko de Asturio la Direktoro mem estis eksigita kiam oni konstatis ke li efektivigadis rabadon kiu alportis al li gajnon je sep milionoj da pesetoj. Io simila okazis en la rubejoj de tiuj ferindustrioj, t. e. la loko kie oni formetadis la skorion rezultintan el la fero-farado. Post tuta jarcento produktante feron, iu fabriko de Langreo (Asturio) posedis rubejon aŭ skorio-montaron kelk-kilometre longan kaj kun alto je 20 metroj aŭ pli. Inter la skorio neeviteble forŝoviĝis eta kvanto da fero kies rekuperado ne rezultis rentebla. Sed pro la ega plialtiĝo de la prezo de la fero, eĉ tiu eta kvanto da fero el la skoriejo fariĝis altekosta, kaj jen dekoj, centoj, da personoj sin ĵetis ĉiunokte por dispecigi tiun artefaritan montaron por elpreni la tie dismetitan feron, kaj estis necese mobilizi grand-kvanton da policistoj el la civila gvardio por gardi tiujn lokojn. Estas nenecese aldoni ke fine eĉ tiuj policistoj partoprenis komplice en la profitoj de tiu eksterleĝa merkato. Sed, ja, al plejparto el la malriĉuloj de la lando ne eblis atingi ian ajn profiton ĉu laŭleĝan aŭ eksterleĝan.


Se tio okazis rilate al tiu produktaĵo por eksportado nun ni vidos kiel funkciis la afero rilate al la importado de fremdaj produktaĵoj, ekzemple la kuraciloj. Ekde la jaro 1937 estis en Hispanio granda epidemio je tifo kiu okazigis multajn mortojn. De 1943 al 1950 malfortiĝis sed ankoraŭ persistis la malsano. Antaŭe la tifo-malsanuloj nepre mortis, sed de antaŭ kelkaj jaroj ekzistis iu efika kuracilo nomata «penicilino». Nu, en Hispanio, pro la blokado, tiu kuracilo, ellaborita eksterlande, ne estis normale trovebla en la apotekoj. Kompreneble, ankaŭ ĉi-kaze funkciis la eksterleĝa merkato, sed la penicilino havis, pro la blokado, tre altan prezon. Por kontraŭbatali la malsanon estus necesaj, proksimume, ses aŭ ok dozoj da tiu kuracilo, kaj en la nigra merkato la senskrupulaj apotekistoj kaj aliaj personoj kiuj negocadis per tiu produktaĵo postuladis po 400 pesetojn por ĉiu dozo. Ni jam montris kiel malaltaj estis tiam la salajroj de la laboristoj. Do la hispanoj kiuj ne povis pagi tian altan koston por la penicilino estis kondamnitaj al morto. La aŭtoro de ĉi skribaĵo, estante sep-jara en 1950, estis iu el la tifo-malsanuloj de tiu jaro. La tag-salajro de mia patro estis 18 pesetoj, do, estis al li tute neeble pagi la 3.000 pesetojn necesajn por akiri la necesan penicilinon. Li solvis la aferon ŝtel-laborante aŭ labore ŝtelante dum multaj noktoj en la skoriejo de la fer-industrio ***Duro-Felguera*** kaj eble subaĉetante iun gardiston por tion fari.
Nu, tia estis la penado de multaj gehispanoj dum tiuj jaroj kiam la reĝimo de Franko penis transvivi la malfacilaĵojn rezulte de la ekonomia kaj politika blokigo. Por tiu rezistado kontraŭ la internacia malamikeco la frankismo sin apogis sur la malmultaj fremdaj registaroj kiuj agnoskis la reĝimon kaj konservis kun ĝi la diplomatiajn rilatojn: Portugalio, Vatikano, Argentino… kaj organizis kolosajn manifestaciojn de popola apogo al Franko. Alia iniciato en tiu linio estis la ellaboro de iu leĝo nomata “pri Sukcedado” kiu difinis Hispanion kiel Reĝlandon sed lasante al la diktatoro la povon decidi kiu estos kronita kiel reĝo kaj kiam tio okazos. Johano de Burbono proklamis manifeston kontraŭ tiu leĝo. La hispana presaro, sub la frankisma cenzuro, silentigis tiun manifeston sed dume efektivigis kampanjon kontraŭ ĝia aŭtoro kaj favore al la frankista leĝo, kiu sekve estis proponita al la popolo en Referendumo. La rezulto de tiu popola konsulto estis amase favora al tiu leĝo, kiel kutime okazas en tiutipaj referendumoj, kaj tio signifis ke Franko daŭre povus senlime regi kiel unika deponanto de la politika povo.
Kiam Usono pretigis la t. n. Marshall-Planon por la rekonstruado de la eŭropaj militintaj landoj, Hispanio restis for de tiu helpo. La plano, orientita al la eŭropaj landoj okupitaj dum la mondmilito etendiĝis ankaŭ al landoj kiel Germanio kaj Italio kiuj estis batalintaj kontraŭ Usono. La sola kondiĉo por ricevi tiun helpon estis ke la lando havu ian demokratian strukturon. Ricevis iom da tiu mon-helpo eĉ Portugalio kie la demokratio estis nur formala, sed ne povis esti aplikita al la Frankisma Hispanio kie ne estis eĉ formala demokratio. Ekzistis ĉi tie neniun liberecon, nek pri kunvenado, nek pri asociiĝo, nek pri esprimo…
La malfacilaĵoj de la hispana popolo pri nutrado iome estis mildigitaj de la Argentino tiam regata de Generalo Perón. Dum tiuj jaroj multaj miloj da tunoj da argentina greno estis senditaj al Hispanio. Kiam, somere de la jaro 1947, vizitis Hispanion Eva Perón, edzino de la Argentina regestro, ŝi estis apoteoze akceptita far de la frankisma reĝimo pro la politika apogo kaj de la hispana popolo pro la nutrad-helpo.
La internacia teniĝo rilate al Hispanio lante evoluadis laŭ la estiĝo kaj posta pliakriĝo de la tiel nomata «Malvarma Milito». La fino de la blokigo al Hispanio povas esti datumita en 1950. Tiujare la UNO rekomendis la restarigon de la diplomatiaj rilatoj kun Hispanio kaj tiujare mem restarigis tiujn interrilatojn la usona registaro. Sed la malfacilaĵoj en Hispanio nur tre malrapide pliboniĝis de tiam. La politika kaj ideologia interfrontiĝo de la kapitalistaj landoj kun la komunista bloko estis favora por la reĝimo de Franko kaj ties agnosko fare de multaj okcidentaj landoj. La porci-distribuado de nutraĵoj per dozo-kuponoj daŭris ankoraŭ ĝis la jaro 1952. En la jaro 1953 oni subskribis akordon inter la registaroj de Usono kaj Hispanio por la starigo de kelkaj usonaj militistaj bazoj en la hispana teritorio. En la sama jaro oni susbskribis iun konkordaton inter la hispana registaro kaj la Vatikano de Pio XII. Tiu interakordo garantiis grandajn ekonomiajn kaj alitipajn privilegiojn por la Eklezio. Dume Franko konservis la povon decide interveni en la elektado de episkopoj kaj daŭre ĝuis la faraonan privilegión eniri en la templojn subpaliume. En tiu epoko, kvankam ne tiel estis publike evidenta, komencis plifirmiĝi la politika influo de la ministro Carrero Blanco sur la decidoj de la diktatoro.
La situacio de la diktaturo pliboniĝis ankaŭ en kio koncernas al la rilatoj kun la monarkistoj. En 1948, en la jakto “Azor” renkontiĝis Franko kaj Johano de Burbono. Tiam jam estis tute perdita la ebleco ke Johano reĝu en Hispanio. La temo de la intervidiĝo estis la ebleco de Johano-Karlo, filo de Johano de Burbono iam ricevu la hispanan kronon. Oni interakordis pri la studado de la juna pretendanto en Hispanio kiel unua paŝo por la restarigo de la monarkio en ĉi tiu lando, restarigo kiu, ĉiukaze, ne okazus antaŭ la morto de Franko.



**Vizito de Eva Perón al Hispanio kaj ties apoteoza akcepto fare de la reĝimo kaj la popolo**

Ekde 1954 estis notinda la ekonomia rekuperiĝo de la lando. La vivnivelo de la gehispanoj fariĝis komparebla al tiu de antaŭ la civil-milito. Iom-post-iom, tre lante komence, vekiĝis la laborista movado kaj okazis la unuaj strikoj post la civil-milito, en Barcelono kaj Eŭzkadio. Ankaŭ la gestudenta movado provis siajn unuaj mobilizojn. En la jaro 1955, dank' al la usona apogo, Hispanio estis akceptita en la **Unuigitaj Nacioj**. La elektado de Eisenhower kiel usona Prezidento signifis pliboniĝon de rilatoj de tiu lando kun Hispanio spite al politika kaj ideologia stagniĝo de la reĝimo en ĉi tiu lando. Estante internacie akceptita la frankismo, tia kia ĝi estis, la reĝimo ne sentis la neceson evolui. Oni kultivis la nescion kaj neklerecon de la popolaj amasoj pere de spektakloj kiel la futbalo, tre apogitaj kaj promociitaj fare de la politika povo.

En 1956 pliakriĝis la opozicio de la universitataj gestudentoj rilate al la reĝimo de Franko. Tre altsignifa estis la fakto ke la kritika sinteno de la kleraj gejunuloj rilate al la registaro, la ŝtata hierarkio, la armeo kaj la Eklezio evidentiĝis eĉ en la sociaj sektoroj iam apogintaj la ribelon de 1936 kontraŭ la Respubliko kaj la reĝimon de Franko. Tio montris la generacian rompiĝon de la sociaj sektoroj sur kiuj sin apogis la frankismo. Kiel reago kontraŭ la gestudenta opozicio Franko, reorganizis la registaron kaj mendis al iu falangisto, Arrese, la ellaboradon de iuj nomataj "fundamentaj leĝoj" por revivigi la sistemon, sed la projekto havis nur la apogon de la ***Falange***. Sin oponis al ĝi la katolikoj, la armeo kaj ceteraj ne-falangistaj elementoj de la reĝimo. La projekto estis arkivita kaj la reĝimo devis alfronti ankaŭ la necesan reformon de la ekonomio per la starigo de fiska sistemo kaj pli egaleca distribuado de la rentoj. Por ne ektimigi la posedantajn klasojn, la Admiralo Carrero Blanco, kies influo sur Franko estis plikreskante, proponis la formadon de registaro de teknokratikuloj.



**Vizito de Eisenhower en 1959**

En la internacia tereno, la eŭforio pro la eniro de Hispanio en **UNO** kaj en la **UNESKO**, estis malvarmigita pro la problemo de Maroko. La jardeko post la mondmilito vidis la procezon de senkoloniigado patronita de la **UNO**. Kaj tiu procezo atingis ankaŭ la Marokon koloniigitan de Francio kaj Hispanio. Ni memoru ke Hispanio bataladis en tiu teritorio ekde la komenciĝo de la jarcento. Tie okazis la fulmo-brila militista kariero de Franko. El tie li eliris en 1936 gvidante la armeon ribelintan kontraŭ la Respubliko. Franko estis ambiciinta pligrandigi la tiean hispanan zonon domaĝe al Francio post la malvenko de tiu lando antaŭ la hitlera armeo, kaj jen en 1956 pro iu ironio de la destino devis estis la registaro de Franko kiu kontraŭvole, pro la internacia premo, kiu efektivigis la procezon de senkoloniigo de la koncerna maroka zono. La kontrolita presaro de la reĝimo apenaŭ informis pri tiu malagrabla temo, sed la hispana armeo devis suferi la frustracion pro tiu afero.

La registaro de teknokratikuloj proponitaj de Carrero Blanco ekrolis en 1957. Krom Carrero mem, estis ministroj de tiu registaro, inter aliaj, Cirilo Cánovas García, Fernando María de Castiella, Alberto Ullastres, Jesús Rubio, Camilo Alonso Vega, Mariano Navarro Rubio, Jorge Vigón, José Solís Ruiz, Fermín Sanz-Orrio… Tiu registaro, kiu anstataŭis alian kiu estis daŭranta nur unu jaron, devis alfronti la gravan kaj malfacilan taskon ordigi la ekonomiajn aferojn de la lando definitive forlasante la aŭtarkion de la postmilito kiu tenis la landon dronita en marasmo dum 18 jaroj. Kune kun Portugalio, Hispanio estis tiam la plej malriĉa lando en Eŭropo. En 1958 la ekonomia situacio de Hispanio estis preskaŭ je bankroto; la helpo de la **Tutmonda Mond-Fonduso** ebligis superi tiun situacion. La nova reganto proklamis iun nomatan «Plano je Stabiligo» kies celo estis liberaligi la hispanan ekonomion, kun kontrolo kaj malpliigo de la publika elspezado, starigo de fiska reformo, limigo de la puntosistemo kaj frostigo de la salajroj, sed oni pliintensigis la eksteran investadon de Hispanio kaj oni potencigis la turisman industrion. Rezulte de tiu plano en la sesdekaj jaroj ege kreskis la hispana ekonomio, sed en tiu jardeko estis alia protektismaj pozicioj kiuj favoris la grandajn hispanajn korporaciojn, regitaj de la bankoj, kio malhelpis la firmigon de la konkursistemo, kaj lasis pezan ekonomian legacon kiu malhelpis la modernigon de la hispana ekonomio.

Aliaj problemoj, kiujn la reĝimo spertis en tiuj jaroj estis iu agreso de marokaj fortoj, en 1957, en iuj el la malmultaj hispanaj teritorioj tiam restantaj en Afriko, kaj iu strik-movado, en 1958, en Katalunio, Eŭzkadio kaj Asturio. Sed la frankista reĝimo estis plene firmigita. En 1959 okazis la vizito al Hispanio de la usona Prezidento Eisenhower. Miliono da personoj bonvenigis kaj aklamis lin. Tiu evento estis kvazaŭ la signo de la kompleta finiĝo de la ekstera izoliĝo de la frankismo. Paradokse, tiam estis ekzilita en Hispanio Domingo Perón iama subtenanto de la reĝimo de Franko. Li estis eksigita el la povo en Argentino en 1955 far iu militista puĉo. Lia edzino Eva estis forpasinta en 1952.



# La long-daŭra apogeo de la frankista reĝimo

Ekde la jaro 1960a la reĝimo de Franko estis sufiĉe firme enradikita en la lando sed tiu firmeco rilatis nur al la daŭro de la vivo de la diktatoro. La ĉefa zorgo de la fortoj interesitaj en la konservado de tiu sistemo estis la eventualeco de la forpaso de la ŝtatestro. Ĝis tiam nenio estis leĝe instituciigita por garantii la persiston de tiu eksterordinara pov-koncentriĝo en alies manoj. Do, la etapo tiam komenciĝanta estis signita de la intencoj prepari la estontecon de la reĝimo. Sed inter la ĝuantoj de tiu sistemo ne estis klara interakordo pri la aplikenda formulo.

Dume, fojfoje la presaro informadis pri la aresto de politikaj aktivuloj celantaj rekonstrui la Socialistan kaj la Komunistan Partiojn.

En la 60aj jaroj de la jarcento notindis la evoluo de la poziciiĝo de la RomKatolika Eklezio. Multaj junaj pastroj evidentigis malkontenton rilate al la tradicia kunlaboro de la eklezia hierarkio kun la frankisma reĝimo. La soci-ekonomia malegaleco kaj la kunkulpeco de la klerikaro kun la klasa ekspluatado vekis en la novaj generacioj de hispanaj katolikoj rifuzon rilate al ties religiaj gvidantoj kaj al la konkordato de la Eklezio kun la reĝimo de Franko. Krome, en la jaro 1963 estis inaŭgurita la Dua Vatikana Koncilio kun alvokiĝo de renovigo de la Eklezio. De tiam la premo por la ŝanĝo de poziciiĝo de la hispana Eklezio venis ankaŭ –kaj ĉefe– de ekstere, t.e. de la universala Eklezio. Laŭ la nova spirito reganta en tiu institucio estis netolereblaj la politikaj diktaturoj kiaj la hispana frankismo. Ĉi tio alportis konfuzon kaj nekomprenon al la aŭtoritatoj de la reĝimo, inter ili la diktatoro mem, kiuj ne komprenis, kaj taksis kiel perfidon la fakton ke la Eklezio ne respondis per dankemo kaj kunlaboro la grandan apogon kaj prebendojn kiujn la religio estis ricevinta el la frankismo.



Edziĝo de Johano Karlo de Burbono

Alia hispana novaĵo de tiuj jaroj estis la apero de la terorisma organizaĵo ETA. Ja, la fondiĝo de tiu organizaĵo jam estis okazinta en la jaro 1951 kadre de la eŭska naciismo, sed iom-post-iom ĝi evoluis al radikalaj pozicioj kaj perforta agado alprenante karakteron de preskaŭ ekskluzive terorista organizaĵo. Laŭ la pasado de la jaroj la terorista agado de tiu grupo –murdoj, kidnapado…– fariĝis problemo por la reĝimo kaj ties policaj fortoj.

En la jaro 1960 la hispana registaro komencis la demarŝadon por la eniro de nia lando en la Eŭropa Komuna Merkato, antaŭanta internacia organizaĵo de tio kio poste fariĝus la nuna Eŭropa Unio. Estis klare tiam ke la konkretiĝo de tiu eniro devus atendi la politikan normaliĝon en la lando, kio ne povus okazi dum la vivo de la diktatoro. Ĉi tiu suferis en 1961, estante 69-jaraĝa, iun “akcidenton” aŭ tiel estis nomita de la presaro; li vundiĝis en unu mano kiam eksplodis pafilo kiun li estis uzante por ĉasado. Posta esploro pri la afero rivelis ke la municio estis manipulita sabotad-cele. Tiu okazaĵo vekis en la medioj de la reĝimo zorgon pri la politika estonteco antaŭ la eventualeco de la morto de la diktatoro.

Inter la iniciatoj tiam elpensitaj kaj efektivigitaj por asigni leĝan karakteron al la reĝimo estis la t. n. "**Fundamentaj Principoj de la Movado**". «Movado» aŭ «Nacia Movado» estis la nomo kiun la reĝimo asignis al si mem jam dekomence. La "Fundamentaj Principoj" estis kvazaŭ doktrinaj dogmoj kiuj, esence, celis la poreternan daŭron de la reĝimo kaj ties ecoj kaj formoj. Reale, en la formulado de tiuj fundamentaj aŭ bazaj principoj estis nenio nova; temis pri refirmigo de la programo kiu inspiris la reĝimon: unueco pri la destino de la patrujo, katolika konfeseco, unueco de la homoj kaj la teroj de Hispanio, politika vivo organizita pere de naturaj entoj –familio, municipo, sindikato– (la sindikato estis la unusola oficiala "vertikala" sindikato de la reĝimo). En tiu skemo oni ekskludis la politikajn partiojn, la presaro restis submetita al fera kontrolo kaj la klasbatalo estis rifuzita surbaze de la aserto ke ĝi estis superita fare de ŝtato kiu celas la komunan intereson de la tuta loĝantaro. De tiam, je la komenciĝo de ĉiu politika posteno, la alprenanto de la politika funkcio devis ĵuri la Bazajn Principojn de la Movado, kaj tiu ĵuro signifis, dum la vivo de Franko, totalan lojalecon al la diktatoro, kaj post ties forpaso, totalan respekton al la plukonservado de ties reĝimo.
Dum la jaroj 1962 –jaro de la naskiĝo de la komunista sindikato CC.OO. (Laboristaj Komisioj)– kaj 1963 okazis grandaj laboristaj strikoj, la plej grandaj ekde la fino de la civil-milito, en la industriaj centroj de la lando. La arestoj efektivigitaj en Asturio vekis grandan movadon de solidareco kun la arestitoj; oni ellaboris skribaĵon adresitan al ĉiuj ambasadejoj kaj aliaj gravaj institucioj postulante informon pri la afero kaj petante ke oni prikonsideru la justajn laboristajn depostulojn.
La skribaĵo estis subskribita de Menéndez Pidal, Cela, Pérez de Ayala Laín Entralgo, Aranguren, Gil-Robles kaj aliaj intelektuloj kaj famkonataj personoj en la lando. La disvolviĝo de la konflikto estis silentigita en la inform-medioj kaj oni atribuis ĝin al la ĉeesto de agentoj kun fremdaj instrukcioj.
En la jaro 1962 okazis en Ateno la edziĝo de la Princo Johano Karlo kun la Princino Sofia de Grekujo. En junio de tiu jaro okazis en Munkeno kongreso de fortoj favoraj al la politika unuiĝo de Eŭropo. Partoprenis en ĝi kelkaj gravaj membroj de la hispana opozicio kontraŭ la frankismo: Salvador Madariaga, Rodolfo Llopis, Fernando Valera, Xavier Flores, Satrústegui, Gil-Robles, Alvarez de Miranda, Iñigo Cavero, Prados Arrate, Ridruejo… Spit' al la ekzistantaj diferencoj inter ili, ili interakordis pri la opozicio al la reĝimo de Franko kaj postulis ke oni ne akceptu Hispanion en la Ekonomia Eŭropa Komunumo dum ankoraŭ daŭrus la diktaturo. La frankisma regantaro reagis per politikaj disponoj kontraŭ la partoprenintoj en la kongreso kaj provizore ĉesigante iujn civitanajn garantiojn leĝe formulitaj en la "Foruo de la Hispanoj" por pli efike agadi kontraŭ ĉiu popola esprimo de opozicio.
La striko kaj la afero de Munkeno influis en la ŝanĝo de registaro okazinta en la jaro 1962. En la nova regantaro daŭre estis gravaj teknokrataj ministroj kiel López Bravo, Ullastres… Kvankam la fakta povo tiam estis en la manoj de la teknokratikistoj, aperis aliaj grupoj kiuj kontraŭstaris ilin ene de la leĝa kadro de la reĝimo kaj de la ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj tiam okazantaj, kaj ĉefe antaŭ la perspektivo de la pludaŭro de la reĝimo sen Franko. Iu el tiuj grupoj estis la partianoj de la plej absoluta senmoveco; tiu grupo estis konata en la lando sub la nomo de "bunkro" (necedema sektoro de la Movado), kaj kuraĝis atakadi ĝin eĉ parto el la leĝe permesita presaro de la reĝimo. Alia sektoro, devenanta ankaŭ ĝi el la Movado, estis tiu de la partianoj de la t. n. "politika malfermo" (apertemaj), kies tiamaj lideroj estis la ministroj Solís kaj Fraga Iribarne. Ĉi lasta, kiel nova ministro pri Turismo kaj Informado, intencis mildigi la cenzuron de la presaro sed la naturo mem de la reĝimo ne permesis grandan progreson en tiu tereno.
En la tereno de la ekonomio la frankismo atingis iajn sukcesojn sub la teknokrataj ministroj. Tre disvolviĝis tiam la turisma industrio. Ekde 1960 al 1973 senĉese kreskis ĉiujare la nombro da fremdaj gevizitantoj serĉantaj la privilegiitan klimaton de Hispanio. Dume estis konstruitaj en la lando multaj akvo-rezervujoj kaj hidroelektraj centraloj. La diktatoro faris la inaŭguradon kaj tio estis okazo de granda politika propagando de la reĝimo. Temante pri la teknokrataj ministroj, aŭtoroj de tiu ekonomia "miraklo", indas mencii ke ili estis membroj de iu religia ordeno –la t.n. ***Opus Dei***– kreita en Hispanio dum la frankisma diktaturo kaj nuntempe disvastigita kaj tre konata mondskale. La kreinto de tiu ordeno estis José María Julián Mariano Escriba Alvás, iu elitisma religiulo kiu ŝanĝis sian nomon al Josemaría Escrivá de Balaguer. La religia ordeno, ***Opus Dei,*** pro ties reakcia karaktero ne estis bone konsiderita en la Eklezio dum tiu epoko de la Dua Vatikana Koncilio, sed poste pro la involucio kiun la Eklezio suferis sub la lastaj papoj tiu organizaĵo, tre riĉa,







**Fraga Iribarne kaj Carrero Blanco** **Franko kaj Carrero Blanco** **Carrero kaj la Princo Johano Karlo**

konkeris la povon en la Eklezio, kies ekonomiajn ŝuldojn ĝi pagis. Hodiaŭ monsinjoro Escrivá de Balaguer estas sanktulo de la RomKatolika Eklezio. Dum la frankismo la ***Opus Dei*** fariĝis iu el la politikaj “familioj” de la reĝimo kaj altiris la kontraŭstaron de la ceteraj “familioj”: Falange, bunkro, apertemaj…

**TEKNOKRATISTOJ**




**Gregorio López Bravo**



**Laureano López Rodó**



**Alberto Ullastres**



**Mariano Navarro Rubio**

Inter la novaj ministroj de 1962 troviĝis homoj kiuj ne estis partoprenintaj en la civil-milito. Sed la pasinto kaj ties agmaniero daŭre pezis sur la registaro kaj la reĝimo. Tion oni povis konstati okaze de la aresto de la komunisto Julián Grimau. Li estis juĝita kaj kondamnita al mort-puno, kiun oni efektivigis per pafado. Tiukaŭze la reĝimo devis alfronti grandan ondon da senkredito en la mondo kaj ĉefe en Eŭropo. Sed tio efikis nenion kontraŭ la granda turisma fluo kiun Hispanio estis ricevante en tiu epoko kaj poste.

La teknokratista registaro elpensis kaj ekfunkciigis planon de ekonomia kaj sociala disvolviĝo kiu tre plibonigis la vivnivelon de la gehispanoj dum la jardeko 1963-1973. Tiu estis la epoko kiam tre disvastiĝis inter la hispana loĝantaro la uzadon kaj ĝuadon de aŭtomobiloj kaj la televido. En la jaro 1964 la reĝimo organizis kolosan propagand-kampajon pri si mem sub la slogano “25 jaroj de paco”.

Printempe de la jaro 1965 estis en la hispanaj universitatoj grava gestudenta movado, al kiu aldoniĝis kelkaj universitataj profesoroj, kontraŭ la politika sistemo. Inter la profesoroj kiuj agadis solidarece kun la gestudentoj estis Tierno Galván, Aranguren, García Calvo kaj Aguilar Navarro. Ili devis suferi poste la reprezaliojn de la aŭtoritatoj de la reĝimo. En tiu jaro okazis kroma registara ŝanĝo sed konserviĝis la ekvilibro de la ministroj apartenantaj al la diversaj familioj de la reĝimo.

Daŭre estis malakordo inter tiuj politikaj familioj rilate al la persono kiu estus reĝentronigita post la forpaso de Franko. Iuj vetis favore al la Princo Johano Karlo de Burbono (Carrero Blanco, López Rodó…) sed aliaj preferis lian kuzon Alfonso de Burbono kaj Dampiero. Meze de 1966 Franko konsentis prezenti kaj submeti al popola referendumo la t.n. “**Organisman Leĝon de la Ŝtato**”. Per ĝi, unuafoje dum la reĝimo de Franko, estis apartigitaj la postenoj de Ŝtatestro kaj Registar-Prezidento kaj oni restarigis la monarkian institucion, sed la fakta restarigo restis prokrastigita ĝis la forpaso de la Generalego Franko, kiu, laŭ tiu leĝo, estis dum-viva Ŝtatestro. Kiel Registar-Prezidento estis nomumita Luis Carrero Blanco, vera inspiranto kaj aŭtoro de tiu leĝaro. Kiel sukcedonto, kiel reĝo, de la ŝtatestro, estis designita Johano Karlo de Burbono, kiu estis sin edukinta en Hispanio dum la antaŭaj dek jaroj. De tiam li oficiale portis la titolon de “Princo de Hispanio”. Evidentas ke tiu nomumo transsaltis la normalan sukcedlinion de la reĝaj dinastioj ĉar tiam vivadis ankoraŭ la patro de tiu princo, Johano de Burbono. Tio montris la volon de Franko ekskludi la reĝecon de persono kiu iam kritikis lian reĝimon kaj ties anstataŭo per princo edukita laŭ la spirito de Principoj de la Movado. Kompreneble, ankaŭ la Princo devis ĵuri la Fundamentajn Principojn kaj promesi konservi la Movadon post la morto de Franko. Temante pri tiu aranĝo, Franko kutime diradis ke li lasos ĉion ligitan kaj bonligitan.

En 1969, kiam la reĝimo festis sian tridekjaron per la slogano “30 jaroj de paco”, okazis en Barcelono gravaj disturboj far la gestudentoj. La registaro dekretis ĉeson de la civitanaj garantioj dum tri monatoj. Iuj ministroj sin oponis al tiu dispono argumentante ke tiaj politikaj restriktoj povus damaĝi la turismon al nia lando kiu tiutempe atingadis la kvanton je 10 milionoj da gevizitantoj jare.

En aŭgusto de 1969 eksplodis la skandal-afero **MATESA**, iu temo de financa kaj industria koruptado en kiu estis implikitaj personoj apartenantaj al la teknokrataro kaj la ***Opus Dei.*** Definitive estiĝis la kontraŭ-frontiĝo inter la apertemuloj kaj la teknokratistoj. Fraga kaj Solís manovris por ke la afero estu konata pere de la presaro malprestiĝante la politikajn kontraŭulojn. Ĉi-foje Franko ne kapablis manovri inter la diversaj politikaj familioj de la reĝimo. Li formis novan registaron konstituitan je personoj lojalaj al Carrero Blanco, sed ĉi-kaze temis pri unukolora regantaro, teknokratisma. La rompiĝo inter la frankismaj familioj jam estis definitiva kaj evidenta fakto. Post la nomumo de Johano Karlo de Burbono kiel sukcedonto en la ŝtatestreco kun la titolo de reĝo, en julio de tiu jaro, la vicprezidanto de la registaro, admiralo Carrero Blanco, alprenis la gvidadon de la nova regantaro penante starigi la bazojn de paca transiro al la monarkio de la “Movado”. La nova ministro pri Eksteraj Aferoj, López Bravo, subskribis priekonomian interakordon kun la Eŭropa Komuna Merkato kaj starigis diplomatiajn interrilatojn kun la komunistaj registaroj de Ĉinio kaj la Germana Popola Respubliko. En la sfero de la kulturo kaj edukado, la koncerna ministro, Villar Palasí, iniciatis la reformon de la eduk-sistemo per iu leĝo de 1970 kiu pretendis adapti la hispanan sistemon al ties de Eŭropo, kun senpaga baza edukado. Aliaj projektoj restis nerealigitaj, kiel tiu de **Asocioj por politika agado** kaj la intenco plibonigi la interrilatoj kun la Eklezio. Ankaŭ rezultis malsukcesa la reformo de la sindikata sistemo de la reĝimo.

En oktobro de 1969 vizitis Hispanion la usona Prezidento Richard Nixon, plifirmigante la uson-hispanajn interrilatojn. Sed estis en monato decembro kiam okazis iu el la plej altsignifaj aferoj de la reĝimo de Franko; la proceso de Burgos. En ĝi estis juĝitaj, far la militista jurisdikcio, 16 aktivistoj de ETA, inter ili du pastroj, akuzitaj je kelkaj deliktoj, inter ili la murdo de iu polica komisaro. Tiu juĝafero vekis grandan intereson ene kaj for de la lando; venis multaj fremdaj ĵurnalistoj kaj advokatoj por observi la disvolviĝon de la juĝado. Cele influi sur la rezulto de la juĝo, la terorista organizaĵo ETA sekvestris la germanan konsulon de Donostio. Dume en la Eŭskia regiono okazis preskaŭ-ribela popola mobilizado, kun strikoj, manifestacioj kaj barikadoj. Reage, en Madrido okazis iu el la kutimaj kolosaj manifestacioj de apogo al la reĝimo, sed ŝajnas ke ĉi-foje la afero estis spontana, ne organizita de la regantaro mem kiel kutime. La tribunalo prononcis naŭ mort-punojn sed poste la ŝtatestro subskribis konmuton de la morto-puno al dumviva prizoniĝo.
En 1971 la geprincoj Johano Karlo kaj Sofia faris serion da vojaĝoj eksterlanden. Tio utilis de vidpunkto de la eksteraj rilatoj de Hispanio ĉar la ŝtatestro Franko dum sia longa regado apenaŭ eliris el la lando por oficialaj vizitoj (nur unu vojaĝo al Italio por intervidiĝi kun Mussolini kaj alia al Portugalio). La rilatoj de la geprincoj kun la familio de la diktatoro malfaciliĝis en tiuj lastaj jaroj de la frankismo. Okazis ke iu nepino de Franko edziniĝis al Alfonso de Burbono kaj Dampiero, kuzo de la princo kaj aspiranto, kiel ĉi tiu, al hispana reĝa trono. La gefamilianoj de la diktatoro premis ĉi tiun celante ke li ŝanĝu sian antaŭan disponon pri la heredonteco de Johano Karlo favore al Alfonso por ke iam reĝu en Hispanio la posteuloj de Franko. Sed okazis neniu ŝanĝo tiurilate.
La opozicio al la frankismo tre plifortiĝis dum tiuj jaroj sed la diversaj politikaj grupoj ne kontemplis ŝanĝojn antaŭ la malapero de la diktatoro kion oni taksis baldaŭa. La Komunista Partio estis la plej persekutita el la hispanaj politikaj fortoj fare de la frankisma reĝimo, sed tiu partio estis formulinta, de antaŭ preskaŭ dudek jarojn, politikon de nacia repaciĝo. Ĝi kontemplis pacan procezon de transiro al demokratio ekde faŝistoida reĝimo naskiĝinta el civil-milito. Tiam tiu partio estis prezidita de Dolores Ibarruri (Pasionaria) kaj ĝia Ĝenerala Sekretario estis Santiago Carrillo. La Socialista Partio havis ekde 1974 junan lideron: Felipe González. En la ne-certeco pri la estonteco tiam ekzistanta en Hispanio, eĉ la Eklezio volis distanciĝi el la reĝimo. En la kunsido de la Episkopa Konferenco de la 20 de januaro de jaro 1973 la hispanaj episkopoj esprimis klaran rifuzon de la diktatoreca karaktero de la frankisma reĝimo.
En la stratoj komencis abundi civitanaj esprimoj de malkontento… En manifestacio okazinta la 1an de majo de 1973 estis disturboj kaj iu policisto estis mortigita per ponard-pikado. Tio estis la komenciĝo de spiralo de perforto en kiuj partoprenis grupoj de la ekstremaj dekstraro kaj maldekstraro. Kaj daŭre okazadis perfort-atencoj de ETA kaj aliaj teroristaj grupoj laste aperintaj, kiel tiu nomata FRAP. En la registaro estis grava malakordo inter la ministroj ultrakonservemaj, kiuj volis ŝanĝi nenion kaj tiuj kiuj postulis ian demokratian apertecon. Franko, unuafoje dum sia longa regado, demisiis kiel Registrar-Prezidento kaj restis nur kiel Ŝtatestro. La separiĝo de ambaŭ funkcioj estis kontemplita en la reformo de 1967 sed ankoraŭ ne estis aplikita. Carrero Blanco formis novan registaron kiu politike reprezentis ian turniĝon dekstren.
La nova regantaro ne havis longan vivon, la 20an de decembro de tiu jaro, 1973, la nova Registrar-Prezidento, Admiralo Carrero Blanco mortis viktimo de terorista atenco realigita de la eŭska bando ETA. Kiam li estis adresiĝanta, per sia oficiala aŭtomobilo, ekde lia hejmo al la sidejo de la Prezidenteco de la Registaro, iu potenca bombo enmetita en artefarita tunelo sub la strata ŝoseo tra kiu la veturilo pasadis, eksplodis kaj ĵetis la aŭtomobilon dekojn da metroj supren. Carrero Blanco mortis tuj je la eksplodo kaj mortis ankaŭ iu policisto kiu akompanis lin kaj la ŝoforo de la aŭtomobilo.
Komenciĝis de tiam la rapida dekadenco de la reĝimo sed plej rimarkinde estas ke la planoj por la konservado de la frankismo post la forpaso de la diktatoro restis tre minacitaj pro la malapero de la homo kiu estis ellaborinta tiujn planojn kaj pretiĝis apikadi ilin. Post tiu evento pliakriĝis en la lando la kontraŭdiroj, kiuj ekzistis ankaŭ ene de la superreganta politika klaso, pri la politikaj formoj apliki en la estonteco, kaj plej grave estis ke je socia nivelo ŝajnis reaperi la malamo kaj la agresemo kiuj estis karakteriĝintaj la hispanan socion en la etapo antaŭ la civil-milito. Kun tiuj nigraj nuboj en la hispana horizonto finiĝis la jaro 1973 kaj la longa apogeo de la frankisma reĝimo.




**Vizito de la usona Prezidento Richard Nixon al Hispanio en oktobro de la jaro 1969**



# Ligita kaj bonligita

Tuj post la dissaltigo de la blendita aŭtomobilo de la admiralo Carrero Blanco fariĝis eventuala Registrar-Prezidento, laŭ la kutimo kaj la leĝoj, la tiama Vic-prezidento. Tiam okupis tiun politikan postenon Torcuato Fernandez-Miranda Hevia. Li estis naskiĝinta en nia urbo, Gijón, en 1915. Li estis Profesoro pri Politika Rajto, kaj pri ĉi tiu temo li estis rolinta kiel instruisto de la Princo Johano Karlo. Antaŭe, dum kelkaj jaroj, li estis Rektoro de la Universitato de Oviedo. Li estis konsiderata unu el la politikistoj de la frankismo pli favoraj al pordemokratia evoluado de la reĝimo.
Sed lia regantar-prezidanteco estis nur provizora, eventuala, kaj daŭris nur naŭ tagojn. Franko, eble influita de siaj plej proksimaj geparenculoj, uzis sian kapablon nomumi novan Prezidenton de la registaro kaj la elektito estis Carlos Arias Navarro. La biografio de ĉi lasta ne tiel estis promes-plena. Dum la civil-milito oni aljuĝis al li la titolon de "la buĉisto de Malago" pro la kruelaj reprezalioj kiujn li organizis en tiu provinco dum sia rolado kiel ĵur-akuzisto. Oni atribuas al lia demarŝado la morton de pli ol 4.300 disidentoj. Oni konsideris lian nomumon kiel iun venkon de la plej reakcia sektoro de la frankismo, la t.n. "bunkro".
Sed la emo pri politikaj ŝanĝoj tiel estis granda en la hispana socio ke eĉ reakciulo kia Arias sin sentis devigita promesi ian politikan aperturon. En diskurso kiun li prononcis en la Frankisma Korteso la 12an de Februaro de 1974, li, eĉ se sufiĉe ambigue, esprimis politikan intencon liberaligi la reĝimon. Interalie, li parolis pri la ebleco enkonduki en tiun sistemon. kiu ĝis tiam estis unupartia, la ekzistadon kaj funkciadon de politikaj asocioj. Oni komprenis ke sub la titolo "politikaj asocioj" oni devis interpreti "politikaj partioj" sed la esprimo "politikaj partioj" estis malpermesita ĉar la kelkdekjara propagando de la reĝimo senĉese abomenis pri la plurpartiaj sistemoj". Post tiu dato la landa presaro tre ofte temadis dum multaj monatoj pri la t.n. "Spirito de la 12a de Februaro". Neniam oni sciis ĉu per tiu mesaĝo la Prezidento Arias Navarro volis trompi la hispanan demokrataron kiu emis politikajn ŝanĝojn aŭ la bunkron kiu estis promociinta lin al lia registara posteno. Eble ĉi tiu afero ne estis klara eĉ por li mem. Fakte, oni leĝigis kaj entreprenis poste la konstituadon de politikaj asocioj; kompreneble, la politiko de ĉi tiuj estis tute kongrua kun la "Bazaj Principoj de la Movado". Trompitaj aŭ ne la demokratiemuloj, la bunkro neniam simpatiis al la sistemo de politikaj asocioj kaj ĝenerale al la politika aperturo de Arias Navarro, pri kiu ili malkonfidis samtempe ke apogadis lin kontraŭ aliaj pli apertemaj politikistoj (la ministroj Fraga Iribarne kaj Areilza). Sed por kontraŭbatali la Spiriton de la 12a de Februaro la reakciularo de la bunkro mem uzadis la eblecojn de la reformo kaj ili mem kreis siajn proprajn politikajn asociojn ene de la leĝa kadro de la sistemo. Tiele naskiĝis kelkaj faŝistoidaj asocioj inter kiuj estis la plej fama kaj potenca la t.n. "Nova Forto" estrita de la advokato Blas Piñar.
Sed oni devas ne pensi pri granda ebleco de ŝanĝo dum la frankismo. Kelkaj okazaĵoj de 1974 mem montris ke en la Hispanio de Franko ĉio restis ligita kaj bonligita. Kiam iu eŭska episkopo, Añoveros, postulis verajn politikajn liberecojn la Prezidento Arias volis ekzili lin kaj tio preskaŭ provokis gravan konflikton kun la Eklezio. Krome en tiu jaro oni efektivigis kelkajn mort-punojn. Plej grava ŝoko por la reĝimo estis ke la 25a de aprilo de 1974 okazis en la najbara lando Portugalio militista puĉo kiu metis finon al la tiea diktaturo simila al la hispana. La situacio en Portugalio estis tre zorgiga por la hispana frankismo ĉar ĝi poste evoluis al pli radikalaj revoluciaj pozicioj. En septembro de 1974 kaj marto de 1975 okazis en Portugalio politikaj ŝanĝoj kiuj metis la landon sub la kontrolo de politikaj fortoj, ĉefe armeaj, de ekstrema maldekstraro. En tiu konjunkturo la Prezidento Arias Navarro oferis al la usona registaro la kunlaboron de Hispanio en ebla milito kontraŭ Portugalio.
Sed ankoraŭ en 1974, en julio, Franko estis hospitaligita pro grava malsano de flebito kiu okazigis al li intensan hemoragion. Dum la tempo kiam la diktatoro restis hospitaligita kaj konvaleskanta, ĝis la 2a de septembro, la Princo Johano Karlo rolis kiel Ŝtatestro. Sed de tiu dato la diktatoro reprenis sian funkcion kaj estis elpelitaj el la registaro du ministroj, Pío Cabanillas kaj Barrera-de-Irimo, kiuj estis publike manifestinte ke Franko ne estis en bona farto por repreni la povon. La reveno de la diktatoro signis la finon de la Spirito de la 12a de februaro kaj la venkon de la bunkro. Arias Navarro minacis pli akre kontraŭbatali la opozicion.

Ekzistis la diversaj politikaj asocioj kreitaj laŭ la leĝaro inspirita de la fama “12a de februaro” sed tiu ekzistado havis nulan efikon ĉar kvankam tiujare oni devus fari balotadon por elekti novan Parlamenton, la registaro decidis pluvalidigi la antaŭan parlamentanaron por eviti la balotadon. Do, la lando restis haltigita, senmova, de politika vidpunkto dum kreskadis la strikado de la laboristoj pro la tiam ekzistanta ekonomia krizo.

Kaj pli bedaŭrinde estis ke plu dauris la teroristaj atencoj, ne nur en Eŭskadio sed en aliaj punktoj en la lando, fare de ETA kaj alia terorisma organizaĵo, la FRAP, kiu fariĝis fama tiam. Arias igis aprobi ian kontraŭterorisman leĝon kiu estis adresita pli kontraŭ la presaro ol kontraŭ la teroristoj mem. La involucio de la reĝimo estis kompleta. La dekadenco de Franko estis evidenta; li jam preskaŭ neniam aperis publike. La institucia vakuo estis kvazaŭ pov-vakuo.

En monato septembro okazis en Madrido, Barcelono kaj Burgos juĝ-procesoj kontraŭ membroj de ETA kaj FRAP. Dekunu el ili estis kondamnitaj al mort-puno. Franko indultis ses, sed la ekzekuto de la ceteraj kvin provokis kelkajn manifestaciojn kontraŭ la hispanaj ambasadoj en multaj landoj. Tiu de Portugalio estis tute detruita far iu kolerigita amaso. Iuj landoj retiris siajn ambasadorojn el Hispanio. La 1an de oktobro tri policistoj estis murditaj en Madrido far iu terorista atenco. La kutima manifestacio de apogo de la partianoj de Franko en la placo antaŭ la Reĝa palaco de Oriento estis la lasta publika apero de la diktatoro. Post la 12a de oktobro la informmedioj ĉiutage pritemis la sanstaton de la diktatoro, kiu pli kaj pli kompllikiĝis kaj malpliboniĝis dum la sekvintaj 39 tagoj kaj la operacioj kiujn oni faris al li. Fine la 20an de novembro oni publikigis la informon de lia forpaso.



Tocuato Fernández-Miranda



**Carlos Arias Navarro**

Dum la lastaj semajnoj de la vivo de la hispana diktatoro la regantaro de Maroko entreprenis politikan operacion por la aneksado de la OkcidentSahara teritorio tiam sub la kontrolo de Hispanio. La operacio, nomita “Verda Marŝo” konsistis el iu granda, homamasa marŝado de proksimume 350.000 plejparte senarmilaj homoj el Maroko, el la sudo de tiu lando al la kolonio de Hispanio. En tiu teritorio Hispanio, laŭ postulo de la **UNO** estis organizinta referendumo en kiu la tiea loĝantaro voĉdonis favore al sendependiĝo, tamen Hispanio cedis al la premo de Maroko kaj forlasis tiun teritorion al la avideco de la reĝo de tiu lando. De tiam ekzistas tie nesolvita konflikto pri kiu sufiĉe kulpas Hispanio, kaj pli konkrete la frankisma reĝimo kiu daŭris ankoraŭ dumtempe post la morto de la diktatoro.

Ja, la transiro al demokratio estis malfacila procezo kaj ĝi efektiviĝis laŭ neatendita maniero. Kelkaj faktoroj helpis en la sukceso de tiu procezo: la granda ekonomia disvolviĝo atingita dum la lastaj jardekoj kaj la ekzistado de monarkio legitimita de la antaŭa reĝimo kaj kun alvokiĝo atingi legitimecon por la estonteco. Samtempe estis malfavoraj faktoroj kiel la ekzistado de la politikaj kaj sociaj fortoj kiuj gajnis la civil-militon kaj apogis la frankismon dum preskaŭ kvardek jaroj. La reĝo Johano Karlo celis impulsi la transiron al demokratio sed ene de la valida leĝaro, eĉ kiam oni devis ŝanĝi la leĝojn oni devis fari tion laŭ leĝa maniero. Kompreneble, la ŝanĝoj celitaj de la reĝo koncernis nur al la politika sistemo, ne al la ekonomia, kapitalista karaktero de la sistemo.

En la transira vojo al la demokratio la unua reĝa dispono estis la nomumo de Torcuato Fernández-Miranda kiel Prezidento de la Parlamento. Tiu nomumo kaj aliaj postaj necesaj paŝoj trovis la opozicion de reakciaj fortoj de la reĝimo instalitaj en la diversaj organoj, kiel la Regna Konsilantaro, kies konsento estis necesa laŭ la leĝaro desegnita de Carrero Blanco kaj per kiu Franko pretendis lasi ĉion «ligita kaj bone ligita». Fine oni povis venki la reziston de tiuj opoziciantoj kaj Torcuato fariĝis Prezidento de la Kortesoj kaj de tiu posteno li multe povis influi por efektivigi kaj akceli la procezon de demokratia transirado. Sed la procezo devis esti malrapida. La sama Regna Konsilantaro havis laŭleĝan povon por aprobi aŭ malaprobi la nomumon de nova Registrar-Prezidento. Tial, tiurilate la reĝo devis toleri la pluregadon de Arias Navarro, kiu de tiam, kune kun la ceteraj fortoj de la bunkro, kontraŭstaris kaj malhelpis ĉiun paŝon survoje al la demokratio. Tamen oni sukcesis ke en la nova registaro estu sufiĉe granda nombro da apertemaj ministroj: Fraga, Solís, Adolfo Suárez, Areilza, Martín Villa… Oni povas resumi la situacion dirante ke la nova regantaro –ĉiunivele, ne nur la Registaro– estis kompromiso de fortoj ligitaj al la frankisma reĝimo kaj reformistaj fortoj celantaj la demokratiigon. Kompreneble, tia situacio ne povis esti tre stabila, abundis la streĉiĝo kaj la kontraŭdiroj inter ambaŭ diversclelaj sektoroj. Dume la landa loĝantaro ne restis kvieta; oftis la manifestacioj de la amasoj postulantaj liberecon kaj samtempe mobiliziĝis ankaŭ la bunkro aŭ ekstrema dekstraro per amasaj manifestacioj, kaj ne mankis perfortaj agoj el kiuj rezultis vunditoj kaj mortintoj. Ŝajnis ke povis reviviĝi la malamo kaj la perforto kiu signis la etapon antaŭ la civilmilito… Krome, por pli kompliki la aferon, la teroristaj organizaĵoj persistis en siaj atencoj kaj sekvestroj de gravaj kaj aŭtoritataj personoj. La sesmonata daŭro de la nova registaro estis periodo de politika senorientiĝo. Arias Navarro eraris pensante ke li povus konservi la substancon de la frankisma reĝimo ŝanĝante nur ĉi ties plej aŭtoritatecajn aspektojn.

Iom-post-iom sed tre malrapide la Parlamento, kiu ne estis renovigita, subgvide de Torcuato Fernández-Miranda, entreprenis la studon kaj aprobon de kelkaj reformoj kiel la leĝo pri politika asociismo. Kiel dirite, la Registar-Prezidento Arias Navarro uzadis sian politikan povon kaj la influon de sia posteno por bari ĉiun entreprenitan reformon. Li malkonfidis je multaj el siaj ministroj kaj ankaŭ je la reĝo. Sed dume li mem ne havis difinitan kaj koheran planon por efektivigi sian celon. Nek por entrepreni la ŝanĝon nek por eviti ĝin estis Arias Navarro la homo kiun la situacio postuladis.
En kio rilatas al la leĝigo de la politikaj partioj, la politikaj sektoroj ligitaj al la frankismo kaj eĉ multaj el la reformistoj estis tute kontraŭaj al la permesigo de la Komunista Partio. Ĉi tiu problemo estis destinita pludaŭri post la ĉeso de Arias Navarro kiel Prezidento de la Registaro.
La laboristaj strikoj kaj la problemoj de publika (mal)ordo estis la fono de la okazintaĵoj de tiuj monatoj, dum kiuj ne mankis ankaŭ la teroristaj atencoj. Dume, en la unuaj monatoj de 1976, kun aŭ sen la konsento de la aŭtoritatoj, komencis okazi amasaj publikaj aktoj de la diversaj politikaj fortoj. Unue estis tiu de la demokrat-kristanoj, kaj poste tiuj de aliaj sektoroj pli centristaj kaj de la socialistoj. La programo de iuj el tiuj fortoj, ĉefe tiuj de maldekstraro, estis la efektivigo de iu politika rompo rilate al la antaŭa reĝimo. En marto de 1976 kelkaj el tiuj fortoj kunvenis kaj ellaboris komunan planon aŭ platformon kiu kontemplis la eblecon de paktita rompo de la heredita situacio.
En la somero de 1976 la reformo ŝajnis nerealigebla kaj la politika rompo, eĉ se paktita, estis neebla. Arias havis neniun apogon en sia propra registaro kaj liaj rilatoj kun la reĝo estis streĉaj kaj malfacilaj. La 1an de julio, post iu kunsido kun la reĝo, en tre akra kaj streĉa etoso, la Prezidento Arias prezentis sian demision, aŭ li estis ĉesigita de la reĝo, eĉ sen la aprobo de la Regna Konsilantaro. Kun lia ĉeso malaperis iu el la gravaj obstakloj por entrepreni la malligadon de la reto de la leĝa teksaĵo de la frankismo.
La persono elektita por gvidi la sekvan registaron, Adolfo Suárez, estis sufiĉe ne-konata en la lando. Krom ministro en la antaŭa registaro de Arias Navarro, la lasta politika ofico aŭ posteno kiun li plenumis estis tiu de Ĝenerala Sekretario de la Movado, la unusola, oficiala partio de la reĝimo de Franko. Tio ne akreditis lin kiel personon pretan estri politikan ŝanĝon. Kaj tamen li rezultis esti la plej taŭga persono por plenumi tiun taskon. Ŝajnas ke estis Torcuato Fernández-Miranda kiu sugestis al la reĝo la nomon de tiu juna membro de la frankista medio. Same juna (44-jara meznombra aĝo) estis la ministraro kiun li elektis kaj nur unu el ili estis antaŭe ministro dum la frankismo. Jam dekomence, Adolfo Suárez montris nedubindan kapablon por alfronti la malfacilan taskon de la transiro al demokratio. Sub lia regado, dum relative mallonga tempo-daŭro, ekde julio al septembro de la jaro 1976, okazis grava politika ŝanĝo en la politika tereno.
Suárez fiaskis en iuj terenoj kiel la publika ordo kaj la ekonomia krizo, sed li plene sukcesis en la tiama plej grava problemo, la politika transiro. En sia unua pertelevida diskurso li asertis ke la landa suvereneco kuŝis en la popolo kaj ke oni devos fari ke tio kio estas normala surstrate estu normala ankaŭ en la politika tereno. Nu, fine la gehispanoj vidis, post kvardek jaroj, alian stilon regi la landon. Surbaze de iu dokumento, laŭŝajne ellaborita de Torcuato Fernández-Miranda, Adolfo Suárez entreprenis la procezon por la politika reformo. Unue li prezentis la dokumenton, la 8an de septembro, al la militistaj estroj kaj du tagojn poste li prezentis ĝin al la Parlamento. Kiel sciate, ambaŭ institucioj estis fakte konstituitaj, ĉefe, el frankistaj malamikoj de la politika reformo. La politika projekto kontemplis la formadon de du parlamentaj ĉambroj: la Kongreso kaj la Senato, kiuj devus ellabori novan konstitucion. Fakte, tiu politika projekto signifis la nuligon de la frankisma leĝaro kaj ĉi ties anstataŭo per vere demokratia sistemo. Akcepti tiun projekton fare de la frankismaj institucioj povus esti konsiderata kiel la memmortigo de tiuj institucioj. Kaj tamen oni atingis tiun celon. Kiel? Nu, la okazintaĵoj de Portugalio, kie oni preskaŭ pasis de faŝisma diktaturo al revolucia reĝimo, montris la ne-eblecon persistigi tiutipajn diktatorecajn reĝimojn. Krome, la bremsado al paca evoluo al demokratio povus generi perfortan reagon de la postulantoj de la politika rompo, kaj tio estus okazigintа reprezaliojn pro la krimoj kaj la subpremado de la frankismo dum kvardek jaroj. Por tiuj frankismaj sektoroj estis sendube prefere akcepti la faktan amnestion kiun oni oferis al ili ŝanĝe de paca procezo de politika transiro. Tio ebligis la aprobon de la leĝaro por la Politika Reformo. En la Parlamento tiu projekto atingis 435 favorajn voĉdonojn kontraŭ 59 neaj kaj 13 sindetenoj. La fortoj postulantaj la politikan rompon, ne tute fidantaj pri la celoj de la registaro, petis nean voĉdonon en la posta popola referendumo, sed plejparto el la hispana loĝantaro aprobis la procezon per 75 procento da jesaj voĉdonoj.
Dum la registaro kolektis tiujn politikajn sukcesojn, en aliaj terenoj, la problemoj de la lando estis gravaj: la ŝtato havis deficiton de 80.000 milionoj da pesetoj kaj la senlaboreco estis ege kreskinta. Krome persistis la terorista agado de ETA kaj GRAPO. Ĉi lasta organizaĵo sekvestris la Prezidenton de la Ŝtata Konsilio, Antonio Oriol, kaj la Generalo Villaescusa. Ankaŭ la ekstrema dekstraro agadis perforte celante veki reagan intervenon de la armeo favore al siaj postuloj.


**Torcuato Fernández-Miranda kaj Adolfo Suárez**



# La Konstitucio de 1977

La fakta memmortigo de la frankisma Korteso ebenigis la vojon –de leĝa vidpunkto– por la elektado de nova Parlamento cele studi kaj aprobi novan Konstitucion. Se al tio oni aldonas ke la polico sukcesis liberigi la laste sekvestritajn altrangajn personojn, ĉio ĉi konstituis konsiderindan politikan sukceson por la registaro de Adolfo Suárez kiam aliaj problemoj de la hispana socio restadis ankoraŭ sensolvaj. Fakte, la surpriziga kaj neatendita maniero kiel oni efektivigis la politikan transiron en Hispanio utilis poste kiel modelo por pace alfronti la politikajn ŝanĝojn en aliaj lokoj.

Sed la problemoj de la hispana regantaro por la transiro al demokratio ne finiĝis per la parlamenta aprobo de la projekto de Politika Reformo. De tiam oni povis leĝigi la politikajn partiojn, nun jam malkaŝe nomataj "partioj" sen la eŭfemismo "asocioj". Kaj tiam la leĝigo de la partioj ne estis subkondiĉe de fideleco al la frankismaj Bazaj Principoj de la Movado ĉar ĉio ĉi estis forpelita al la rubujo de la Historio far la fama parlamenta sesio en kiu oni aprobis la projekton de Politika Reformo. Tio signifis ke povis esti leĝigita ankaŭ la Socialista Partio kaj ĉi ties sindikato UGT. Sed la problemo estis la Komunista Partio kaj ĉi ties sindikato "Laboristaj Komisionoj".



Adolfo Suárez

Rilate al la sindikatoj menciindas ke la situacio en Hispanio tre estis ŝanĝinte ekde la civil-milito. Tiam la du ĉefaj sindikatoj estis la UGT (socialista) kaj la CNT (anarkiista). La komunistoj estis kune kun la socialistoj en la UGT. Sed en 1976 la anarkiismo tre estis malgrandiĝinta kaj preskaŭ tute malaperinta en Hispanio. Alie, dum la 50-aj jaroj naskiĝis nova sindikato, "Laboristaj Komisionoj" de forta komunista influo. Tiu sindikato gvidis plejparton el la okazintaj strikoj dum la frankisma diktaturo. Kompreneble, dum la diktaturo ĉiuj sindikatoj, same kiel la komunista kaj socialista partioj estis eksterleĝaj.

Kadre de la normala leĝigo de ĉiuj partioj, sindikatoj kaj alitipaj asocioj ĝis tiam malpersataj, la registaro de Adolfo Suárez ankoraŭ ne kuraĝis leĝigi la komunistajn organizaĵojn timante la reagon de la armeo. La Komunista Partio volis trudi sian agnoskon kaj tiucele transdonis al ĉiuj siaj membroj insignon por ĉi ties publika surportado kaj organizis publikajn aktojn. Laŭ la valida leĝo tiuj faroj devus provoki la areston kaj enprizonigon de la farantoj. Sed ĉar ĉi tiuj estis tiel multenombraj la plenumado de la leĝo fariĝis neebla. Krome la registaro de Suárez ne emis efektivigi la plenumadon de tiel amasa persekutado ĉar tiamaniere rezultus nekredebla ĝia deziro pri demokratio. En la realo okazadis strangaj faroj: en lokoj, kiel nia urbo, Gijón, kie la komunistoj estis multenombraj, ĉi tiuj organizis publikajn aktojn por, ekzemple, transdoni al la partianoj la komunistajn membrokartojn, kaj anoncis tiun ceremonion per la presaro. Dume, la sama presaro kiu anoncis tiun eventon informadis ke en tiu aŭ tiu urbeto de tiu aŭ tiu hispana provinco estis arestitaj dek-unu aŭ dek-ok komunistoj kunvenintaj por la transdonado de la partiaj membrokartoj. La kontraŭdiroj de la aŭtoritato pri tiu temo povas esti atribuitaj al la persona teniĝo de la koncernaj provincestroj, sed la ĉefa kialo estis la grandnombro de la gekomunistoj en iuj lokoj kaj ties malabundo en aliaj lokoj. Tie, kie abundis la komunistaj aktivuloj estis tute ne eble apliki la leĝon kontraŭ ili, kaj male, tie kie ili estis malfortaj, ili devis suferi la tutan pezon de la leĝo. Ĉi tio pravigas la diraĵon ke ***la homaj leĝoj estas same kiel la aranea reto: la malgrandaj kuloj restas kaptitaj en ĝi sed la fortaj kuloj trarompas ĝin***.

En tiu kunteksto, fine de la jaro 1976, la tiama Ĝenerala Sekretario de la Komunista Partio, Santiago Carrillo, kiu estis ekzilita ekde la fino de la civil-milito, eniris eksterleĝe en Hispanion kaj post kelkaj semajnoj li estis arestita de la polico. Eble li mem provokis la areston por meti la registaron en situacion pri kiu ĝi devus preni iun decidon pri la kompartio. Malmultajn horojn post la arestado de Carrillo kelkmilo da junaj komun-

istoj perturbis la ordon en Madrido per brua manifestacio kun perforta rezisto antaŭ la polico. Dum la sekvaj tagoj la registaro ricevis amason da plendoj kaj petoj pri la liberigo de Carrillo. Plejparto el la kompartia membraro sin dediĉis kolekti subskribojn de skribaĵoj postulante la liberigon de ilia Ĝenerala Sekretario, kaj la regionaj kaj lokaj komitatoj de la K.P. en la tuta lando publikigis en la presaro subskribitajn plendojn en la sama senco. Per tiuj agoj la komunistoj deklaris sian intencon ne plu resti silentaj en lando kie ili estis persekutitaj dum kvardek jaroj.

Santiago Carrillo estis liberigita post malmultaj tagoj kaj de tiam li dediĉiĝis prezidi publikajn amasajn mitingojn postulante la leĝigon de la K.P. La registaro daŭre faris nenion tiurilate; ŝajnis ke ili ne sciis kiel procedi pri tiu ĉi afero. Ĝenerale la komunistaj mitingoj kaj koncentriĝoj estis dissolvitaj de la polico sed sen perforto nek arestitoj. Tiam komencis okazi en la lando iu stranga fenomeno: multaj personoj, inter ili ankaŭ altrangaj uloj kiuj estis okupintaj postenojn kaj oficojn en la ampleksa burokrataro de la frankisma ŝtat-aparato, komencis publike postuli la leĝigon de la Komunista Partio. Kompreneble, aliaj personoj de la samaj sociaj kaj politikaj tavoloj rifuzadis tiun leĝigon. La rezulto estis ke la teniĝo rilate al tiu afero fariĝis la mezurilo por taksi la demokratiecon de la homoj. Nevole, la kompartio fariĝis la ne-rekta sed fakta provizanto de atestiloj pri demokratieco. Tiuj eksfrankistoj kiuj volis aperi kiel demokratoj antaŭ la socio kaj antaŭ la nova politika situacio, rapidis laŭte postuli la leĝan agnoskon de la Komunista Partio, dum iliaj ekskunuloj de la faŝista bunkro taksadis ilin kiel perfiduloj.

Tiuj reakciuloj de la ekstrema dekstraro konsternite perceptis ke estis eskapante el iliaj manoj la situacio kiun ili kontroladis dum kvardek jaroj. Iu ekstremista grupo de tiu sektoro de la bunkro plenumis tiam perfortan atencon kontraŭ komunistoj, konkrete kontraŭ iu sindikata oficejo de la madrida kvartalo Atocha. En alsalto kontraŭ tiu loko, la 24an de januaro de 1977, estis murditaj kvin advokatoj de la sindikato "Laboristaj Komisionoj" kaj de la Komunista Partio. Tiu perforta kaj malsaĝa ago okazigis ĝuste la malon de tio kion la alsaltintoj pretendis. Plejparto el la hispana loĝantaro kondamnis tiun faron. En la funebra procesio de la kvin ĉerkoj tra la stratoj de Madrido partoprenis centoj de miloj da personoj kiuj volis, per tiu gesto, montri sian apogon al la komunistoj kaj postuli ĉi-ties leĝigon. Dum tiu funebra marŝado superflugis ĝin iu helikoptero per kiu partoprenis en la funebraĵo la reĝo Johano Karlo.

De tiam pli oftis la petoj kaj postuloj de ĉiutipaj civitanoj pri la leĝa agnosko de la K.P. En monato aprilo la registaro de Adolfo Suárez sin sentis sufiĉe forta por alfronti la oponon de la armeestroj, kaj la 9an de tiu monato, sabato de la Paska Semajno, la registaro dekretis la leĝigon de la Komunista Partio. Malkonsente kun tiu decido demisiis la ministro pri Maraj Aferoj, Admiralo Pita-da-Veiga, kaj kiam post kelkaj semajnoj estis agnoskita ankaŭ la komunista sindikato "Laboristaj Komisionoj", estrita de Marcelino Camacho, demisiis alia armeestro: Generalo De-Santiago. Sed la ensemblo aŭ plejparto el la landa loĝantaro konsideris normalaj tiuj faroj eĉ se oni ne simpatiis al la komunistaj organizaĵoj.

Do, la K.P. povis konkuri en la sekva balotado, kio estigis, ene kaj for de la lando, konfidon kaj kredeblecon pri la demokratia karaktero de la balotado kaj de la procezo de politika reformo ĝenerale. La balotado okazis la 15an de junio kaj la pribalotaj rezultoj de la K.P. ne estis grandaj: 9,33 procente da voĉdonoj, 19 deputitoj (estis la tria politika forto en la lando). Oni konsideris ke multaj personoj ne kuraĝis voĉdoni favore al ĝi timante perfortan reagon de la faŝistaj fortoj, sed la rezultoj de postaj balotoj ne konfirmis tiun opinion.

Indas mencii ke en nia Asturia regiono la Komunista Partio prezentis ĉekape en la kandidataro la Prezidantinon de la partio, Dolores Ibárriri (Pasionaria) kiu jam estis parlamentanino de nia regiono post la balotado de 1936. Ŝi estis alveninta el ekzilo en 1977. La K.P. gvidata de ŝi kaj Santiago Carrillo sin difinis tiam kiel "eŭrokomista" samkiel la franca kaj la itala kompartioj. Karakteraj trajtoj de la eŭrokomunismo estis la plurpartia politiksistemo, la parlamenta vojo, kaj, ĉefe la konvinko ke la demokratiaj liberecoj kaj la homaj rajtoj konstituas nerifuzeblan historian atingon de la homa progresado. Estas evidenta ke per tiu eŭrokomunista movado la ĉefaj komunistaj partioj de Okcidenta Eŭropo celis distanciĝi de la praktiko kaj la teorio de la tiamaj komunistaj reĝimoj de Rusujo, Orienta Eŭropo, Ĉinio kaj aliaj lokoj. Santiago Carrillo verkis, post lia alveno al Hispanio, libron titolitan "Eŭrokomunismo kaj ŝtato"



**Funebra procesio de la viktimoj de la atenco kontraŭ la labor-aferaj advokatoj de Atocha**

Sed ŝajnas ke, iamaniere, funkciis la skemo ke la teniĝo rilate al tiu partio estis kvazaŭ mezurilo de demokratieco. Fraga Iribarne, kiu dum la lasta etapo de la frankismo troviĝis inter la postulantoj de demokratia aperteco, kiam Adolfo Suárez lokiĝis en centrismaj pozicioj kaj leĝigis la kompartion eraris kontraŭstarante tiun politikon kaj politike instaliĝis en la dekstraro. Li kreis partion nomatan "Popola Alianco" en kiu estis kelkaj eksministroj de frankistaj registaroj, inter ili Arias Navarro mem. La voĉdonantaro punis tiun kandidataron: ĝi atingis eĉ malpli da voĉdonoj ol la K.P.: 8,21 procente, kaj 16 deputitoj. Dume estis gajnintaj la unuan kaj duan lokon la fortoj kiuj ne kontraŭstaris la kompartion, t.e. la centrisma partio UCD fondita de Adolfo Suárez kaj la Socialista Partio subgvide de la juna lidero Felipe González. Estis alia socialista kandidataro prezidita de Profesoro Enrique Tierno Galván, sed ĝia pribalota rezulto estis malgrava.

Aliaj fortoj konkurintaj en la balotado atingis nulan aŭ sensignifan rezulton. La faŝistaj kandidataroj kiuj prezentiĝis al la balotado atingis kompletan fiaskon. En tiuj regionoj kie estis/as fortaj naciismaj movadoj, ĉi ties kandidataroj atingis tiam, kaj eĉ pli poste, komfortan rezulton.

Sed la ĉefa rezulto de la balotado estis ke ĝi povis okazi, kaj okazis pace. Krome oni devas atentigi pri alia grava fakto: male ol en antaŭaj pribalotaj procezoj, en kiuj la kacikismo, ĉefe en la kampara medio, ludis tiel decidan rolon, ĉifoje tio ne eblis pro la nun ekzistanta sistemo de kontrolo de identigo de ciu voĉdonanto (personaj identkartoj, fidindaj censad-listoj) kaj sekreta voĉdonil-preno.

La balota bonsukceso de la centrisma partio kreita de Adolfo Suárez okazigis ke ne povis enradikiĝi –eĉ ne naskiĝi– en Hispanio iu demokrat-kristana partio laŭ la tipo de tiuj ekzistantaj en kelkaj landoj de Okcidenta Eŭropo. Malaperis el la politika tereno ankaŭ la respublikistaj organizaĵoj kiuj antaŭe estis fortaj en la lando. La popola partopreno en la balotprocezo estis relative alta: voĉdonis proksimume 78 procente el la hispana loĝantaro kun voĉdon-rajto (ekde 18-jaraĝo).

Post la balotado de la 15a de junio de 1977 komenciĝis la longa vojo al la nova konstitucio. La elektita Korteso aŭ Parlamento (du-ĉambra, kun deputitaro kaj senatanaro) estis konstituantaj sed la afero de la studo de nova konstitucio ne estis rapida. Estis jam novembro de tiu jaro kiam oni aprobis iun leĝon kiu konkretigis la respondecon de la regantaro antaŭ la Parlamento. La reganta partio –Unio de la Demokrata Centro– reale estis nur koalicio de kelkaj politikaj grupoj. Estis en monato decembro kiam tiuj partietoj dissolviĝis por kune formi la centrisman partion gvidatan de Adolfo Suárez. Ĉi ties registaro devis alfronti la naciismojn de la landa periferio (Katalunio, Eŭskadio…) kaj fari al ili sufiĉe da politikaj koncesioj eĉ antaŭ la studo de la konstitucio.


Dolores Ibárruri (Pasionaria) kaj Santiago Carrillo

Tiuj koncesioj ne havis efikon kontraŭ la terorismo: ETA daŭre efektivigadis krimajn atencojn. Dume, en tiu jaro 1977 la ekonomia inflacio atingis 30 procentojn kaj la senlaboreco trafis 6 procentojn el la laboristaro. Por alfronti la tutan problemaron de la lando la registaro kaj la ĉefaj partioj de la opozicio subskribis iun interakordon nomitan "Pakto de la Monkloa" kiu dumtempe funkciis kvazaŭ regantaro de nacia koncentriĝo. La interakordo povas esti resumita dirante ke ĝi estis plano de ekonomia aŭstero per kiu oni bremsis la prisalajrajn depostulojn ŝanĝe de serio da kompensoj de politika kaj socia karaktero, kiel, ekzemple, en la eduksistemo kaj en la sociaj servoj. Sed daŭris la problemoj pri publika (mal)ordo kiel iuj tumultoj okazintaj en la festo de Pamplono en julio de 1978 kaj la ribelo kaj detruo de kelkaj prizonoj. Dum la 11 monatoj post la balotado, la terorista bando ETA murdis ne malpli ol 11 policistojn. Kaj la ekstrema dekstraro profitadis ĉi-tiun malordon por malfortigi la regantaron kaj la naskiĝantan demokration. En decembro de tiu jaro 1978 estis malkovrita kaj sufokita iu konspiro kiu ricevis la nomon "Operacio Galaksio" en kiu estis partoprenintaj kelkaj armeaj kaj policaj oficiroj.

La procezo de ellaborado de la konstitucio daŭris tutan jaron. Prilaboris ĝin sep-persona grupo de spertuloj: tri de la reganta partio kaj kvar de la opozicio. En novembro de la jaro 1977 estis konata la unua malnetaĵo kaj oni sciis ke la ĉefaj punktoj de malakordo inter la centristoj kaj la socialistoj temis pri la konceptado de la eduk-sistemo kaj diversaj aferoj en la sociekonomia tereno. Sed la negocado daŭris eĉ se ne publike kaj oni alvenis al sufiĉe ampleksa kaj firma interkonsento. En oktobro de la jaro 1978 la konstitucio estis aprobita en la Parlamento kaj la 6an de decembro ĝi estis aprobita far popola referendumo kun tre granda apogo de jesaj voĉdonoj, multe pli nombraj ol la neaj. La proceduro de ellaborado de la konstitucio tre diferencigas ĉi tiun de 1978 de la antaŭaj hispanaj konstitucioj. Oni povas diri ke la hispana konstituciismo karakteriĝis pro tre rapida ellaborado de la tekstoj kaj, samtempe, la partiismo de ilia enhavo. Tamen, tiu de 1978 estis ellaborita tra multflanka interkonsento kaj tre malrapide. La konstitucio de la jaro 1978 konsistas el 169 artikoloj kun aldono de kelkaj disponoj ordigitaj en 11 ĉapitroj. La enkonduka titolo prezentas ĝeneralan karakteron de aferoj kiuj poste estas esprimataj pli amplekse en la cetero de la teksto. La unua titolo pritemas aferojn rilate al la homaj rajtoj kaj la civitanaj liberecoj de la gehispanoj. En la ellaborado ne estis vera diskutado pri temoj kiel la religia konfesieco de la ŝtato. La teksto difinas Hispanion kiel socian kaj demokratian ŝtaton, kaj estis aboliciita la mort-puno. En terenoj kiel la eduk-sistemo k.a. la teksto estas sufiĉe ambigua.

La dua titolo temas pri la monarkio kiel baza institucio de la ŝtato, pri kio ne estis polemiko inter la konstituantoj. La monarkio estas konceptita kiel modera, arbitra kaj simbola, estante ĝia povo pli morala ol efektiva. La tria kaj kvara titoloj temas pri la leĝdona kaj reganta povoj. La rekta demokratio estas tre limigita ĉar la meĥanismo de la referendumo estas nur konsulta kaj rezultas malfacile realigebla. Tio konstituas veran obstaklon por la popola partopreno en la politiko kaj krome permesas al la regantaro agi laŭ la propra deziro senkonsidere al la volo kaj la intereso de la popolo kaj eĉ kontraŭe al la balotkampanjaj promesoj. Tamen notindas tio ke ĉi tiu konstitucio estas la sola teorie tute reformebla, eĉ en tio kio koncernas al la ŝtat-formo: monarkio, respubliko,,,

Alia misaĵo de la balot-sistemo de tiu konstitucio estas la maniero kalkuli la proporcion de la deputitoj asignataj al ĉiu kandidataro rilate al la proporcio de la voĉdonoj, t.e. la sistemo estas proporcia sen korektaĵoj por la prikonsidero de la distriburestaĵoj. Ĉi tio celas ebligi klaran politikan avantaĝon de la gajninta partio, kaj en la realo tio favoras ankaŭ la dupartiismon. La sistemo sekvas la sistemon D'HONDT. Tio signifas ke, en Eŭropaj balotoj, en kiuj la tuta lando konsistigas unusolan balot-distrikton, la rezulto prok-simas al la vera voĉdon-proporcio, sed en la enlandaj balotoj, kiam la distriktoj estas regionaj, la proporcio restas damaĝata.

La konstitucia teksto pritemas ankaŭ aliajn aferojn de la hispana politika vivo. La plej polemika el tiuj temoj estis tiu rilate al la teritoria organiziĝo de la ŝtato. La naciismo de iuj hispanaj regionoj celas sendependiĝon kaj la centra povo devas fari, kun aŭ sen konstitucioj, nekredeblajn ĵonglaĵojn por kontraŭstari la aferon. Foje la respondo de la centra povo estis perforta; en ĉi tiu nia historia raporto de la du lastaj jarcentoj ni jam vidis la bombardadojn sur Barcelono okazintaj dum la reĝado de Izabela la 2a. Ankaŭ la respondo de la frankisma povo estis perforta rilate al ĉi tiu temo kiel, cetere, rilate al ĉiu ajn opozicio. En la demokratia etapo, kies komenciĝo ni estas priskribante, la proponita – kaj aplikita ĝis nun– solvo estis koncesii al ĉiuj regionoj (ne nur al la naciismaj) statutaron pri aŭtonoma memregado. Tio funkciis de tiam pli malpli bone sed ĉiam kun nepra reapero de konfliktoj.

Per la aprobo de la Konstitucio per la referendumo de la 6a de decembro de 1978 kulminis la transicio kiu metis finon al la frankisma reĝimo. La 27an de decembro, en solena parlamenta sesio la reĝo subskribis la Leĝon de Leĝoj kaj promesis obei kaj servi ĝin. Du tagojn poste la leĝo estis publikita. La institucia ligaĵo de la frankismo restis, ekde tiu momento, malligita kaj bone malligita.



SUBSKRIBINTOJ DE LA **PAKTO DE LA MONKLOA**.

De maldekstre al desktre en la foto: ***Enrique Tierno Galván*** (Popola Socialista Partio), ***Santiago Carrillo*** (Komunista Partio de Hispanio), ***Josep María Triginer*** (Socialista Partio de Katalunio), ***Joan Reventós*** (Socialista Konverĝeco de Katalunio), ***Felipe González Márquez*** (Socialista Laborista Partio de Hispanio), ***Juan Ajuriaguerra*** (Naciista Eŭska Partio), ***Adolfo Suárez*** (Registar-Prezidento), ***Manuel Fraga Iribarne*** (Popola Alianco), ***Leopoldo Calvo-Sotelo*** (Unio de la Demokrata Centro), ***Miquel Roca*** (Konverĝeco kaj Unio).

La **Pakto de la Moncloa** estis la interakordo subskribita en la Palaco de la Monkloa (sidejo de la Registar-Prezidenteco) dum la transiro al demokratio inter la registaro prezidita de Adolfo Suárez kaj la ĉefaj partioj de la opozicio kun parlamenta reprezento. La subskribo okazis la 25an de oktobre de 1977, kaj la pakto estis ratifita du tagojn poste en la Parlamento. La celo de tiu interakordo, al kiu sin oponis tiel la partioj de ekstrema maldekstraro kiel tiuj de la frankisma dekstraro, ĉiu kun apartaj projektoj sed koincidantaj en la celo perturbi la pacan disvolviĝon de la procezo. La pakto ebligis ke la fortoj dezirantaj la pacan transiron al demokratio – eĉ se politike tre diversaj– sukcesu ellabori la konstitucion de 1978 kiu signis la finon de la longdaŭra frankisma diktaturo.




La definitiva aprobo de la Konstitucio de 1978 ebligis la sekvan ĝeneralan balotadon. Suárez, eble dezirante ampleksigi sian parlamentan plimulton aŭ cele superi la etoson de ĝenerala interkonsento ekzistinta ekde la Pakto de la Monkloa, deziris tuj organizi la balotprocezon. En oktobro de 1978 jam estis okazinta la Unua Kongreso de sia partio "Unio de la Demokratia Centro" kvazaŭ tiamaniere komencus la pribalota kampanjo. Aliflanke, notindas ke iu balota konsulto estis necesa ĉiukaze ĉar la municipoj daŭre estis sub la kontrolo de aŭtoritatoj kiuj ne estis demokratie elektitaj. La partio de Suárez bazigis sian kampanjon en la aserto ke la regantaro de tiu partio plenumis sian promeson gvidi la demokratiig-procezon. La Socialista Partio insistis en la deklaro ke ĝi estis sufiĉe preta kaj kapabla regadi. Menciindas ke en tiu epoko la partio de Tierno Galván estis absorbita de la Socpartio gvidata de Felipe González kaj tiamaniere la socialistoj prezentiĝis unuiĝintaj en ĉi tiu balota konsulto.
Dume en la hispana socio estis notinda tiu fenomeno de la "desencanto" (elreviĝo, seniluziiĝo) spite al la feliĉa disvolviĝo de la politika ŝanĝo ĉar la ekonomia situacio daŭre estis malbona kaj malfacila por ampleksa parto el la hispana loĝantaro. La mitingoj estis malplinombraj ol en la antaŭa balotkampanjo. En ĉi tiu estis tre decida faktoro la televido. Suárez profitis tiun informmedion por influi sur tiu 40 procento el la voĉdonantoj kiuj ankoraŭ ne estis decidintaj sin voĉdonon. La partio de Fraga Iribarne, "Popola Alianco" intencis as-pekti malpli dekstrema antaŭ la voĉdonantaro, tiucele ĝi liberiĝis el la figuroj, kiel Arias Navarro, tre ligitaj al la frankisma epoko. Siaflanke la komunistoj pli-fortigis siajn kandidatarojn per famaj sindikatistoj ĉar en la antaŭa sindikata balotado estis venkinta la komunista sindikato "Laboristaj Komisionoj". La balotkampanja strategio de la kompartio estis ataki la bipartiismon kiun povus konstitui en Hispanio la centrisma partio de Suárez kaj la Socialista Partio.
La balota rezulto ne ŝanĝis multe la ekzistantan situacion. La procento da voĉdonantoj ĉifoje ne estis alta.
La "Unio de la Demokratia Centro" perdis malpli el 1 procento el sia voĉdonantaro sed atingis pliajn tri deputitojn pro la karakteraĵoj de la balot-sistemo (po-provinca voĉdon-kalkulado). La Socialista Partio pasis de 118 al 121 parlamentanoj sed tio ne estis progreso konsideranta ke ĝi estis absorbinte la partion de Tierno Galván. La voĉdonantaro de la komunista partio kreskis apenaŭ 1 procento kompare al la antaŭa balotado. Preskaŭ duono en siaj voĉonoj estis kolektitaj en Katalunio kaj Andaluzio; tiu partio ne havis veran enradikiĝon en la tuta lando. La partio de Fraga atingis malpli da voĉdonoj kaj deputitoj ol en 1977, damaĝis ĝin la prezentado de kandidataro de la ekstrema dekstraro liderata de Blas Piñar, kiu atingis parlamentan sidlokon por li. Cetere estis notinda la kresko de la naciisma voĉdonataro ĉefe en Eŭskadio kaj Andaluzio.
Se la rezulto de la baloto ne multe ŝanĝis la politikan forto-rilaton en la lando tamen ĝi multe efikis en kio rilatas al la interna ekvilibro de la ĉefaj partioj de la lando. Ni vidos laŭlonge de ĉi tiu ĉapitro la krizojn de tiuj politikaj fortoj. Fraga Iribarne ekpensis la eblecon forlasi la politikan aktivadon. En la baldaŭ sekvinta balotado por la municipoj la rezulto estis iomete pli bona por la Socialista Partio ĉefe post sia interakordo kun la komunistoj por atingi pli da urbestroj. Tierno Galván fariĝis, dank' al tiu postbalota koalicio, urbestro de Madrido. Tio montris ke eĉ se plejparto el la hispana voĉdonantaro ankoraŭ ne konfidis pri la socialistoj por la ŝtatregado, tamen decidis probi ilin en la demarŝado de la municipaj aferoj.

Dum la jaro kaj duono post la politika balotado de 1979 la interna situacio de la centrisma partio de Adolfo Suárez tre malboniĝis. La lidereco de Suárez estis kontestita de iuj el la grupoj konstituantaj la centrisman partion spit' al tio ke li estis la ĉefa figuro kaj aglutinanto de la diversaj partiaj grupoj. La ĉefa eraro de la Prezidento estis lia ne-adaptiĝo al la parlamenta vivo en demokratio; li preskaŭ neniam ĉeestis la parlamentajn sesiojn. La persona karismo esta nula afero ĉe politika lidero se ĉi tiu ne ekzercas sian liderecon. Lia manko je iniciatkapablo evidentiĝis en la rilatoj kun la ceteraj politikaj fortoj kaj eĉ en la interno de sia propra partio. Sed eblas pensi ke lia falo ne estis pro liaj eraroj, kiuj, ja, ekzistis, sed pro lia inda teniĝo en iu afero de internacia politiko. Ja, li estis tute kontraŭa al la enkonduko de Hispanio en la militistan kontrakton NATO-n kaj tio altiris al li la malamikecon de la usona imperiismo. Krome la persisto de la ekonomia krizo kaj ĉi ties misaj efikoj sur la hispana socio ne kontribuis igi simpatia lian regadon. La reorganizado de la registaro en majo de 1980 asignis pli da povo al Abril Martorell, Ministro pri Ekonomiaj Aferoj sed tio pli ĉagrenigis aliajn figurojn de la partio. En tiu malfeliĉa kunteksto por la centrisma partio, la socialistoj prezentis en la Parlamento cenzur-debaton. Tiu parlamenta debato, pertelevide dissendita al la tuta lando, utilis por plifortigi la politikajn figurojn de la socialistaj lideroj Felipe González kaj Alfonso Guerra. Dume tiu pligrandiĝo de la prestiĝo de la socialistoj en la lando pli akrigis la malkontenton de multaj membroj de la centrisma partio kontraŭ ilia lidero kaj sukcesis doni al sia interna opozicia grupo ian organizan strukturon kapablan trudi decidojn al la Prezidento kiel la eksigon de la Ministro Abril Martorell. De tiam Suárez havis malpli da povo en sia propra partio kaj ekpensis la eblecon demisii. Grandparto el la parlamentanoj de tiu partio entreprenis deflankiĝon al la dekstraro kaj emis interakordon kun la desktrara partio de Fraga Iribarne. Ĉi tiu situacio de politika malstabileco havis kiel rezulton la kuraĝiĝon de la eksterparlamenta opozicio, t.e. la frankismaj nostalgiuloj, kiuj deklaris ke la monarkio estis sekvestrita de la sistemo de politikaj partioj kaj revadis pri militista puĉo por renversigi tiun situacion estintan post la morto de la diktatoro.



Drameca pertelevida mesaĝo de la Reĝo Johano Karlo en la nokto de la puĉo de februaro 1981.



**Leopoldo Calvo Sotelo**

Subite kaj neatendite, la 29an de januaro Suárez demisiis kiel Registar-Prezidento kaj kiel estro de partio kiun li jam ne kapablis kontroli. Tiuj sampartianoj kiuj tiel multe kontribuis ruinigi la politikan karieron de Adolfo Suárez baldaŭ konstatus ke la ĉeso de tiu lidero ne kontribuis pacigi la internan vivon de la partio. Ne ĉiuj el ili apogis la elektadon de lia sukcesinto, Leopoldo Calvo-Sotelo. Ĉi tiu estis elektita kiel nova lidero de la centrisma partio kaj tio implikis ke li tuj fariĝos Registar-Prezidento. La parlamenta ceremonio por formaligi la elektadon de Calvo-Sotelo kiel ĉefministro estis fiksita por la 23a de februaro de tiu jaro 1981. Tiu dato pasis al la historio de Hispanio kiel grava dato sed ne pro la elektado de la nova Prezidento sed pro la fakto ke la koncerna parlamenta sesio estis interrompita de militista puĉo celanta renversigi la politikan situacion.

Tamen ne estis militistoj, sed policistoj de la Civila Gvardio tiuj kiuj eniris en la parlamentejon por sekvestri la gedeputitaron. Kvar-cent el tiuj gvardiistoj komanditaj de Kolonelo Tejero eniris en la sesian parlamentan salonon pafante sur la plafonon por interrompi la voĉdonadon kaj devigis la parlamentanojn sidiĝi. Nur du el ili, Adolfo Suárez kaj Santiago Carrillo rifuzis sidiĝi kaj resti stare. Krome la Vicprezidento Generalo Gutierrez Mellado ekstaris kaj adresiĝis al Tejero intencante, vane, konvinki lin rezigni sian puĉan projekton. Kolonelo Tejero persistis en sia intenco kaj apartigis el la parlamentaro la liderojn de la ĉefaj partioj. Li estis atendante ke la implikitaj armeestroj prenu la povon kaj decidu. Ŝajnas ke la civil-gvardiistoj kiuj intervenis en la operacio ne estis konintaj la celon de la konspirantoj; oni diris al ili ke tiu agado estis okazanta laŭ ordonoj de la reĝo. Kaj inter la armeaj estroj ne estis multaj implikitaj en la operacio; plejparto el la militistestroj estis fidelaj al la reĝo kaj ĉar ĉi tiu ne apogis la puĉon la konspirantoj ne povis kalkuli kun la amasa apogo de la armeo. La sola generalo kiu faris ion konkretan estis Milans del Bosch, estro de la garnizono de Valencio. Li ordonis ke la trupoj sub lia kontrolo okupu la urbon kaj la ĉefajn centrojn de la regiono. Dum la unuaj horoj de la sekvestro de la geparlamentanoj la stratoj de Valencio plenis je tankoj kaj soldataro. Milans ordonis la retiriĝon de tiuj trupoj nur je la unuaj horoj de la sekva tago kaj sekvante striktajn ordonojn de la reĝo. Alia militisto kiu, laŭŝajne, intencis en Madrido ian tipon je interveno estis Generalo Armada.

La tuta lando kaj la tuta mondo povis vidi tion okazanta ene de la granda ĉambro de la Parlamentejo ĉar unu el la televidaj kameraoj kiuj estis filmante la voĉdonadon de la parlamentanoj restis funkcianta, sen la scio de Tejero kaj ĉi ties gvardiistoj, dum la eniro de la puĉistoj kaj dum la tuta nokto. Noktmeze, estis dis-

sendita per ĉiuj amaskomunikiloj iu diskurso de la reĝo Johano Karlo deklarante ke la puĉistoj ne havis lian apogon kaj ke li ordonis al ĉiuj militistaj unuoj resti for de la operacio kaj kun respekto al la institucioj. Matene de la 24a de februaro Tejero komprenis ke alvenos al la sekvestrita Parlamento neniu implikita generalo kaj ke la tuta operacio rezultis fiaskinta. Fiaskinta la puĉo, la popolaj manifestacioj okazintaj sekvintage en la lando montris ke la malreviĝo finiĝis pro la sola fakto vidi endanĝerigita la demokratio.

La regad-etapo de Calvo-Sotelo, tiam komenciĝanta, daŭris ĝis la 2a de februaro de la sekvinta jaro, 1982. Estis etapo de politika firmeco –oni abortigis en ties komenciĝo kroman militistan konspiron kontraŭ la demokratio- kaj pludaŭranta ekonomia krizo kiu finruinigis la prestiĝon de la centrisma partio, kiu, cetere, restis kun granda interna malakordo. Grava dispono prenita de la tiama regantaro estis la eniro de Hispanio en la militistan blokon NATO-n. Estas menciinda ankaŭ la aprobo de la leĝo pri eksedziĝo, kio estis kialo de pliakriĝo de la malkonsento interne de la reganta partio. Tiu partio, kiu ludis gravan rolon en la starigado de la demokratio dronis en la politika balotado de 1982.

En decembro 1982 la centrisma partio atingis nur 7 procenton el la voĉdonoj kaj 11 deputitojn.

Komplikis la situacion de tiu partio la fakto ke Suárez deziris reveni al la politiko kaj estis fondinta alian centrisman partion kiu en la balotado rezultis eĉ pli malsukcesa. Tiu politika malfortiĝo de la centrismo tradukiĝis en la granda kresko de la balotaj rezultoj de la dekstrisma partio gvidata de Fraga: 26,36 procento el la voĉdonoj kaj 107 deputitoj. Sed la vera venkinto de tiu balotado estis la Socialista Partio gvidata de Felipe González: 48,11 procento el la voĉdonoj kaj 202 parlamentanoj.



Felipe González en la balot-kampanja afiŝ-bildo de la Socialista Partio por la balotado de decembro 1982.

Por ĉi tiu Socpartio estis decida faktoro la transformiĝo kiun ĝi estis travivinta ekde 1979. Intencante akcentigi kaj evidentigi la socialdemokratian karakteron de la hispana socialismo, Felipe estis proponinta en la partia kongreso de tiu jaro rezigni la marksisman titolon kaj karakteron de la Socialista Partio. Pri tio li estis imitanta similan decidon de Carrillo kiu bazigis sian eŭrokomunismon en la rifuzo de la leninista titolo de la K. P. Sed en la kazo de la Socpartio la operacio ne tiel estis sukcesa kiel en la Komunista Partio. Plimulto el la socialistaj gekongresanoj rifuzis tiun ŝanĝon kaj Felipe González devis demisii kiel Ĝenerala Sekretario de sia partio. Dumtempe estis alia gvidantaro en la partio sed ĝi ne ĝuis je la karismo de Felipe, kiu revenis al la partia gvidado rezulte de eksterordinara kongreso okazinta post kelkaj monatoj. Tiam Felipe evitis la ideologian kunfrontiĝon sed li daŭre persistis en tiu reformismo kiu igas ke socialista partio, fakte, estu kolono de la kapitalista sistemo, t. e. la socialistoj celas demarŝi la ŝtatajn, publikajn aferojn sed sen ia ajn programo por la progresista transformigo de la socio. Ĉu la politika venko de tiu Socialista Partio en la balotado de decembro 1982 okazis pro tio ke ĝia voĉdonantaro ne komprenis tiun tristan realaĵon de la perfido de la partio al siaj idealoj? Aŭ, ĉu la pribalota venko okazis ĝuste pro tio ke tiuj amasoj komprenis kaj aprobis tion? Ĉiu povas havi sian propran respondon al tiu demando, cetere, eble eĉ ne la propraj voĉdonantoj de tiu partio scius respondi tion kaj eble ili eĉ ne komprenus la demandon. Tiurilate indas kaj necesas aldoni ke la situacio ne estis malsama tiam –kaj nuntempe- en aliaj landoj de Okcidenta Eŭropo kie ekzistas similaj socialistaj partioj kun simila politiko.

En la socialista pribalota venko de 1982 influis ankaŭ la krizo kaj la problemoj de la Komunista Partio gvidata de Santiago Carrillo. Ene de tiu K. P. estis granda malakordo pri ideologio kaj pri strategio. La oficiala sektoro kiu apogadis la politikon de Carrillo sin vidis atakita samtempe de du kontraŭaj sektoroj: tiuj rifuzantoj de la eŭrokomunismo ekde sovetfavoraj pozicioj kaj tiuj ekstremistaj eŭrokomunistoj kiuj taksis nesufiĉaj la reformojn de Carrillo. La unuaj estis speciale multenombraj kaj organizitaj en la Kataluna regiono dum la lastaj estis pli fortaj en Madrido kaj estis konstituita, ĉefe, de intelektuloj. Ŝajnas ke pri la konflikto kun ĉi lastaj sufiĉe kulpis Santiago Carrillo. Iuj formis apartajn partietojn kaj multaj membroj de la Kompartio, ne apartenantaj al la skismaj sektoroj, forlasis la politikon enuigitaj je tiu konfuzo. Ili, kaj multaj aliaj kiuj, tamen, rezistis en la K.P., ne komprenis ke tiuj kiuj en Katalunio estis kontraŭaj al la partia gvidantaro apogadis ĉi tiun en Madrido, kaj inverse, la malamikoj en Madrido estis aliancanoj en Katalunio. La rezulto de la balotado de decembro 1982 estis katastrofa por la Kom. Partio: ĝi atingis nur 4 procenton el la voĉdonoj kaj 4 parlamentanojn kun perdo de 15 deputitoj kompare al la antaŭa balotado.

Sed la ĉefa rezulto de la balot-procezo de 1982 estis ke sep jarojn post la morto de la diktatoro alvenis al la regado de la lando iu Socialista Partio kaj malfermiĝis nova etapo en la historio de Hispanio. Alia rezulto, kies efiko ne estis sufiĉe perceptita tiam, estis ke en la politika vivo de la lando estiĝis la t. n. “du-partiismo” t. e. la politika situacio laŭ kiu longdaŭre sin turnas en la regado de la lando nur du ĉefaj partioj. Ankaŭ tiurilate la kazo de Hispanio fariĝis simila al ties de multaj landoj de la kapitalista mondo ĝenerale kaj de Okcidenta Eŭropo konkrete.




La Socialista Partio atingis en la balotado de decembro 1982 dek milionojn da voĉdonoj. Dua partio laŭ tiu balot-procezo estis **Popola Alianco**, estrita de Manuel Fraga. Ĉi tiu pensis kaj publike deklaris ke lia opozicia batalado igos ke baldaŭ la Socpartio devos rezigni la povon kaj kunvoki novan balotadon. Sed pri tio li tre eraris. Lia dekstrara partio, ja, estos de tiam la alternativo de la socialistoj en la du-partiisma sistemo kiu, fakte, komenciĝis tiam, sed por alveni al la povo, lia partio, jam subgvide de alia lidero, devos atendi ankoraŭ ne malpli ol 14 jarojn.

Kie, jes ja, okazigis vera ŝoko kaj krizo la balotaj rezulto de 1982 estis en la Komunista Partio. La ega fiasko de tiu organizaĵo en la tiama balotado pliakrigis la malkontenton kaj interfrontiĝon en la K.P. Santiago Carrillo sin vidis devigita demisii kiel Ĝenerala Sekretario sed li manovris por konservi la povon en la partio. Tiucele li promociis kiel sekvanton lian homon kiu tre estis apoginta lin ĝis tiam en ĉiuj konfliktoj de la partio. La nova Ĝenerala Sekretario estis la juna asturiano Gerardo Iglesias. Pere de ĉi tiu, Carrillo volis daŭre kontroli la aferojn de la Kompartio. Tamen Gerardo ne alĝustiĝis al tia du-kapeco kiun Carrillo pretendis. Dum la sekvintaj du jaroj pli kaj pli evidentiĝis la malakordo inter ambaŭ komunistaj lideroj, ĝis la definitiva rompiĝo en 1985. Tiam Carrillo forlasis la Kompartion kune kun liaj sekvantoj, kio plidamaĝis la organizaĵon kiu jam estis suferinta antaŭen aliajn du skismojn.

Dum kvar parlamentaj periodoj, ekde 1982 al 1996 Hispanio estis regita de la Socialista Partio pere de registaroj ĉiam prezidataj de Felipe González, Ĝenerala Sekretario de tiu partio. Ĉar tiu etapo estis karakterizita de tiu realaĵo, ĝi estis konata sub la nomo "Felipismo". Dum tiuj jaroj Hispanio spertis alian gravan ŝanĝon ĉefe en la tereno de la internaciaj rilatoj: eniro en la Eŭropan Ekonomian Komunumon, integriĝo en la NATO-n... Tiu epoko karakteriziĝis ankaŭ pro ekonomia pliboniĝo, la altiĝo de la vivnivelo de la loĝantaro, iomgrada enkonduko en la komfort-socion kaj konsum-socion, politika stabileco, leĝigo de socialaj plibonigoj… kaj koruptado.

La unua jardeko de la socialista regado estis nomata de la oficiala propagando «jardeko de la ŝanĝo». Sed krom la evidentaj ŝanĝoj kaj progresado estis ankaŭ aferoj pri kiuj apenaŭ oni progresis: en la reformo de la centra Administracio de la ŝtato kaj la efiko de la publikaj servoj, la ĉiama problemo de la senlaboreco kaj la diferencoj inter la regionoj. Kiam finiĝis, en 1996, la felipista epoko, oni povis aserti ke Hispanio trairis dum tiuj jaroj longan vojon de «modernigado». Tiu procezo implikis ampleksan leĝigadon por adapti al la konstitucio multajn aferojn de la landa realaĵo. Sendube oni multe progresis sed eble malpli ol necese kaj eble, sed la lastaj jaroj de la socialista regado, ekde 1989, la koruptado estis speciale grava.

En 1982, la Socpartio atingis la povon dank' al la slogano "POR EL CAMBIO" (Ŝanĝo-cele). Sed, dek-kvar jaroj de «socialista regado», aŭ de iu socialista partio tute ne signifas dek-kvar jaroj de ***socialismo***. Verdire, la socialistoj celis konkeri la politikan spacon de la centrismo, do ilia agado tute ne estis socialista. Tiu regantaro neniel transformis la socian ordon nek la hereditajn sociekonomiajn strukturojn. Sed oni praktikis ian socian, kulturan kaj edukan reformismon kiuj konkretiĝis en terenoj kiel la eduk-sistemo, laboraĵoj de substrukturoj… kaj alproksimigis nian landon al la eŭropa modelo kaj kiun oni povas esprimi per la termino "modernigado".

La felipista etapo povas esti dividita laŭ tri periodoj de regado klare diferencigitaj. La unuaj du koncernas al la unua jardeko de tiu regado, kaj la lasta, al ties kvar finaj jaroj. Unue disvolviĝis periodo de forta reformista impulso (1982-1986); sekvita de periodo de pli konservativa soci-liberala orientiĝo (1987-1992), kaj fine venis etapo de dekadenco, stagniĝo kaj koruptado (1993-1996), kiu kulminis per la eliro de la socialistoj el la landa regado post la balotado de 1996.

La ministroj de F. González povas esti klasifikitaj en tri grupoj. Unue, la ĉefaj ekonomiaj ministrejoj estis ĉiam okupitaj de specialistoj ligitaj de antaŭe al la Administracio. Tiurilate estis kontinueco kun la regado de la centrisma partio de Suárez kaj Calvo-Sotelo. Dua

grupo de ministroj estis personoj ligitaj al la organiza strukturo de la Socpartio aŭ de la socialista sindikato UGT. Ĉi tiuj ministroj havis la taskon demarŝi la socialan helpon de la ŝtato. Fine, estis la ministrejoj asignitaj al la plej kompetentaj personoj laŭ la naturo de la demarŝendaj taskoj. Tia estis la kazo de la ministrejoj pri Justico, Kulturo… Krome, dum preskaŭ la tuta regado de Felipe González rolis kiel Vicprezidento lia amiko Alfonso Guerra, polemika kaj polemikema homo kun radikala kaj akrmaniera parol-stilo.

Dum la felipista periodo pludaŭre estis problemo en la lando la terorismo de la eŭska organizaĵo ETA. Por alfronti ĝin la regantaro sekrete organizis eksterleĝan kontraŭterorisman (fakte ankaŭ ĝi terorisman) organizaĵon kiun poste oni konis per la nomo GAL kiam ĝi estis malkovrita kaj publike konata. Eĉ kontraŭ la volo de la Regantara Povo, la Jura Povo devis procesi la arestitajn kulpantojn de la teroristaj atencoj de la GAL. La ĉefa kulpulo de tiu ŝtata terorismo, Rafael Vera, persistis en sia strategio ne denoci la kunkulpecon de la politikaj regantoj kvankam li devis suferi enkarceriĝon. Ĉi tiu estis unu el la multaj skandaloj kaj korupt-ad-kazoj de la felipista epoko.

Ekde la 1a de januaro de 1986 Hispanio apartenis al la Ekonomia Eŭropa Komunumo kaj la enkonduko en tiu granda merkato okazigis la eniron de multe da mono el la aliaj membroj de la komunumo en formo de subvencioj kaj ankaŭ, kaj ĉefe, ĉar multaj fremdaj investantoj akiris akciojn de hispanaj entreprenoj. Tio generis situacion –ŝajna aŭ reala– de ekonomia disvolviĝo, kiu, tamen, daŭris dum malmultaj jaroj kaj estis kaŭzo de multaj priekonomiaj skandaloj kaj eksterleĝaj negocoj.

Ne bonvole, la regantaro de la Socpartio devis organizi popolan referendumon pri la aparteno de Hispanio al la milititista kontrakto NATO. Kiel antaŭe raportite, la hispana enkondukiĝo en tiu bloko estis dispono de la antaŭa Ĉefministro Leopoldo Calvo-Sotelo. La landa Maldekstraro plendis pro tio ke tiu ago estis farita sen la konsento de la popolo. La Socialista Partio, tiam en la opozicio estis sin aldoninta al tiu plendo kaj tio estis farita tiamaniere ke ŝajnis indiki ke la partio gvidata de Felipe González malaprobis tiun decidon kaj volis malfari ĝin. Sed post la alveno de tiu Socpartio al la regado de la lando, dum pli ol tri jaroj ties gvidantaro montris neniun intereson pri tiu afero; mankis eĉ mencioj pri la temo. Dume pliiĝis en la lando la protestoj pri tiu afero ĉefe far la Komunista Partio tiam gvidata de Gerardo Iglesias. Fine Felipe González ne plu povis prokrasti la aferon kaj fiksis la daton de la 12a de marto de 1986 por la okazado de Referendumo per kiu la hispana popolo devus decidi pri la aparteno al la NATO. Sed, kontraŭesperite, en la propagand-kampamjo antaŭ la referenduma balotado la regantaro de F. González postulis la apogon al la hispana plurestado en tiu militista kontrakto. Kompreneble, al la desktraro tre plaĉis tiu disvolviĝo de la afero kvankam la ĉefa dekstrara partio, gvidata de Fraga, por ne apogi eksplicite la Socpartion, petis sindetenon de la voĉdonantoj sciante ke la membroj kaj apogantoj de tiu partio scios ke ili devos voĉdoni jese kune kun la membroj kaj sekvantoj de la Soc.Partio. El la fortoj kun parlamenta reprezento nur la Komunista Partio petis nean voĉdonon pri la aparteno de Hispanio al la imperiista arme-bloko. Sed aldoniĝis al la nefavora voĉdonado aliaj grupoj de maldekstraro kaj aliaj fortoj pro diversaj kialoj.


En la popola konsulto voĉdonis favore al la plurestado en la NATO 52,49 procento el la voĉdonintaro, kaj rifuzis tiun apartenon 39,8 procento. La vera Maldekstraro perdis tiun referendumon, sed la fakto ke politika teniĝo de la Komunista Partio ricevis voĉdonan apogon pli grandan ol ties de la antaŭaj politikaj balotadoj igis la gvidantaron de la K.P. pensi ke eble en estontaj balotoj por la Parlamento tiu partio povus atingi bonan rezulton se ĝi unuigas ĉirkaŭ si ĉiujn kiuj rifuzis la apartenon de Hispanio al la NATO. Do, rezulte de tiu konvinko la kompartia estraro prenis iun decidon kies sekvoj ankoraŭ nuntempe (en 2012) estas malsame interpretataj tiel ene kiel for de tiu partio. Gerardo Iglesias elpensis la kreadon de koalicio, nomata **Unuiĝinta Maldekstro**, celanta arigi ĉirkaŭ la Komunista Partio aliajn fortojn sin oponintajn al la politiko de Felipe González. Tiu koalicio konkuris jam en la balotado de la 22a de junio 1986. Ĝia rezulto estis multe pli bona ol tiu de la jaro 1982 sed ne pravigis la esperon de la iniciatintoj de tiu politika elpaŝo. La partietoj de Adolfo Suárez kaj Santiago Carrillo, kiuj deziris reveni al la politika vivo, atingis sensignifan voĉdon-kvanton, kio konvinkis ilin definitive retiriĝi el la politiko.

Sed apartan atenton meritas la efiko de ĉi tiu balotado sur Popola Alianco, la dekstrara partio de Manuel Fraga. Kvankam ĝi daŭre estis la dua partio en la lando (25,97 procento el la voĉdonoj kontraŭ 44,06 procento de la Socialista Partio), tiu rezulto konstituis veran politikan malsukceson por la lidero, Fraga, kiu decidis retiriĝi, ankaŭ li, el la politika vivo, almenaŭ je tutlanda nivelo. En la sekva kongreso de tiu partio estis konkurado por la lidereco inter Herrero de Miñón kaj Antonio Hernández Mancha. Venkis en la konkurado ĉi lasta, pli juna ol la alia.

La Socialista Partio konservis sian absolutan parlamentan plimulton kaj ĝia politiko estis vera perfido kontraŭ la socialistaj principoj. Eĉ gravaj personoj de tiu partio, kiel Nicolás Redondo, Ĝenerala Sekretario de la socialista sindikato UGT, forlasis la Parlamenton malakorde kun la politiko de Felipe González kaj partoprenis en kunvokado de ĝenerala striko kunsente kun la komunista sindikato estrita de Marcelino Camacho. La erodo de la prestiĝo de la Socpartio evidentiĝis en la sekvinta balot-procezo, tiu de oktobro de 1989, kiam ĝi perdis 4,4 procenton el la voĉdonoj kaj 9 deputitoj. La ĉefa Dekstrara Partio daŭre restis kiel dua en la Parlamento sed ankoraŭ tre malproksime el la Socpartio. Tiam ĝi jam ne estis estrita de Hernández Mancha. Ĉi tiu estis fiaskinta en cenzur-debato kontra la registaro kaj perdis apogon ene de la partio. Fraga revenis sed por apogi novan lideron, José María Aznar, kaj ŝanĝis la nomon de la organizaĵo, kiu de tiam nomiĝas Popola Partio anstataŭ Popola Alianco. Ankaŭ estis ŝanĝo en la lidereco de Unuiĝinta Maldekstro. En kongreso de la Komunista partio en 1988 Gerardo Iglesias estis


Alfonso Guerra


Gerardo Iglesias


Antonio H. Mancha


José María Aznar


Nicolás Redondo


Marcelino Camacho


Julio Anguita


Narcís Serra

anstataŭita de Julio Anguita kaj tiu ŝanĝo en la estreco de la K.P. en tiu epoko signifis ankaŭ lidereco-ŝanĝo en la koalicio Unuigita Maldekstro. Anguita estis prestiĝa komunista figuro kiu dum kelkaj jaroj estis rolinta kiel urbestro de Kordovo. En 1989 la balotaj rezultoj de la koalicio estis sufiĉe bonaj, ĝi preskaŭ reakiris la parlamentan forton de la kompartio en la du unuaj balotadoj de la demokratia etapo: 9,7 procentoj el la voĉdonoj kaj 17 deputitoj.

Ĝis la sekva ĝenerala balotado, tiu de junio de 1993 daŭre kaj plu malpliiĝis la prestiĝo kaj la popola apogo de la reganta Socialista Partio tiel ke en tiu balotado ĝi jam ne plu atingis parlamentan plimulton (ĝi perdis 16 parlamentanojn) kaj por daŭre regadi ĝi devis negoci kaj koalicii kun alia(j) politika(j) forto(j). Unuiĝinta Maldekstro –kiu iomete plifortiĝis en tiu baloto– estis preta provizi la koncernan politikan apogon sed nur kondiĉe ke la farota politiko de Felipe González fariĝu pli maldekstrema, vere socialista. Ĉar la Socpartia lidero volis daŭre regadi centrisme aŭ eĉ dekstreme kiel ĝis tiam, li preferis koalicii kaj interakordi kun politika(j) forto(j) kiu(j) ne postulus tian politikan ŝanĝon, kaj sukcesis trovi tiun apogon en la naciismaj partioj de la separatismaj regionoj Katalunio kaj Eŭskio. Sed por atingi tiun apogon li ja devis pagi per politikaj ŝanĝoj sed ne en la sociekonomia tereno sed en tiu de la postuloj kiujn oni faris al li pri pliigo de la suvereneco aŭ memregado de tiuj aŭtonomaj regionoj. Tiutipa politiko plu pliakriĝis la elreviĝon de multaj voĉdonintoj de la Socialista Partio.

Krome dum tiuj lastaj jaroj de la Socpartia regado fariĝis pli oftaj la priekonomiaj skandaloj kaj koruptiĝaferoj. Preskaŭ ĉiutage aperadis presaraj informoj pri novaj eksterleĝaj operacioj pri kiuj foje kunkulpis membroj de la reganta partio kaj eĉ iu ministro. Inter tiuj kazoj estis aferoj en kiuj estis implikita iu frato de la Vicprezidento Alfonso Guerra. Ĉi tiu eraris intencante nei kaj kaŝi la aferojn kaj tio malbonigis lian situacion en la partio kaj en la ĝis tiam bonaj rilatoj kun la Prezidento. Fine Guerra devis demisii kiel Vicprezidento, sed lia sekvinto en tiu posteno, Narcís Serra, baldaŭ devis demisii, ankaŭ li, kune kun la ministro pri Defendo, kiam oni malkovris ke ili estis organizintaj operacion de spionado (pertelefona interveno) al kelkaj hispanaj altranguloj, inter ili la reĝo mem.

Fine, en la ĝenerala balotado de marto 1996 la Popola Partio subgvide de José María Aznar atingis parlamentan plimuton, 156 deputitoj, kontraŭ 141 de la Socialista Partio. Ĉi tiu ne estus povinta regi eĉ se ĝi kalkulus kun la apogo de Unuiĝinta Maldekstro, kiu atingis 21 parlamentanojn (la plej alta el ĝia ĝisnuna historio), ĉar ĉi-foje la kataluna naciisma partio, kaj ankaŭ iu koalicio de Kanaria Insularo, post dumonata negocado kun José María Aznar, apogis ĉi-ties parlamentan aprobon kiel Registar-Prezidenton, kompreneble ŝanĝe de politikaj avantaĝoj.




La rezulto de la ĝenerala balotado de 1996 metis finon al la felipismo. Tiu longdaŭra regad-periodo, socialista laŭnome sed fakte centrisma de socipolitika vidpunkto, karakteriziĝis pro tio ke tiam fariĝis videblaj la signoj de kadukiĝo de la kapitalisma modelo "kejnsisma" kaj komenciĝo de la novliberalismo. En Hispanio, same kiel en la ceteraj landoj kun alte evoluinta industriismo, tiuj signoj estis, ĉefe, la privatigado de grandaj ŝtataj entreprenoj. Sed dume, la politika gvidantaro kaj plejparto el la loĝantaro preferis blinde ne percepti la ekŝanĝon kaj ĝui komforton kaj prosperon kiuj estis nur ŝajnaj, sen firma bazo… En 1992, kvar jarojn antaŭ la felipism-fino, Hispanio festis la Kvinan Centjaron de la malkovro de Ameriko. Tiuokaze estis en nia lando la Olimpi-ludoj kaj la Internacia ekspozicio. Estis alia ekzemplo de la korupteca naturo de la tiama regantaro la fakto ke tiu Universala ekspozicio okazis en Seviljo, la urbo de La Prezidento Felipe González kaj la Vicpezidento Alfonso Guerra. Krome kun la preteksto de tiu ekspozicio oni konstruis fervoj-linion por alt-rapidaj trajnoj destine al la menciita urbo. Ĉi tiu kaj aliaj multekostaj projektoj estis kaŭzo de granda enŝuldiĝo de la lando. Hispanio havas depost tiu epoko pli ol kvindekon da flughavenoj; Germanio, kun loĝantaro multe pli granda kaj riĉa. havas proksimume 20 flughavenojn malpli ol Hispanio. Kompreneble, multaj el la hispanaj flughavenoj havas nenian uzadon. Similan ekscesab elspezadon oni faris en la konstruado de fervojaj linioj, kelkaj por alt-rapidaj trajnoj; multaj el ĉi-ties staci-domoj estas neuzataj pro manko de vojaĝantoj. La koncerna elspezado, ofte, estis decidita de la regionaj aŭtoritatoj sen alia celo ol la prestiĝo de la regionaj regantoj kaj ties regantaj partioj, tio estas, precipe la du ĉefaj partioj de la hispana dupartiisma sistemo krom tiuj kiuj havis influon en iu aŭ alia el la naciismaj regionoj, kiel Katalunio, Eŭskio, Galegio…

La alveno de José María Aznar kiel nova ĉefministro ŝanĝis nenion tiurilate. Lia Popola Partio kaj la Socialista Partio tiam en la opozicio, daŭre dediĉiĝis ekde la la ŝtata kaj la regionaj administracioj organizi tiujn faraonajn kaj senutilajn laboraĵojn kiuj pli kaj pli kreskigis la ŝuldojn de la lando. De politika vidpunkto, la nova regantaro ne multe ŝanĝiĝis kompare al ties de la felipismo, almenaŭ dum la unua kvarjara periodo de la regado de Aznar. Ni memoru ke li povis regi nur dank' al la parlamenta apogo de iuj regionaj kaj naciismaj fortoj. Tiuj apogantoj altrudis al la dekstrema partio, interalie, ian centrisman politikon kiu ne multe ŝanĝiĝis kompare al la felipista centrismo de la Socpartio.

La registaro de Aznar demarŝis la partoprenon de Hispanio en la Moneca unuiĝo de Eŭropo. Dum tiuj jaroj la kapital-profitoj plialtiĝis 30 procenton dum la plialtiĝo de la salajroj estis 3 procento, la prezo de la loĝejoj kreskis 28 procenton kaj fiska premo plialtiĝis 10 procenton. Bona rezulto, tamen, estis la fakto ke oni kreis pli ol 300.000 novajn laborpostenojn kaj la senlaboreco en Hispanio malpliiĝis 7 procenton.

Ĉiukaze granda parto el la hispana loĝantaro konsideris pozitiva tiun kvarjaran regadon kaj en la balotado de la 12a de marto de la jaro 2000 la Popola Partio atingis 183 deputitojn, 27 pli ol en la antaŭa balotado, do, sufiĉe por regadi sen plua helpo de aliaj politikaj fortoj.

En tiu balotado la Socialista Partio perdis 16 parlamentanojn. Menciindas ke tiam jam ne plu lideris ĝin Felipe González. Ĉi tiu estis intencinta promocii novan ĝeneralan sekretarion de la partio (Joaquín Almunia) eble kun la celo resti li mem kiel ĉefa kandidato por sekva balotado, sed la afero diskuris tra neantaŭpensita vojo. En interna baloto de la partio plimulto el la voĉdonantoj elektis kiel ĝeneralan sekretarion alian homon (Josep Borrell). Tiam Felipe konspiris ene de la partio por senkreditigi tiun homon, kiu sin sentis devigita demisii. Do, laŭ la volo de F. González fariĝis lidero de la Socpartio Joaquín Almunia, sed ĉi tiu rezultis malpli manipulebla ol esperite de Felipe kaj manovris por ke la partio deklaru lin kandidato por la balotado de la jaro 2000. Tiamaniere finiĝis la politika kariero de Felipe González kun tiel malmulte da honoro por li kiel ĝi estis dum lia tuta regado. Cele atingi bonan pribalotan rezulton en la balotado, Joaquín Almunia faris antaŭbalotan koalicion kun Unuiĝinta Maldekstro. Pri ĉi lasta oni devas precizigi ke tiam ĝia lidero Julio Anguita estis preta forlasi la politikon pro kor-malsano. Li jam estis demisiinta kiel ĝenerala sekretario de la Komunista Partio kaj anstataŭita en tiu posteno far Francisco Frutos. Fakte, estis ĉi lasta kiu pridemarŝis kun Joaquín Almunia la koaliciiĝon de Unuiĝinta Maldekstro kaj la Socialista Partio. La ĉeso de la estreco de Anguita en Unuiĝinta Maldekstro estis atendante nur la baldaŭan kongreson de tiu politika forto. Sed en baloto de la jaro 2000 la tuto de la balotaj atingaĵoj de ambaŭ maldekstraj partioj ne sufiĉis por superi la parlamentan forton de la Popola Partio de Aznar. Do, ĉi tiu povis plu regadi la landon dum la kvar unuaj jaroj de la tria jarmilo post esti reginta ĝin dum la lastaj kvar jaroj de la dua jarmilo. Unuafoje ekde ties fondiĝo, Unuiĝinta Maldekstro ne kreskis balote sed male: ĝi perdis 13 deputitojn. Por ekspliki ĉi tion oni


Josep Borrell Joaquín Almunia Francisco Frutos Gaspar Llamazares

devas konstatigi ke dum la lasta jardeko de la 20a jarcento falis la komunistaj reĝimoj de Orienta Eŭropo. Tio okazigis gravajn krizojn en ĉiuj komunistaj partioj de la kapitalista mondo ĉar, kiel sciate, La komunista reĝimo de Sovetio estis referaĵo de ĉiuj ĉi partioj. Tial la likvidistaj fortoj ene de tiuj kompartioj, kaj ankaŭ en tiu de Hispanio, intencis malaperigi aŭ ŝanĝi la komunistan karakteron kaj difinon de tiuj politikaj fortoj. En Hispanio tiucela batalo alprenis la formon de potenciigo de Unuiĝinta Maldekstro domaĝe al la Komunista Partio. Julio Anguita, ĉeflidero de ambaŭ organizaĵoj, ne havis tian likvidistan teniĝon, li daŭre volis konservi kaj potencigi la hispanan kompartion eĉ se ene de Unuiĝinta Maldekstro, sed li, naive, en la kvina kongreso de Unuiĝinta Maldekstro estis formulinta kaj aprobiginta statutaron kiu akcentigis la sendependecon de U. M. rilate al la K.P. Surbaze de la nova statutaro la likvidistoj volis ruinigi kaj eĉ malaperigi la komunistan organizaĵon. La rezisto de Anguita kaj ties apogantoj kontraŭ la likvidista sektoro okazigis, interne de la komunistaj vicoj, longan bataladon rezulte de kiu forlasis ambaŭ maldesktrajn organizaĵojn multaj el ties membroj, iuj el ili sufiĉe prestiĝaj kiel kelkaj geparlamentanoj kaj la du antaŭaj komunistaj lideroj: Santiago Carrillo kaj Gerardo Iglesias, kaj tio estis oportune diskonigita de la burĝa presaro kontribuante sufiĉe damaĝi la prestiĝon de tiuj maldekstraj organizaĵoj.



Nu, post la malsukceso de Unuiĝinta Maldesktro en la balotado de marto de la jaro 2000, en la baldaŭ posta kongreso de tiu organizaĵo estis elektita, kiel anstataŭanto de J. Anguita, ne la ĝenerala sekretario de la K. P., Francisco Frutos, sed Gaspar Llamazares, la ĉeflidero de la komunistoj de nia Asturia regiono. La elekto de tiu ulo estis nur pro tio ke en la pribalota malsukceso de U. M. nur en Asturio ne tiel estis granda la malsukceso kiel en la cetero de la lando. En nia hispana demokratio, samkiel en multaj aliaj landoj, en la politika tereno oni privaloras ĉefe la balotajn sukcesojn, ne la bonecon kaj kongruecon de la politikaj programoj. Do, unuafoje ekde la fondiĝo de Unuiĝinta Maldekstro la lidereco de tiu organizaĵo kaj de la Komunista Partio ne apartenis al la sama persono kaj oni povis antaŭvidi ke tio estos fonto de problemoj, sed la afero komplikiĝis kiam Llamazares, antaŭe apoganto de Anguita, aldoniĝis, ankaŭ li, al la likvidista sektoro celanta nuligi la hispanan komunismon. Tio signifis ke dum la sekvaj jaroj plu daŭris la krizo en la komunistaj vicoj kaj en la sino de U. M. kun la sekva senkreditiĝo de tiuj organizaĵoj antaŭ la maldekstra voĉdonantaro de Hispanio.

Dum tiuj jaroj, ĝis 2004, plu regis la landon la Popola Partio subgvide de J. M. Aznar. Sed la nova jarcento kaj nova jarmilo p. K. havis dramecan komenciĝon; la 11a de septembro de 2001 okazis la famaj terorismaj atencoj en Usono kontraŭ la Pentagono-konstruaĵo kaj la Ĝemelturoj. Tiu evento kaj ties militaj sekvoj en Afganio kaj Irakio apartenas ne al la hispania sed al la universala historio kaj estas ĉies konataj, sed ni menciás ilin ĉar ili sufiĉe efikis ankaŭ sur –kaj kontraŭ– nia lando. Sed tiu efiko ne venis tuj; dumtempe daŭris ankoraŭ la ekonomia festado. Fine de tiu sama jaro 2001, aŭ pli ĝuste la unuan tagon de 2002, solene komenciĝis la funkciado de la nova komuna mono de la Eŭropa Komunumo: la eŭro. En Hispanio samkiel en la ceteraj landoj de tiu Komunumo, escepte Britio, oni devis de tiam ŝanĝi la ĝistiaman monon per la novaj, eŭraj, banknotoj kaj moneroj.

Cetere la regado de Aznar daŭre estis sufiĉe normala ene de la politika kadro de la hispana konstitucio kvankam tiu ulo dum sia junaĝo apartenis al la frankisma junulara sekcio, de falangista ideologio, de la oficiala partio de la diktaturo. Daŭre ekzistis la terorismo far la eŭskia organizaĵo ETA sed la batalado kontraŭ ĝi, male ol dum la felipismo, fariĝis nur per laŭleĝaj rimedoj. Dum tiu dua etapo de la regado de Aznar oni kreis 600.000 novajn laborpostenojn kaj la senlaboreco malgrandiĝis ĝis 9,8 procento; dum la antaŭaj 20 jaroj neniam tiu procento estis tiel malalta en nia lando. Kompreneble, tiu ekonomia bonstato, same kiel la krizo kiu venis kelkajn jarojn poste, ne estis nura hispana fenomeno ser fakta rezulto de la ekonomia stato de la kapitalista mondparto en kiu troviĝas nia lando.

Menciendas ke dum la ses unuaj monatoj de 2002 José M. Aznar, laŭ la normoj de la Eŭropa Unio, rolis kiel Prezidento de la Konsilantaro de tiu E. Unio. Tio plu kaj pli kontribuis pligrandigi lian prestiĝon ene de la lando kaj ŝajnis ke nenio povus malhelpi ke lia partio gajnu la sekvan ĝeneralan balotadon. Tamen oni anoncis ke li ne plu volis dediĉiĝi al la politiko post la finiĝo de tiu parlamenta periodo. Li mem elektis sian sekvonton kiel prezidanton de la Popola Partio kaj verŝajnan Registarprezidenton. La elektito estis Mariano Rajoy. Dume ankaŭ la Socialista Partio devis elekti novan

lideron post la fiasko de Joaquín Almunia. La elektito estis José Luis Rodríguez Zapatero. Tiam neniu kuraĝus pensi ke ĉi tiu estus la nova Ĉefministro.
Sed okazis neatenditaĵo provokita de la erara politiko de Aznar en la tereno de la internaciaj rilatoj preskaŭ je la fino de sia regad-periodo. La enkadriĝo de Hispanio en la militista strukturo de la NATO kaj la alianco kun Usono implikis nian landon en la militajn operaciojn de la usona potenco. Tiusence la hispana registaro konsentis apogi la militan intervenon en Jugoslavio kaj sendis trupojn tien. Kiel sciate, sekve de la teroristaj atencoj de la 11a de septembro 2001 la usona Prezidento Bush entreprenis militan intervenon ankaŭ en Afganio, kaj la registaro de Aznar sendis hispanajn trupojn ankaŭ al tiulanda milito. Tiuj disponoj ne vekis grandan opononon en la lando ĉefe pro tio ke la UNO mem apogis tiujn militajn intervenojn. Sed la afero ŝanĝiĝis en la jaro 2003 kiam la usona prezidento volis efektivigi militan agreson kontraŭ Irakio. Ĉi-foje mankis la internacia apogo, ĉefe ties de la Eŭropa Unio kaj Aznar estis unu el la malmultaj eŭropaj regantoj kiuj apogis tiun operacion kaj sendis trupojn tien, eĉ kontraŭ la volo de plejparto el la hispana popolo kaj sen konsulti la Parlamenton kiel disponas la Konstitucio. En multaj hispanaj urboj okazis grandaj manifestacioj kontraŭstarante la intervenon de nia lando en tiu konflikto sed la Prezidento Aznar preferis aperi en la t. n. "foto de la Acoroj" apud George Bush kaj Tony Blair. Komence ŝajnis ke tio efikos nenion sur la popola pribalota apogo al la Popola Partio. Ja, en la balotado de la 25a de majo de 2003 por la municipoj kaj la regionaj parlamentoj tiu dekstrara partio atingis similan sukceson al tiu kiun ĝi ĝuadis en tiu epoko.
Tio igis ĉiujn pensi ke tiu partio, jam kun la kandidateco de Rajoy, venkos en la ĝenerala balotado de la 14a de majo 2004. Sed ĝuste tri tagojn antaŭ tiu dato, la 11an de majo, okazis en Madrido gravaj teroristaj atencoj. En la hispana ĉefurbo je la 7:37 horo matene okazis enorma eksplodo en la fervoja stacidomo de Atoĉo. Post unu minuto estis dua eksplodo en alia trajna stacio. Je la 7:39 horo okazis tria eksplodo en iu kvartalo de tiu urbo. Dum la sekvaj du minutoj estis pluaj 7 bombo-eksplodoj. En tute 10 eksplodoj kiuj kreas ĥaoson en la urbo. Ĝi estis sendube la plej grava terorista atenco okazinta en nia lando. Rezultis 192 mortintoj kaj 1.500 vunditoj. Dum la tuta lando, konsternite, sin demandis kiu(j) provokis tian hororon, la registaro hastis deklari ke la atencoj estis ago de la eŭska terorista bando ETA. Ĉi tiu organizaĵo tuj faris deklaron komunikante ke ili ne partoprenis en tiu afero. Verdire, tiu deklaro estis kredebla ĉar la bando ĉiam agnoskis siajn atencojn. Baldaŭ fariĝis publikaj la unuaj konkludoj de la polica esplorado pri la afero laŭ kiuj la responsuloj de tiuj atencoj estis teroristoj de la araba organizaĵo Al-Kaedo. Krome poste eĉ estis publika deklaro de tiu bando deklarante ke ili faris tion en Hispanio tial ke ĉi tiu lando kunkulpas kun la usona imperiismo en la agreso al arabaj kaj islamaj landoj.


José Luis R. Zapatero


Mariano Rajoy

Spit' al tiu evidenteco, la registaro de Aznar daŭre insistis kulpigante la eŭskan bandon. La insisto de la Popola Partio pri tiu afero estas klare komprenebla: se la atencoj estus ago de ETA tio ne malbonigus la pribalotajn perspektivojn de la 14a de tiu monato ĉar tiu bando ĉiam senĉese faris teroristajn atencojn ekde la epoko de la frankismo kiu ajn estu la hispanaj regantoj, sed, male, se vere la araba terorismo punas la intervenon de Hispanio en la milito kontraŭ Afganio kaj Irakio, tio metas respondecon pri la afero sur la hispana regantaro kiu entreprenis tiun aventurisman politikon kaj tio povus damaĝi la partion de Aznar en la balotado kiu devus okazi post du tagoj.
Kaj ĝuste tio okazis: La Popola Partio perdis 35 parlamentanojn kaj la socialista Partio gajnis 39. Zapatero atingis venkon kiun antaŭ malmultaj tagoj esperis neniu en Hispanio, eĉ ne li mem. Alia burĝa partio kiel la katalunisma kiel ***Convergència i Unió*** perdis 5 parlamentanojn dum iu maldekstra partio de tiu sama regiono gajnis 7. Mencindas ankaŭ tion ke la Unuiĝinta Maldeskstro kies ĉefa kandidato estis Gaspar Llamazares perdis 4 deputitojn kaj restis kun nur 5. Duafoje la balot-rezulto de tiu politika formacio malboniĝis kaj la kaŭzo daŭre estis la interna kverelo kaj malakordo pri la pluekzistado de la Komunista Partio.
La 22a de tiu monato edziĝis Felipe, la filo de la Reĝo kaj estonta reĝo de Hispanio. La organizantoj de la ceremonio devis alĝustigi la ordon de la invititoj tial ke la Registarprezidento ne estos Mariano Rajoy kiel esperite sed José Luis Zapatero, kaj la ĉefa figuro de la politika opozicio estos inverse: Rajoy anstataŭ Zapatero. Komenciĝas nova politika etapo.


Bildoj de la rezultoj de la terorista atenco de la 11a de majo de 2004 en Madrido




Kiam, en la balotado de majo 2004, la dekstrara PP perdis la parlamentan plimulton, la afero sendube havis kiel ĉefa kaŭzo la ekkonscio de grandparto el la hispana loĝantaro pri la erareco de la milita politiko de Aznar, kaj tiu ekkonscio estis vekita de la gravaj teroristaj atencoj okazintaj tri tagojn antaŭ la balot-dato. Sed, krom tio, estis aliaj aferoj kiuj vekis la rifuzon de multaj gecivitanoj al la politiko de la ĝistiama regantaro. Temas pri la novliberalismo, t. e. la aplikado de la novliberala doktrino en la realo. Unu jaro kaj duono antaŭ la menciita balotado okazis la droniĝo, apud la galegia malbordo, de iu nafto-portanta ŝipo, la ***Prestige***, kio okazigis egan ekologian katastrofon pro elverŝiĝo de la nafto tra multaj kilometroj de la marbordo. Tiam rezultis klare ke pri tiu akcidento respondecis la registaro kaj ties novliberalisma politiko. Oni vidis ke laŭ la aplikado de tiu ekonomika doktrino, por la transportado de nafto oni kontraktadis la plej malmultekostajn ŝipojn kaj laŭ kiel eble plej malaltkosta asekurado. Tia filozofio: elspezi kiel eble malplej eĉ kontraŭ la intereso kaj la sekureco de la personoj, estis gvidlinio de la tiudoktrinaj ekonomikistoj. Tio evidentiĝis ankaŭ post kelkaj monatoj kiam iu aviadilo per kiu revenis al Hispanio dekoj da hispanaj militistoj kiuj estis batalinte en Afganio falis sur turkia teritorio kaj pereis ĉiuj vojaĝantoj. La registaro estis kontraktinte, por tiu transportado de militistoj, la plej malmultekostan kaj malaltkvalitan flugilon. Nu, Aznar ne estis la sola hispana Ĉefministro kiu regadis laŭ tia politiko. Antaŭ li, jam Felipe González estis reginte simile, sed la menciitaj akcidentoj utilis por ke la hispana socio iome ekkonsciu pri la malhumaneco de tiu politiko, kiu, cetere, ne nur ne pliboniĝis de tiam sed tute male.

José Luis Rodríguez Zapatero prezidis la hispanajn registarojn ekde majo de la jaro 2004 ĝis novembro de 2011. Tuj post lia alveno al tiu regad-posteno li prenis iun neatenditan disponon: li retiris la hispanajn trupojn trovigantajn en la milito en Irakio. Ja, dum la balotkampanjo li promesis efektivigi tiun retiron de trupoj dum la sekvaj tri monatoj post lia alveno al la registaro. Sed, kompreneble, neniu esperis ke li plenumu tiun promeson. Laŭtradicie, la politikistoj neniam plenumas la promesojn faritajn dum la balotkampanjo, kaj la popolo, almenaŭ en nia lando, estas alkutimigita al tio ke la regantoj, atinginte la povon al kiu ili emas, agadas tute male ol ili estis promesinte. Sed ĉi-foje la promeso estis plenumita kaj krome la ago estis farita antaŭ la promesita lim-dato. Io simila neniam estis okazinte en nia lando antaŭe, …nek poste.

Dum la regado de Zapatero, konkrete dum la unua kvarjara periodo, oni plibonigis la leĝaron pri sociala politiko, ekzemple en tio kio rilatas al la edziĝo de samseksaj personoj, kontraŭ la interseksa perforto, pri sociala helpo al la plej malriĉaj familioj, plifaciligante la demarŝoj por la procezoj de eksgeedziĝo… kaj aliaj en rilato kun la aŭtonomaj regionoj. La unua registaro de Zapatero konsistis el 8 ministroj kaj 8 ministrinoj; menciindas tio ke la tasko de iu el la ministrinoj estis kontroli kaj promocii la egalecon en la socio inter la anoj de ambaŭ seksoj. La Prezidento Zapatero fariĝis sufiĉe fama je internacia nivelo kiam, en septembro de 2004, en la 59a Ĝenerala Asembleo de UNO proponis tion, kion li nomis: “Alianco de Civilizacioj”.

Ĝenerale, en tiuj unuaj jaroj de la regado de Zapatero estis laŭdindaj disponoj sed ĉiam kadre de centrisma politiko. Tia regado estis socialista sed, ja, ĝi ne estis socialisma. T. e. regadis socialistoj sed ilia politiko ne estis socialisma. Kiam, en tiu epoko, en kelkaj eŭropaj landoj estis referendumoj pri la proponita konstitucio de la Eŭropa Unio, ankaŭ en Hispanio okazis referendumo. Kiel sciate, la proponita leĝaro estis kontraŭsociala kaj favora al la interesoj de la bankieroj kaj kapitalistoj. Feliĉe la projekto ne progresis ĉar ĝi ne atingis sufiĉan apogon inter la loĝantaro de iuj landoj, sed en Hispanio la Socialista reaganta partio apogis tiun projekton same kiel 15 jarojn antaŭe estis apoginta la eniron de Hispanio en la NATO. Cetere, la senlaboreco pli kaj pli kreskis anoncante la proksimecon de ega ekonomia krizo kiu iompostiom anteŭenmarŝadis minacanta. En majo de 2006 estis leĝita iu reformo pri la laborkondiĉoj de la salajruloj. Ĝi estis la tria reformo ekde la epoko de Felipe González kaj ĉiuj ĉi reformoj pli malboniĝis la socialan leĝaron pri la situacio de la laboristoj. Oni alvenis al la situacio en kiu, fakte, malaperis la fiksa laboreco kaj ĉiuj novaj labor-kontraktoj estas eventualaj.

Pritemante tiun epokon decas raporti pri la tipo je opozicio kiun la Popola Partio, subgvide de Rajoy, estis efektiviganta kontraŭ la registaro prezidita de Zapatero. Kiel jam informite, tiu partio perdis en la lasta mo-

mento baloton pri kiu ĉiuj enketoj estis anoncinte ke ĝi gajnos. Ĉi tiu situacio ne estis bone akceptita de la lideroj de tiu partio; dum la sekvintaj kvar jaroj ili kondutis kvazaŭ al ili oni estus forrabinte ion. Ĉiuj scias ke la rolo de la politika opozicio estas kritiki kaj eĉ ataki la regantan partion, sed tiuj uloj de la PP kondutis insulte, agreseme… La retiradon de la hispanaj trupoj en Irakio ili taksis kiel neakceptebla faro eĉ post kiam la ceteraj militantoj, inkluzive Usono mem, komprenis ke tiu milita interveno estis eraro kaj ke la plej konvena faro estis eliri el tie, kaj kiam rezultis evidenta ke ne estis veraj la kialoj per kiuj oni volis pravigi tiun intervenon: la posedo, far Irakio, de amasmortigaj armiloj. Kiam estis arestitaj kaj juĝprocesitaj iuj personoj intervenintaj en la teroristaj atencoj de la 11a de majo 2004, restis klare ke la afero estis organizita de islamaj integrismaj organizaĵoj kaj ne de la eŭska bando ETA kiel la Popola Partio pretendis. Tamen, la gvidantoj de tiu partio en ties emo defendi ilian teniĝon atakis ne nur la registaron sed ankaŭ la policon kiu efektivigis la esploron kaj la arestojn kaj la juĝistojn kiuj procesis la teroristojn. Ŝajnis ke tiuj dekstraraj politikistoj volus gajni ne la sekvontan balotadon, de la jaro 2008, sed tiun kiun ili jam estis perdinta en 2004. En tiu linio de freneza opozici-maniero ili senmodere atakis la registaron kiam ĉi tiu entreprenis negocadon kun ETA por meti finon al ĉi ties terorismo, kaj por tiu atakado ili uzis la rankoron de la gefamilianoj de la viktimoj de la atencoj de la eŭska bando, forgesante ke similan negocadon estis entreprenita jam fare de la registaro de Aznar, en kiu estis ministro Rajoy mem.

Tiaspeca opozicio vekis en ampleksaj amasoj de la hispana socio malsimpation al la opozicianta partio kaj tio igis ke ĉi tiu perdis ankaŭ la balotadon de 2008. Dum la balotkampanjo la PP tre akcentis la kritikojn al la registaro surbaze de la ekonomia krizo kies signoj jam estis sufiĉe evidentaj tiam. Sed ili prezentis la aferon kvazaŭ la kulpanto pri la krizo estus la registaro de Zapatero kaj pretendis ke la hispana voĉdonantaro forgesu ke la ekonomiaj kaŭzoj de la krizo estis generitaj de antaŭ multaj jaroj, ankaŭ dum la regado de tiu dekstrara partio. Krome la krizo estis internacia, ne estis nura hispana problemo.

Do, en la balotado de la 9a de marto 2008 la Socialista Partio atingis 169 deputitojn, 5 plus ol en la antaŭa balotado. La PP de Rajoy gajnis 6 parlamentanojn kaj restis kun 154 entute. Preskaŭ ĉiuj naciistaj partioj perdis iom da parlamenta forto. Sed la plej damaĝita en tiu balotado estis la Unuigita Maldekstro liderita de Gaspar Llamazares. Ĉi tiu estis la sola kiu estis elektita en sia madrida kandidataro. Krom li nur alia UM-kandidato estis elektita en Katalunio. Tiu katastrofa rezulto estis eĉ pli grava ol ties de la Komunista Partio en 1982. Llamazares sin vidis devigita demisii kiel ĉeflidero de Unuigita Maldekstro sed tamen li konservis sian parlamentan seĝon. Ĉi tiu balotado konfirmis kaj plifirmigis la bipartiismon en Hispanio.

Nu, Zapatero daŭre ĝuis je sufiĉe da parlamenta apogo por plu regi la landon. En la registaro kiun li formis tiam, unuafoje estis pli da virinoj, 9, ol viroj, 8. De tiam, la ĉefa zorgo de tiu nova registaro kaj dum la sekvaj jaroj estis la ekonomia krizo kiu senĉese pli kaj pli akriĝis. La senlaboreco kreskis, multaj familioj perdis sian loĝejon akiritan kun hipotekoj favoraj al la bankoj. Ankaŭ favoraj al la bankoj estis la monhelpo fare de la ŝtatoj, en Hispanio kaj en aliaj landoj ene kaj for de la Eŭropa Unio. Dum la ŝtatoj sin liberas de la socialaj devoj rilate al la malriĉaj klasoj de la socio, ili alkuras helpi la bankojn kun problemoj. Jen la kontraŭdiro: socialismo por helpi la riĉulojn kaj sovaĝa kapitalismo por la subpremitoj de la sistemo. Kiel dirite, tio ne okazis/as nur en Hispanio sed ankaŭ en multaj aliaj landoj, ĉefe en la sudo de Eŭropo: Portugalio, Italio, Grekujo… fare de ĉiutipaj regantaroj. Sed en Hispanio dum tiuj jaroj post 2008 la afero politike damaĝis la regantan Socialistan Partion. Fakte, kiam poste okazis balotado por la Eŭropa Parlamento atingis plimulton la dekstrara Popola Partio.

Je la fino de la jaro 2009 la nombro da senlaboruloj en Hispanio estis 4,4 milionoj da personoj, el kiuj 1,4 milionoj ricevadis neniun monhelpon. Dum la lasta monato de tiu jaro 55.000 personoj perdis sian laborpostenon kaj la procento de senlaboreco estis 18,8 kaj de tiam ĝi daŭre kreskis kaj la landa deficito atingis la sumon je 87.000 milionoj da eŭroj. Por alfronti la situacion la registaro plialtigis la impostojn, kio igis malpliiĝi la konsumado de la civitanoj kaj ĉi tio plikreskigis la bankroton de pliaj entreprenoj kaj sekva kreskado de la senlaboreco.

Dum la unuaj ses monatoj de la jaro 2010 Zapatero prezidis La Eŭropan Union kune kun ĉi ties konstanta Prezidento Herman Van Rompuy. Dum tiu jaro daŭre plu batis nian landon la ekonomia krizo. Inter la disponoj de la registaro por alfronti tiun problemaron estis plialtigo de la aĝo de emeritiĝo al 67 jaroj. La malkontento de la laboristoj kaj ĉiuj civitanoj ĝenerale evidentiĝis ankaŭ inter la membraro de la Socialista Partio. Dum tiu jaro la senlaboreco atingis la nombron je 4,6 milionoj da personoj. En monato majo la registaro anoncis ke la salajro de la funkciuloj estos malpliigita je 5 procento kaj ke la pensiuloj ne ricevos la kutiman plialtigon akorde kun la altiĝo de la prezoj. Krome la ŝtato demetis 6.000 milionojn da eŭroj el la sumo asignita al la socialaj servoj plus kromajn 600 milionojn el la elspezoj destinitaj promocii la industrian disvolviĝon. Dume la bankoj ricevis grandan sumon por kompensi iliajn perdojn kaj la bankieroj –eĉ tiuj de la bankoj kiuj bankrotis pro malbona demarŝado– asignis al si mem altegajn pagojn kaj pensiojn.

La partioj de la opozicio, ĉefe la Popola Partio kritikis tiujn farojn. Konkrete J. M. Rajoy deklaris ke li neniam estus preninta tiujn decidojn kaj ke kiam li regos ne okazos tiaj aferoj. Li senĉese postuladis ke la Registar-Prezidento, uzante la kapablon kiun la konstitucio asignis al li, demisiu kaj kunvoku novan balotadon por la Parlamento antaŭ la lim-dato de 2012.

En junio de 2010 nova reformo de la labormerkato pli malbonigis la situación de la gelaboristoj kun perdo de laboraj rajtoj kaj plifaciligo de la senlaborigo. La 29an de septembro estis ĝenerala striko. Kiel kutime, tiu

striko estis unutaga, sed fine de la jaro la kontrolistoj de la flughavenoj strikis dum kelkaj semajnoj kaj estis interrompita la flug-trafiko en la tuta lando. Tiam la procento de senlaboreco en la lando estis 20: entute 4,7 milionoj da senlaboruloj.

En aprilo de 2011 Zapatero anoncis ke li ne plu kandidatos por prezidi la Socialistan Partion kaj malfermis internan procezon de elektado de nova partia lidero. El la interna batalo por okupi tiu posteno eliris kiel venkinto Alfredo Pérez Rubalcaba. Ankaŭ Unuigita Maldekstro devis elekti novan lideron post la demisio de Llamazares; la elektito, post longa kaj malfacila negocado inter la diversaj grupoj kun diversa influo, estis la komunisto Cayo Lara.

La 15an de majo de tiu jaro okazis en proksimume 50 urboj de Hispanio samtempaj sociaj plendoj. Temis pri movado ŝajne spontana; la kunvokado oni faris pere de poŝtelefonoj. Neniu konkreta organizaĵo ŝajnis gvidi kaj kontroli la aferon. La movado ricevis la nomojn je "15M" kaj "indignitoj". Estis koncentriĝoj kaj manifestacioj de vere kontraŭsistemaj uloj, kiuj kritikis kaj atakis la politikon de ĉiuj partioj de la sistemo, ĉu dekstraj, ĉu maldekstraj. Unu semajnon poste estis balotado en la lando por elekti la municipajn konsilantarojn kaj la regionajn aŭ aŭtonomajn regantarojn. La Popola Partio atingis avantaĝon de 10 procento super la Socialista Partio. Tio kuraĝigis Rajoy-n pli kaj pli ofte postuli la antaŭenigon de la ĝenerala balotado por elekti novan Parlamenton. Dume daŭris en la tuta lando, ĉefe en Madrido kaj Barcelono, la plend-movado de la indignitoj. La afero daŭris kelkajn semajnojn. Fariĝis famaj je tutmonda skalo la bildoj de la kolosa homamaso koncentriĝinta en la madrida placo "Sun-Pordo" kaj baldaŭ aperis imitantoj en multaj lokoj eksterlande, eĉ en Londono kaj Vasingtono. Kvankam tiu movado estis sufiĉe paca, ne mankis perfortaj incidentoj kaj interfrontiĝoj kun la polico. La partoprenantoj en tiu movado kaj koncentriĝoj estis senlaboruloj, homoj kiuj perdis sian laboportenon aŭ gejunuloj kiuj neniam atingis sian unuan laborlokon, familioj al kiuj la bankoj ekspropriigis siajn hipotekitajn loĝejojn, kaj multaj personoj kiuj, solidarece kun la antaŭaj, volis esprimi sian rifuzon pri tiu malbeninda sistemo kiu generas tiujn situaciojn.

Tamen, ŝajnas ke ankoraŭ multe pli da personoj en la lando ankoraŭ konfidas je tiutipa sistemo, ĉar, kiam la Prezidento Zapatero, fine, decidis antaŭenigi la ĝeneralan balotadon, grandparto el la voĉdonantoj plu apogis ambaŭ ĉefajn partiojn de la dupartiisma sistemo, kaj krome venkis la Popola Partio.

La balotado okazis la 20an de novembro. Ĝuste unu monaton antaŭ tiu dato la terorista bando ETA anoncis la finon de sia armita agado; la paco tiurilate daŭras ankoraŭ en la momento kiam oni verkas ĉi tiun raporton (novembro de 2012). Revenante al tiu balotado okazinta antaŭ unu jaro, oni devas informi ke la socialista kandidataro prezidita de Rubalcaba suferis gravan balotan malvenkon: ĝi atingis nur 110 deputitojn kun 28,7 procento da voĉdonoj; ĝi perdis pli ol 4 milionoj el la voĉdonoj kompare al la antaŭa balotado. Dume la Popola Partio liderita de Mariano Rajoy atingis gravan venkon, eĉ pli grandan ol ties de Aznar en la jaro 2000. Ĝi atingis 186 geparlamentanojn kun 44,6 procento el la vocdonoj. Do Rajoy anstataŭis Zapateron en la regado de la lando.

Kiam finiĝis la jaro 2011 en Hispanio estis 5.273.600 senlaboruloj; la senlaboreco atingis 22,85 procento. Ekde la fino de la jaro 2007 estis detruitaj en la lando 2,7 milionoj da laborpostenoj, plejparto el ili en la produktad-sektoro de la mason-konstruado. Al ĉio ĉi oni devas aldoni ke dum multaj monatoj senĉese malbonigis la situacio de la lando en kio koncernas al la konfido kiun ĝi ĝuas en la mondaj merkatoj de la monpruntado, tio estas, pli kaj pli fariĝis malfacile kaj multekoste trovi pruntitan monon por alfronti la tujajn necesojn de la ŝtata demarŝado kaj pagi la interesojn de antaŭaj ŝuldoj. La afero ŝajnas, kaj fakte estas, frenezaĵo se ni konsideras ke grandajn sumojn el la prunteprenita mono iras destinita al la bankoj, kiuj siavice povas negoci per ĝi akirante ŝtatan ŝuldon laŭ tre alta interezo. Tiu ekonomia meĥanismo de monfluado celas pli kaj pli ruinigi la malaltajn klasojn de la socio por pli kaj pli riĉigi la riĉajn klasojn. Ambaŭ partioj de la dupartiisma sistemo samkulpas pri la realigo de tiu politiko. Multaj hispanaj gecivitanoj ankoraŭ ne komprenis ke ambaŭ partioj estas lakeoj de la kapitalo.

La 30an de decembro la nova registaro prezidita de Mariano Rajoy koncesiis al Zapatero la kolieron de la ordeno de Izabela la Katolika kaj aliajn distingojn al la ministroj de ties lasta registaro.



Aspekto de la madrida Placo de la "SunPordo" dum la tagoj de la koncentriĝo de la "indignitoj" de la 15M.




Pasis unu jaro ekde la dato kiam Mariano Rajoy sukcesis plenumi sian plej karan revon komencante regadi Hispanion. Kaj jen nia raporto alvenis al la jaro 2012, kiam oni atingas la duan Centjaron de la unua hispana konstitucio kaj kulminas nia historio de la du jarcentoj de konstituciismo en nia lando. Kaj jen ĉi-jare la nun valida konstitucio, iamaniere, fariĝis simbolo de la problemaro de nia socio ĉar ĝi ekmontris sian nekapablon plu esti la kadro de kunvivado de la interkontraŭantaj sociklasoj de nia lando.

Tuj por la komenco de la nova regado, konkretiĝis la aplikado de iu politiko kiu estis/as, fakte, la malo de tio kion la kandidato Rajoy estis promesinte dum lia longa opozicia etapo kaj, konkrete, dum la lasta balot-kampanjo. La 30an de decembro 2011, la nova registaro anoncis ke la publika deficito estis 8 procento el la malneta industria produkto, kaj pro tio tiu registaro dekretis urĝajn disponojn celantajn malgrandigi la deficiton. Tiuj disponoj estis la plialtigo de la impostoj kaj malgrandigo de la ŝtata elspezado. Krome tiu registaro decidis frostigi la salajrojn de la ŝtataj funkciuloj kaj la minimuman interprofesian salajron.

La regantaro argumentis ke tiuj disponoj estis nepre necesaj por solvi la ekonomiajn problemojn de la lando kaj rehavi la antaŭan vivnivelon. Sed la realaĵo obstine atestas pri la erareco de tiu politiko. La plialtigo de la impostoj okazigas plialtigon de la prezo de ĉiuj varoj kaj produktaĵoj, do tio efikas kontraŭ la konsum-nivelo, kaj la malpliiĝo de la konsumo kreas problemojn al la entreprenoj kiuj produktas la konsum-varojn. Ne estas strange, do, ke multaj entreprenoj bankrotas kaj aliaj por sin savi devas ekslaborigi parton el ĝia laboristaro. La senlaboreco kreskas, kio pli damaĝas la fonton de la konsumo kiu movas la industrion kaj de la impostoj kiujn ricevas la ŝtata financ-servo. Nun estas ses milionoj da senlaboruloj en Hispanio.

Tamen la registaro de Rajoy insistas daŭre apliki la politikon kiu tiel klare sin montris ruiniga. La 23an de majo la karbo-ministoj de Asturio kaj Leono komencis strikon plendante pro la plano de la registaro malpliigi 63 procenton el la subvencioj al la landa karbo-industrio. Dum la sekvaj semajnoj okazis barado de ŝoseoj pere de barikadoj fare de la ministoj kaj perfortaj kontraŭfrontiĝoj de ĉi tiuj kun la polico.

La 9an de junio la ministro pri Ekomio informis ke Hispanio mendis al la Eŭropa Unio prunton je 100.000 milionoj da eŭroj destine al la financ-sistemo. La bankoj ricevas tiujn pruntojn je malalta interezo, nur 1 procento, sed tamen ili ne investas en la produktado kaj por la pruntoj kiujn ili faras al la civitanoj ili postulas tre altan interezon. Dume multaj hispanaj riĉuloj retiras sian monon el la hispanaj bankoj kaj forportas ĝin eksterlande. Ĉar multaj personoj perdis sian laborpostenon, ili ne plu povas pagadi la monatan kvanton pro la ricevitaj pruntoj por aĉeti loĝejon, tiel do la bankoj konfiskas la hipotekitajn loĝejojn. Multaj miloj da familioj perdis sian loĝejon tiamaniere dum la lastaj jaroj, ĉefe dum la lastaj monatoj.

Tiu politiko de la partio de Rajoy estas same aplikata en aliaj landoj de la Eŭropa Unio, ĉefe en la sudo de Eŭropo: Portugalio, Italio, Grekujo… Ŝajnas ke la afero venas trudita de la altaj povocentroj de la eŭropa kapitalismo kaj ties politikaj demarŝantoj, ĉefe la registaroj de Germanio kaj Francio. Ĉi tiuj altaj perantoj de la kapitalismo en nia kontinento disponis la 10an de julio ĉi-jare la kondiĉojn kiujn Hispanio devos plenumi por daŭre ricevi la financan apogon de Eŭropa Unio. Obeante tiujn postulojn la Prezidento Mariano Rajoy prezentis en la hispana Parlamento drastan planon de malgrandigo de la landa budĝeto: 65.000 milionoj da eŭroj dum du jaroj. Tiu mono devas esti kolektita malpliigante la ŝtatan socialan helpon:


Alfredo Pérez Rubalcaba


Cayo Lara


Soraya Sáenz Santamaría


Artur Mas


saneco, edukado… Kaj, ĉefe, por atingi tiun ekonomian celon oni decidis egan altigon de la impostoj: ĝis 21 procento en ĉiuj varoj kaj servoj.
Aliaj disponoj por atingi la menciitan mon-ŝparon estis la nuligo de la eksterodinara salajro de la funkciuloj okaze de kristnasko-festo, kaj la malpliigo de 10 procento el la subvencio de la senlaboruloj post la sesa monato de ĝia ricevado. Ankaŭ, oni eliminis la imposto-rabaton okaze de akiro de loĝejo. Alia flanko de la kontraŭsociala agado de la registaro estis la privatigo de naciaj, ŝtataj entreprenoj, kaj ankaŭ ŝtataj servoj kiel la hospitaloj de la Sociala Saneco. Kiel dirite, ĉiuj ĉi rimedoj okazigas sekvojn kiuj estas ĝuste la malo ol tiuj kiujn la registaro esperis aŭ deklaris esperi. Pro la sinsekva malboniĝo de la landa ekonomio, pli ol 400.000 entreprenoj bankrotis dum la lasta jaro.
La socia reago kontraŭ la reakcia politiko de la registaro de Rajoy kreskas sed tre malrapide. En la balotoj okazintaj lasttempe en iuj aŭtonomaj regionoj daŭre la apogo al la partio de tiu regantaro estas sufiĉe granda. Estas multaj manifestacioj, izolitaj strikoj, forpelo de la loĝantoj de la hipotekitaj loĝejoj fare de la bankoj… sed la solidareco de aliaj personoj krom la implikitaj en la problemoj nur iompostiom kreskas. Kaj la organizita opozicio ne facile organiziĝas.
Julio Anguita, la ekslidero de la Komunista Partio kaj Unuigita Maldekstro publikigis manifeston titolitan ***“Somos mayoría. Frente Cívico”*** (Ni estas plimulto. Civitaneca Fronto) per kiu li priskribas la sociekonomian problemaron de la lando kaj asertas ke plimultas tiuj kiuj rifuzas la politikon kiu okazigis tiun ĥaoson. Tiu manifesto estis la teoria bazo sur kiu formiĝis, en la tuta lando, kolektivo nomata “Civitaneca Fronto” alglutinante gecivitanojn kiuj mobiliziĝas kaj celas la promociadon de nova konstitucia procezo.
Ĝuste en ĉi tiu jaro kiam oni festas la dujarcenton de la unua hispana konstitucio mortis unu el la ĉefaj patroj aŭ promociantoj de la nun valida konstitucio, Santiago Carrillo, alia ekslidero de la Komunista Partio. Pasis jam 34 jaroj ekde la ekfunkciado de tiu konstitucio, kaj estas kialoj por ke pli kaj pli kresku la nombro da hispanaj civitanoj kiuj elreviĝas pri tiu socia kontrakto. La plej progresistaj aspektoj de tiu dokumento, kiel la deklaro ke ĉiu hispana civitano rajtas havi laborpostenon kaj dignan loĝejon restas neaplikataj en la realo, tamen la regant/int/aj partioj igis ke la Parlamento aprobu konstituciajn ŝanĝojn kiuj favoras la financan sektoron, kaj la landajn kaj fremdajn bankojn, kiel tiu de la 23a de aŭgusto de la pasinta jaro per kiu oni limigas la kapablon de la ŝtato kaj de la aŭtonomaj administracioj por enŝuldiĝo. Prave multaj civitanoj komencas kompreni ke la nun valida konstitucio pli kaj pli fariĝas stranga al la popolo kaj celas nur defendi la interesojn de la riĉaj klasoj.
En la kadro de tiu elreviĝo pri la konstitucia leĝaro kaj la agado de la nuna registaro dum la lasta jaro, en monato septembro okazis gravaj popolaj mobilizoj; la 18an de tiu monato estis unutaga ĝenerala striko kun manifestacioj en 60 hispanaj urboj pro la restriktoj de la ĵus aprobita budĝeto. Sed tri tagojn antaŭ tiu dato estis okazinte en Madrido alitipa mobilizo. Pere de Interreto kaj la interreta poŝto, jam de antaŭ kelkaj semajnoj de la fiksita dato de la 15a de septembro estis dissendita kunvoko al manifestacio en la ĉirkaŭaĵoj de la parlamentejo postulante demision de la parlamentanoj por studo de nova konstitucio pli demokrata ol la nuntempa. La kunvokon faris grupoj kiuj estis naskiĝintaj el la amasa mobilizo de la “indignitoj” okazinta la antaŭan jaron, kaj iamaniere la planita mobilizo estis kvazaŭ inspirita en la manifesto de la Civitaneca Fronto. La tagon de la manifestacio ne malpli ol kvar mil policistoj estis deĵorante en la ĉirkaŭaĵoj de la parlamentejo. Kvankam oni petis al ĉiuj manifestaciantoj ke la mobilizo estu pa-

ca, sen perforto kontraŭ la polico, tamen okazis gravaj kaj sangaj incidentoj. Ŝajnas ke estis provokantoj por estigi la perfortan malordon. Dum la sekvintaj tagoj fariĝis fama en Interreto kaj en la eksterlanda televido iu filmeto vidiganta kelkajn policistojn perforte batante iun manifestacianton kiu laŭte kriadas al ili ke li estas kunulo. Ĉiukaze, provokantoj aŭ ne, estis kelkaj vunditoj kaj arestitoj. Estis evidente ke la policistoj ricevis ordonojn agadi brutale kontraŭ la manifestaciantoj. Sur ĉi tiu paĝo oni povas vidi fot-bildojn de la mobilizo de tiu tago kaj la incidentoj kun la policistoj.
Tamen la mobilizo estis sufiĉe amasa kaj same okazis 10 tagon poste, la 25an de septembro, kiam oni estis kunvokita simila manifestacio en la sama loko. Ĉi foje la afero disvolviĝis pli pace kaj orde ĉar la publika opinio en la tuta lando restis sufiĉe ĉagrenita kontraŭ la registaro kaj la polico.
Alia afero kiu vekis la reagon de multaj hispanoj estis la morto de iu virino kiu sin ĵetis el balkono de sia etaĝa loĝejo kiam la banko ordonis la konfiskon. Dum la antaŭaj semajnoj estis okazinte en la lando aliaj similaj memmortigoj de personoj kiujn oni forigis el siaj hipotekitaj loĝejoj. Iu persono reagis alimaniere kaj prenis ladon da benzino per kiu bruligis oficejon de la banko kiu estis ordoninta la eksproprigon de lia loĝejo.
Kiam oni verkas ĉi lastajn liniojn de nia dujarcenta historio de nia lando estas okazinte en Hispanio alia ĝenerala striko, la dua en la nuna jaro, ĉi foje koincidante kun simila mobilizo en Portugalio kaj Grekujo, kaj grandaj manifestacioj kontraŭ la Eŭropo de la kapitalo en Francio, Germanio kaj kromaj 20 landoj.
Kun la fono de tiel streĉa etoso en la lando estas okazante en la Kataluna regiono balotkampanjo por la elektado de nova aŭtonoma Parlamento. En tiu regiono ĉiam estis popola separatisma sento kaj nun tion profitas la naciistaj partioj por peti referendumon mendante totalan sendependiĝon de tiu regiono. Tiu postulo eble celas apartigi la atenton de la civitanoj de tiu teritorio el la sociekonomia problemaro kiu estas tie tiel grava kaj urĝa kiel en la cetero de la lando.
Nu, tia estas la situacio de Hispanio en la Dua Centjaro de la landa konstituciismo. La estontecaj eventoj estas skribitaj neniuloke sed ĝis kiam oni povas antaŭesplori la estontecon ŝajnas ke la krizo estos, mondskale, longdaŭra kaj malfacile solvebla. Se ni komparas ĝin kun tiu komenciĝinta en la jaro 1929 timindas la ebleco ke la kapitalismo, por sin savi, organizu, kiel faris tiam, grandan mondmiliton kaj aŭtoritatecajn reĝimojn kiuj metus finon al la civitanaj liberecoj kiuj estas la frukto de konstitucioj ellaboritaj tra longaj procezoj de popola penado kaj batalado.



**Bildoj de la amasa mobilizo de la 15a de septembro en Madrido, en la ĉirkaŭaĵoj de la parlamentejo.**




## Monarkio de Alfonso la 13a

Rilate al historiaj tekstoj pri la reĝado de Alfonso la 13a, la materialoj ne tiel estas abundaj kiel por la sekvintaj periodoj: respubliko, civil-milito, frankismo… sed tamen ne mankas bonaj kaj ampleksaj libroj kaj ankaŭ artikoloj en revuoj pri historiaj temoj: ***Cuadernos, Tiempo de Historia, Historia y Vida…*** Ĉi-paĝe ni bildigas la frontpaĝojn de kelkaj libroj. Kompreneble, ni temas pri hispanlingvaj tekstoj. En aliaj lingvoj la materialo estas malpli abunda, kaj en Esperanto, laŭ nia scio, estas nenio.

En la hispana lingvo menciindas la verko de Javier Moreno Luzón: ***Alfonso XIII: un político en el trono***, kaj la traduko de la verko de Morgan C. Hall: ***Alfonso XIII y el ocaso de la monarquía liberal***.

En la angla lingvo, krom la koncerna teksto de Morgan C. Hall, ni atentigas ankaŭ pri la verko de William Miller Collier: ***At the Court of His Catholic Majesty***, kaj tiu de Charles Petrie: ***King Alfonso XIII and His Age***.

Krom tiuj historiaj verkoj kiuj pritemas ĝenerale la reĝadon de la lasta Alfonso aŭ ĉi ties biografion, estas ankaŭ tiuj tekstoj kiuj dediĉas sian atenton al konkretaj apartaj aferoj de la epoko de tiu reĝo, kiel la Tragika Semajno, la milito de Maroko aŭ la diktaturo de Primo-de-Rivera. Pri ĉi-lasta, konsiderindas, en la hispana lingvo, la libro de Mario P. Díaz Barrado: ***Palabra de dictador: General Primo de Rivera, análisis de discursos***. En la angla, tiu de James H. Rial: ***Revolution from Above: The Primo De Rivera Dictatorship in Spain***, kaj en la franca, en la verko ***Les Dictateurs*** de Jean-Cyrille Godefroy estas ĉapitro, dediĉita al la hispana diktatoro, sub la titolo: ***Primo de Rivera ou la dictature manquée***.

Pri la t. n. «Tragika Semajno» estas, en la kataluna lingvo: ***Maragall davant la Setmana Tràgica***, de Josep Benet, kaj en la angla, la verko: ***The Tragic Week: A Study of Anticlericalism in Spain***, de Joan Connelly Ullman.

Kiel normale okazas en la prihistoriaj verkoj, ĉefe temante pri la lastaj jarcentoj, la tekstoj respegulas la politikan kaj socian poziciiĝon de la verkistoj. Do, eĉ raportante pri la samaj eventoj, kaj registrante ilin ekzakte, ne ĉiuj historiistoj koincidas en sia juĝo aŭ pritakto de la homaj kondutoj kaj de la agado de la institucioj: partioj, registaroj… Tion devas memori ĉiu leganto de biografioj kaj historiaj verkoj. Kaj tio dirita validas ankaŭ por la historio de la hispana konstituciismo kiun ni prezentas per la du lastaj numeroj de ĉi tiu revuo. Por la ellaborado de tiu raporto ni baziĝis, kvankam ne ekskluzive, sur la historia verkaro de Javier Tusell, ĉefe sia kvar-voluma verko : ***Historio de Hispanio en la 20a jarcento***.



# Legante pri la hispana lastjarcenta historio




## Dua hispana Respubliko

Pri la hispana Respubliko (1931-1936) oni verkis grandamason da libroj, eseoj, raportoj, gazetaraj artikoloj… kaj ankaŭ historiajn novelojn, t. e. rakontaĵoj kun fikciaj protagonistoj sed situitaj sur la fono de reale historia epoko kaj cirkonstancoj, kaj tio ne nur en la hispana lingvo sed ankaŭ en multaj aliaj idiomoj.

Kelkaj el tiuj historiaj tekstoj pritraktas la Respublikon konekse kun la antaŭa reĝado de Alfonso la 13a, kies fiasko ebligis ĝian starigon, aŭ kun la civil-milito kaj la frankismo kiuj estis rektaj rezultoj de la fiasko de la Respubliko mem. Kvankam la respublika reĝimo plu ekzistis, pli malpli teorie, ĝis la fino de la civila milito en 1939, la milita jartrio meritas apartan pritrakton kaj oni povas konsideri ke temas pri aparta historia periodo kun ties propraj karakteraĵoj.

Atentante, do, pri la periodo aprilo 1931 al julio 1936, iuj verkoj temas konkrete pri nur unu aŭ pluraj aspektoj de de la respublika reĝimo: la CEDA, la Oktobra Revolucio de 1934, la socia problemaro, la rilatoj kun la Eklezio…, aŭ plej ofte, centritaj en unu el la tri malsamaj fazoj de la dua hispana Respubliko: Maldekstra Jarduo, Dekstra Regado kaj Popola Fronto. Krome estas la biografioj de konkretaj figuroj de tiu periodo kaj inter ili elstaras la membiografioj, kiel tiuj de la du respublikaj prezidentoj Niceto Alcalá-Zamora kaj Manuel Azaña, sed ne nur ili.

Temante pri la libroj verkitaj pri la respubliko kaj publikigitaj en nia lando, oni devas distingi du epokojn nete malsamaj: tiuj verkoj eldonitaj dum la longdaŭra frankisma reĝimo kaj tiuj kiuj aperis post la forpaso de la diktatoro kaj la demokratiigo de la publika vivo. Kompreneble, la presita materialo de la frankisma epoko nepre respegulas la oficialan vidpunkton de politika reĝimo kiu naskiĝis kiel rezulto de puĉo kaj milito kontraŭ la respubliko. Nur post la malapero de Franko kaj ĉi ties reĝimo povis la historiistoj pritrati la historiajn eventojn sen plia dependo ol la propra scio kaj objektiveco, kaj kun alireblo al fontoj antaŭe ne disponeblaj. Kompreneble, estas ankaŭ materialo verkita ekde pozicioj proksimaj al la venkintoj de la civil-milito, sed ili jam ne plu havas la monopolon pri la informado.




## Hispana Civil-Milito

Se la kvinjara daŭro de la Respubliko antaŭ la milito generis multajn librojn kaj raportojn, la milita jartrio naskis nekompareble pli multenombrajn tekstojn. Multaj verkoj kaj en multaj lingvoj, kaj eĉ en Esperanto.

Tio ne estas stranga, la hispana enlanda milito estis afero kiu vekis grandan intereson kaj pasiojn ne nur ene sed ankaŭ for de la lando. Ĝi estas kvazaŭ la unua batalo de la Dua Mond-Milito, almenaŭ por la eŭropanoj. Multaj eŭropanoj kaj ankaŭ usonanoj partoprenis en la milito kadre de la t. n. “Internaciaj Brigadoj” defendante la Respublikon. Ankaŭ la kontraŭrespublika armeo havis eksterlandajn batalantojn. Ne malmultaj supervivintoj el la hispanaj bataloj verkis siajn memoraĵojn pri la hispana milito. Tiu milito estis inspiro kaj objeto de multaj membiografioj.

Krom la (mem)biografioj abundas la historiaj verkoj kaj ankaŭ tiuj ellaboritaj de la kolektivoj implikitaj en la konflikto, por pravigi ilian dummilitan agadon. Tiurilate oni devas atenti pri tio ke en tiu milito estis pli ol du interkontraŭantoj. Ekzemple, el la flanko de la respublik-favoraj batalantoj, povas eliri tre malsamaj interpretoj de la konflikto depende de la politika aparteno de ĉiu raportanto: socialisto, anarkiisto, komunisto, burĝ-respublikisto, membro de la POUM… kaj ankaŭ en la flanko de la frankista armeo estis diferencoj inter falangistoj, monarkistoj, CED-istoj… La Katolika Eklezio mem havas sian propran, apartan interpretadon pri la afero, aŭ pli ol unu interpretadon laŭ la teniĝo de ĝiaj malsamaj internaj tendencoj.

Antaŭ la neebleco prezenti liston –eĉ se tre skema– de verkoj pri tiu milito, ni volas, almenaŭ, mencii iujn tekstojn verkitajn en Esperanto.

***-Eseo de Miguel Fernández pri la poeto Miguel Hernández.***

***-Eseo de Antoni Castells Duran pri la kolektivigoj en Katalunio okazigitaj inter la jaroj 1936 kaj 1939.***

***-Eseo de Toño del Barrio pri framasonaro, respublikismo kaj Esperanto en Hispanio.***

***-Biografieto de Durruti, mita anarkiista revoluciulo.***


***- Komuniko prezentita en la Kongreso pri Civitana Milito (Madrido, 27-29 novembro, 2006).***

***-Dosiero pri la Hispana Intercivitana Milito, okaze de la 70-a datreveno de la milito.***

***-Prelego de Eduardo Vivancos dum la SAT-Kongreso de 1986 pri la hispana revolucio.***

***-Pablo Foche. La Popola Fronto kaj la Intercivitana Milito.***

Kaj eble multaj aliaj. Tiuj, kiujn ĉi tie ni mencias, estas videblaj en la Interreta paĝo de SATeH: Maldekstro kaj Esperanto, retadreso:
http://www.nodo50.org/esperanto/tekstoj.htm







## Frankismo kaj transira procezo

Por multaj, nun vivantaj, personoj, la raportata enhavo de tiu libraro ne estas historio sed rememoro de travivita epoko, sed por la hispanoj de la junaj generacioj, multaj el la aferoj pritemataj de tiuj verkojn estas pasinta historio de sia lando, same kiel tiuj pri la Respubliko aŭ la enlanda milito. Por ĉi lastaj personoj, se al ili plaĉas aŭ interesas la historio, grandparto el la ekzistanta verkita materialo povas esti tre utila. Sed eĉ al tiuj ni, kiuj travivis grandan parton el la epoko pritemata de tiuj libroj, povas utili ties legado, kaj tio pro du kialoj: unue, la nuntempaj prihistoriaj verkoj alportas informon kaj datumojn kiuj ne estis konataj de la publiko kiam la eventoj okazis, kaj due, ĉar ĉiu teksto pri pasintaj okazaĵoj provizas vidpunktojn kaj opiniojn kiujn indas kontempli kaj pritaksi.

La libroj temantaj pri la unuaj jardekoj de la frankisma reĝimo, samkiel tiuj kiuj pritraktas la enlandan militon, estas fonto de polemiko kaj malkonsento. Okazas ke, en Hispanio, dum la lastaj jaroj, akriĝis la diskutado pri la t. n. "historia memoro", t. e. la rememoro de la militaj krimoj kaj de la politika subpremado dum la diktaturo. Kaj tio ĉar vivas ankoraŭ iuj responsuloj de tiu faroj aŭ estas volo defendi la memoron de forpasintaj responsuloj. Kompreneble, ĉi tie temas pri responsuloj apartenintaj al la venkinta armeo. Kruelan perforton praktikis ĉiuj batalantaj kolektivoj, kaj ne eblas taksi kiu(j) perfortis pli. Sed la perfortintoj de la ruĝa armeo estis, dum la longdaŭra frankismo, denuncitaj, juĝitaj, kondamnitaj… dum mankis eĉ mencio pri la faroj de la venkintoj. Estas nuntempe, kiam la gefamilianoj de la viktimoj de la frankisma subpremado volas koni kie ripozas ĉi ties postrestaĵojn, ke la responsuloj de tiu subpremado kaj siaj defendantoj postulas silenton kaj forgeson, kaj abomenas pri la pretendita "historia memoro".

Ĉiam la historio estis skribita de la venkintoj. Tial estas indaj je estimo la historiistoj kaj la juĝistoj kiuj volas esti la voĉo de tiuj kiuj ne havas voĉon.



# La ekonomiko estas tre serioza afero, oni devas ne lasi ĝin en la manojn de la ekonomikistoj

